HUNGARA VIVO

1
1984
13,-Ft

AT 2061 MÁTRA

NIGRE-BLANKA TELEVIDAPARATO

- Modernaj konturoj, en koloroj nigra, kverkokolora, juglanduj-kolora kaj antracitkolora
- Bildotubo 110^0 kun diametro de 61 cm
- Programelektilo kun 8 sensiloj kaj daŭra tonĝustigado
- Energioŝpara sistemo
- Eblo por alkonekti kapaŭdilon kaj magnetofonon

TEKNIKAJ DATOJ:

Energiokonsumado:	65 W
Ricevkapablo:	VHF kanaloj 1-12 UHF kanaloj 21-60 OIRT-CCIR
Konekto de anteno:	75 Ohm asimetria komuna VHF-UHF
Duonkondukanto:	7 integritaj cirkvitoj 13 transistoroj 54 diodoj
Dimensioj:	700x500x290 120 (dorso)
Pezo:	28 kg

ORION TV RADIO



HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmezŏ u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXIVa jaro, 1984 n-ro 1
(113)

ENHAVO

» Hungara Antologio« paradas... 1
Princz, Oszkár: La sitemo de la publika klerigado 2
Poul Thorsen: Promeno ĉirkaŭ monumento 5
Babits, Mihály: Inter aŭtuno kaj printempo 6
Gyárfás, Miklós: Puriĝo 7
Aldo *de' Giorgi:* Komentoj pri „Lingva Laboratorio" 10
Horváth, Jozefo – Rados Péter András: Pirata metodo dum 5 tagoj Esperanton 11
Paĝo de originala poezio 15
D-ro Rátkai, Árpád: 11. Esperantistoj kontrau la faŝismo 16
Bálint, Szilárd: Servofaro de Eva 18
László, István: Majstro de grandaj violonistoj 19
Panoramo 20
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 23
D-ro Ignat Florian Bociort: Kritiko de la tezoj kiuj neas la progreson de la literaturo kaj arto 24
Tóth, Endre: La tabakvendisto 28
Molnár, László: Dolorĉesigo 30
Gaja paĝo (*E.F.*) 30
D-ro Robert Muller: Sagoj kaj dehakitaj piedoj 31
Kunlaboro kun la brita firmao „Lee Cooper" 33
Ekzameno sen risko, Krucenigmo 39
Korespondi deziras 40

Sur la frontpaĝo foto de *Fejér, Z.*

»Hungara Antlogio« paradas...

en du ekzempleroj sur la frontpaĝo de nia ĉijara unua numero. Tiu ĉi libro estas sendube la krono de la eldona aktivado en Hungario – la Eldonejo Corvina prezentis la kremon de la hungara literaturo al la esperantistaj legantoj en vere inda vesto. Kaj, kiel la ĝisnunaj vendrezultoj montras, nia publiko same inde akceptis la valoran libron. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne havas ĝin, ni varme rekomendas ekspedi sian mendon, ĉar ne necesas esti aŭguristo por diri, ke baldaŭ «Hungara Antologio» elĉerpiĝos!

Post la du «kongresplenaj» numeroj HV revenas al sia pli frua varieco – almenaŭ laŭ la deziro de la Redakcio. En tiu ĉi numero aperas iom multaj literaturaĵoj, por kompensi la ioman «senliteraturecon» de la pasinta jarkolekto. Aperas eĉ du noveloj: unu tradukita el la hungara lingvo (de Miklós Gyárfás) kaj unu originala novelo de Endre Tóth, kies novelaro «Lappar, la Antikristo» gajnis la honorigan titolon «La libro de la Jaro 1982». Oni povas legi en bela traduko la mediteme ribelan poemon «Inter aŭtuno kaj printempo» de Mihály Babits, aperas ankaŭ pluraj originalaj poemoj. En iom longa, sed vere ĝisfunda studo la rumana profesoro Ignat Bociort refutas la tezojn de tiuj estetikistoj, kiuj neas la progreson en la artoj – lian studon ni aperigas kun la supozo, ke inter niaj legantoj troviĝas ne malmultaj, kiuj havas intereson ankaŭ por artteoriaj problemoj.

Jozefo Horváth kaj Péter András Rados en ampleksa artikolo prezentas sian tre specifan instrumetodon, kiu vekis ampleksajn eĥojn jam ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande. Nun oni povas havi bazajn informojn pri tiu ĉi vere nekutima, sed laŭ la spertoj tre efika instrumetodo.

Aldo de' Giorgi faras komentojn pri pli frua «Lingva Laboratorio» de Bernard Golden; Poul Thorsen prezentas siajn ekpensojn, vekiĝintajn dum Budapeŝta promenado; Oszkár Princz prezentas la sistemon de la hungara publika klerigado, aperas interesa arkeologia artikolo... kaj reaperas niaj kutimaj rubrikoj, interalie ankaŭ pluraj recenzoj, kiuj espereble helpos al niaj legantoj orientiĝi inter la ĉiam pli multaj Esperantaj libroj. Kaj fine: la Redakcio deziras bonan sanon kaj multajn sukcesojn al siaj legantoj dum la nova jaro 1984!

La sitemo de la publika klerigado

La edukado de plenkreskuloj komenciĝis en la 18a jarcento, instigata de la tiamaj francaj filozofoj kaj kleristoj. La edukado de plenaĝuloj ricevis pli kaj pli grandan signifon paralele kun la evoluo de la kapitalismo.

La edukado de plenkreskuloj estis funkcie orientita, ĝi krociĝis al la funkcio de la laboro kaj politika vivo. La historio de la hungara plenkreskul-edukado dokumentas, ke ĝian bezonon ankaŭ fortigis la limiteco kaj fermiteco de la edukadsistemo.

La tasko de la plenkreskul-edukado estis anstataŭa kaj ĝi estis kunligilo inter la ĝenerala kaj fakklerigo.

Kiam en Hungario la laborista movado aperis kiel politika kaj ekonomia forto, ĝi klopodis akiri la bezonatajn fakscioj n; instrui la analfabetojn skribi kaj legi. La laboristaj asocioj organizis diversajn kursojn, dimanĉajn lernejojn, kaj oni ankaŭ fondis „popolakademiojn".

Dum la fino de la pasinta jarcento, respektive en la komenco de ĉi tiu jarcento la laboristaj partioj kreis politikajn lernejojn kaj legrondojn, diversajn amatorajn grupojn.

En la ĉi-supre menciitaj kadroj evoluis la eksterlerneja edukado kaj klerigado ĝis la dua mondmilito.

De 1945 ĝis la sepdekaj jaroj estis uzata la nocio „popolklerigo" (népművelés). Ĉi tiu nocio signifis la eksterlernejan klerigon. La „popolklerigo" mekanika klasifikis la homojn. Laŭ ĉi tiu klasifiko ekzistas unuflanke la kreistoj kaj disvastigistoj, aliflanke la klerigendaj homoj, kiuj estas nur pasivaj akceptantoj.

La nova nocio estas la publika klerigado (közművelődés). Ĉi tiu nocio instigas al pli demokrata kaj komunuma sinteno, al la memklerigo. La memklerigo estas ebleco kaj tasko de ĉiuj ŝtatanoj. La memklerigo ne signifas nur simplan akcepton kaj pasivan akiron de konoj, sed signifas ankaŭ ageman partoprenon en la procezo de la kreo kaj disvastigo. Ĉi tiu nocio premisas, ke ĉiu homo havas ian specialan scion, sperton, kiun estas inde transdoni al la publiko. La popolo ne

Amatora pentrista rondo en la Kulturdomo „Attila József"

estas nur objekto de la klerigo, sed ankaŭ estas ĝia subjekto.

En la publika klerigado la plej gravajn lokojn okupas la kulturdomoj kaj publikaj klerigaj bibliotekoj.

La leĝo V/1976 pri la publika klerigado difinas la lokon kaj taskojn de la kulturdomoj kaj bibliotekoj en la kultura agado.

La kulturdomoj kaj la publikaj bibliotekoj estas bazinstitucioj de la publika klerigado. Iliaj ĉefaj taskoj estas la sekvaj: instigi la kulturajn pretendojn de la loka loĝantaro precipe de la junularo, poste kontentigo de la instigataj pretendoj.

Pro ĉi tiu sistemo la vivo de la kulturdomoj estas tre varia eĉ en sama distrikto.

Por realigi la taskojn, la kulturdomoj uzas diversajn agadformojn:

a.) kreas klerigajn komunumojn (sciencpopularigaj rondoj, amatoraj artgrupoj, lingvokluboj, fakgrupoj de kolektantoj),

b.) helpas la memklerigadon ene kaj ekstere de la kulturdomo (diskuto pri sciencaj kaj artaj literaturoj, eksperimentado, lingvolernado ktp.)

c.) organizas la altnivelan pasigon de la libera tempo (dancaj, teatraj, muzikaj kaj filmaj programoj)

d.) helpas la esploradon de la loka historio, kaj la movadon ekkoni la patrujon.

La kulturdomoj helpas ankaŭ la klerigan laboron de la diversgradaj lernejoj, kunlaboras en la solvo de la lokaj taskoj de la instruado de la plenaĝuloj. Ili kunlaboras en la formigo kaj disvastigo de la novaj metodoj de la publika klerigado.

En la pasintaj jardekoj la kantĥoro estas la plej populara inter la artgrupoj amatoraj. Pere de tiuj preskaŭ mil kvincent homoj konatiĝas kun la kantkulturo kaj la muziko. De la sepdekaj jaroj la centron de la interesiĝo okupis la folkloro. Amatoraj artgrupoj kaj la metiaj fakgrupoj turnis sian atenton al la trezoro de la folkloro, oni fondis multajn metiajn fakgrupojn, en kiuj – laŭ la malnovaj metiaj metodoj – oni brodas, teksas, lignon skulptas, kaj argilon tornas.

Kleriga centro sur la placo Almási en Budapest

Al la publika klerigado, krom la agadformoj funkciantaj en kulturdomoj, apartenas ankaŭ la klerigado fare de la kinejoj, teatroj, muzikinstitucioj kaj la amaskomunikiloj.

Post 1945 baldaŭ formiĝis la reto de la kulturdomoj. La kulturdomoj plej ofte estis lokigitaj en alicelaj konstruaĵoj, sed jam en tiu tempo estis komencita ankaŭ la konstruado de specialaj konstruaĵoj. En la kvindekaj jaroj estis en la centro de la kulturpolitikaj celoj la grandaj aranĝaĵoj, tial la plimulto de la novkonstruitaj kulturdomoj havis kvazaŭ nur unu grandan salonon. Ĝis la fino de la sesdekaj jaroj oni kreis ĉirkaŭ 3700 kulturdomojn. Fine de tiu jardeko la kontrolo konstatis, ke el ili ĉirkaŭ la duono ne disponas pri la konvenaj kondiĉoj, sekve la ĉi-lastajn oni rekvalifikis, ili iĝis kulturkluboj. Se apud ili funkciis malgranda biblioteko, ili iĝis klub-bibliotekoj. Sekve de tio, en 1975 funkciis 2805 kulturdomoj.

Kelkaj indikoj pri la funkciado de la kulturdomoj: en la jaro 1975 el 1000 loĝantoj partoprenis en kulturaj-amuzaj programoj 715 personoj, 456 personoj vizitis sciencpopularigajn prelegojn, 21 gejunuloj estis anoj de iu amatora artgrupo kaj 18 personoj estis anoj de sciencaj fakrondoj.

Kelkaj indikoj pri la funkciado de kulturdomoj en la jaro 1980.

Nombro de la kulturdomoj	2554
Amatoraj artaj grupoj	10300
anoj de la grupoj	207000
Kluboj	5700
anoj de la kluboj	237000
Nombro de la distraj kaj artaj prezentaĵoj	41700
Vizitantoj de la prezentaĵoj (miliono)	9
Nombro de la klerigaj fakgrupoj	5100
anoj de la fakgrupoj	152000

La leĝo pri la publika klerigado certigas la unuecon de la multkolora praktika agado. La efektivigo de la unueca direktado estas tasko de la ministro pri klerigo, la edukaj kaj publikaj klerigaj institucioj ankaŭ estas kontrolataj de la ministro. Ankaŭ la kontrolon de la klerigaj agadoj okazantaj en aliaj kadroj prizorgas la ministro pri klerigo.

Oszkár *Princz*

Amatoraj skulptistoj (Fotoj de Z. Feiér)

NI ENTREPRENU KUNE!

Se entrepreni ion... **BUBIV**

Se instalado de hotelo... **BUBIV**



Ni entreprenas kompletan fabrikadon kaj surlokan muntadon de instalaĵoj por hotelĉambroj kaj komuncelaj ejoj, enlande kaj eksterlande

BUBIV
BUDAPEST, IV. Lórántffy Zs. u. 15/b.

bubiv

Poul Thorsen

Promeno ĉirkaŭ monumento

1. La individualisto

*„Mi sidis sur plej suba ŝton' de l' bordo...'** apud la magra sed digna figuro de *Attila József*, ne malproksime de la impona parlamentejo. La poeto – ŝajne pro distriĝemo – flankenĵetis sian truhavan jakon, tenas karakterizan, larĝan ĉapelon per ekstreme longaj fingroj, trosenteme. La vizaĝo, forkonsumite, rezigne, tamen indignige reflektas homan sorton individuan, kiu, mirige, iel kongruas kun la sorto de la hungara popolo intermilita.

II. La internaciistoj

De Danubo ne multaj paŝoj por cele/sencele atingi laŭ strato Stollár Béla la placon Néphadsereg. Distance aŭdiĝas akutaj voĉoj de infanejo, kaj elinter arbetoj verdiĝantaj ekaperas grupetoj de ludantaj bubetoj. Triviala travivaĵo, kaj tamen...

La centro de la ludo estas neordinara monumento: kelkaj horizontalaj ŝtonegoj krudaj. Ili formas fonon por tre akurata vico de ŝablonaj figuroj: soldatoj, jes, ĉar manoj salutas

de l' kaskoj, sed kial vizaĝoj tiom anonimaj? Al kio aludas?

Unu vertikala ŝtonego klarige lapidaras:

A SPANYOLORSZÁGI
NEMZETKÖZI
BRIGÁDOK
MAGYAR
HARCOSAINAK
EMLÉKÉRE
1936–1939

La hungara taĉmento de la internacia brigado en la hispana civilmilito 1936-39! Stablo honoriga por sennombraj bravuloj, kiuj alkuris el preskaŭ ĉiuj landoj de l' mondo por defendi la demokratian reĝimon de Madrido kontraŭ faŝismo. – La eble plej stranga, plej bunta, plej neprofesia armeo vidita en la Historio. Unueca nur en bravo kaj pravo.

Sur ĉiu horizontala tavolo sin rivelas kvazaŭ elsur hispanaj montflankoj nomoj de batalejoj, dolorige por rigardanto sufiĉe aĝa por rememori, ke ankaŭ tie kaj tie kelkaj liaj kaj lialandaj kamaradoj ripozadas

MADRID
JARAMA
GUADALAJARA
HUESCA
BRUNETE
BELCHITE
TERUEL
EXTREMADURA
LERIDA
EBRO
CATALUÑA

Post gloraj venkoj malvenkis madjaroj kiel la tuta internacia brigado, sed nur provizore. La historio paciencas.

La ifanaro, sekura en sia gajeco, apenaŭ konscias, kiuj do estas la senvizaĝuloj de la monumento. Senrespekte ili baraktas, kaŭras inter la kruroj de ava generacio surmonumenta.

Sed la internaciistoj ne estas forgesitaj, samkiel neniam estos ĉiuj aliaj ardaj luktintoj por la libero.

*** Komenca verso el poemo de Attila József, aperinta en Tutmonda Sonoro kaj Hungara Antologio.**

Mihály Babits
(1883-1941)

Inter aŭtuno kaj printempo

La aŭtuna vina kant' forsonis.
La kelfrisko en tepido dronis.
Ventoj, pluvoj frapas nudan viton.
Argilhaŭto monta tremas fridon,
kote putras eĉ la tero muta,
kiel korpo de mortinto nuda.

Jam vesperas, la vespero kuras,
kiel maljuneco ĝi obskuras,
proksimiĝas piedpinte, ŝtele
kaj ĉeestas jam fulmoapere!
Ni pri la sintrompo vane revas:
ve, ni morti devas, morti devas!

Neĝo falis kaj la teron kovras
nur por kaŝi, ke ĝi kiom povras.
Nun ĝi blankas kiel dum vespero
en la ĉambro prete la kuŝejo,
la kusenoj molaj kun invito:
kvazaŭ iras ni sur propra lito,

kiel la infanoj gajimpetaj,
enlitiĝi ne ankoraŭ pretaj
promenadas sur la litosino
ĝis ne plu toleras la patrino
kaj: „En liton! " ŝi la voĉon levas.
Ve, ni morti devas, morti devas!

Turnas sin horloĝo sabla: jaro,
ekĉerpiĝas nova la tagaro,
por horloĝo kio sablo estas,
por la nova jaro zorgoj restas.
Kiom da laboroj ne orditaj!
Arboj de plezur' ne rikoltitaj...

Malkvietas nia kor' turmenta,
kiel la gardisto ŝanĝ-atenda.
Cent tirkestojn haste ni malfermas,
Kisoj adiaŭe nin konsternas.
Ni konsolan ĝojon ne ricevas:
ve, ni morti devas, morti devas.

Neĝo pasas, jam printempo ŝvebas,
mi ne scias, al kio mi strebas!
Kiel floko ankaŭ mi degelas,
larme fluas, blove malaperas.
Ĝis la birdoj ĉiuj jam revenos,
sekos grundo, vintro sin fortrenos...

Sole mia vintro ne pasemas.
Sole mia morto ne cedemas.
Kiun mi forflugi lasis iam,
tiu bird' revenos ja neniam.
Florosene miaj branĉoj krevas...
Ve, ni morti devas, morti devas!

La amikoj vice min forlasis,
al kiuj mi bonis, min frakasis;
min ne amas plu, kiujn mi amis,
min polvigas, por kiuj mi flamis.
Mian branĉ-literon sur la grundo
viŝos la printempa kot-inundo.

Seka vito, gasto pasintjara:
por mi eĉ printempo jam amara.
Min brakumas nur vi, edzinbono,
stumpan paliseton roza zono —
via kis' la timon for-forlevas...
Ve, mi morti devas, morti devas!

Tradukis: Imre Szabó

Miklós Gyárfás
(1915–)

PURIĜO

– *Bonan tagon, sinjoro policestro.*
– *Bonan tagon.*
– *Mi estas Doktoro Arpad Bence, pensiulo, urba bibliotekisto.*
– *Polica kapitano Homolai. Bonvolu sidiĝi.*
– *Dankon. En mia vivo mi estas la unuan fojon en policejo.*
– *Per kio mi povas helpi al vi?*
– *Nu, vere mi ne scias..*
– *Kiel?*
– *Tiel mi opinias, ke... sinjoro policestro, unue mi volus iome trankviliĝi...*
– *Bonvolu.*
– *Mi loĝas sur la ĉefplaco. Ekde tridek jaroj. Vid' al vide al la viandvendejo. La leterportisto kutimas sonorigi ĉe mi inter la deka kaj la deka kaj kvarono.*
– *Daŭrigu.*
– *Hieraŭ ekzemple li sonorigis ĝuste je la deka. Mi iris malfermi la pordon. Ĝenerale mi ne ricevas multajn leterojn, sed ĉiam estas unu-du salutoj, invitiloj, reklamiloj, oficialaj skribaĵoj kaj alio simila. Kontraŭe, hieraŭ mi havis nur unu leteron. Ĝi estis palverda koverto kun hela rando, sen la nomo de la sendinto. La adreso estis tajpita. Mi eniras mian ĉambron, malfermas la koverton per papertranĉilo kaj, ĉar mia ĉambro estas iome malhela, mi ŝaltas la lampon sur la skribotablo, pli ĝuste: mi volas ĝin ŝalti. Nome la lampo ne lumis. Mi ŝaltas la surplafonan lampon, ankaŭ tio ne lumas. Mi vokas la dommajstron, ke ĉe mi ne estas kurento. „Kiel ĝi estus ĉe vi – diras al mi la dommajstro –, kiam de la naŭa kaj duono en la tuta domo la kurento estas malŝaltita." La komuniko de la dommajstro trafis min neatendite. Kiel povis sonorigi ĉe mi la leterportisto, se estas malŝaltita la kurento? – mi demandis min kaj al mia demando mi ne povis doni racian respondon, nur tion, ke eble la poŝtisto ne sonorigis, sed ĉe la fenestro mi vidis lin enpaŝi tra la pordego de nia domo kaj mi iris kontraŭ li malfermi la pordon. Spite al tio, eĉ nun mi aŭdas la sonorigon de la leterportisto.*
– *Mi petas vin transiri al la afero, sinjoro doktoro.*
– *Por la tuta mondo mi ne volas perdigi senutile vian tempon, sinjoro policestro.*
– *Transiru al la letero, sinjoro bibliotekisto.*
– *Jes, la letero... la letero estis tajpita. Ĝi konsistis nur el tri linioj: „Mi havas la honoron sciigi vin, ke vi ŝuldas ankoraŭ kalkulon pri la murdo, kiun vi faris en via vivo. Ĉar nur mallonga tempo staras jam je via dispono por aranĝi vian aferon (fine ja vi estas sesdek du jara), mi petas vin urĝe disponi pri la afero." Nelegebla subskribo.*
– *Ĉu vi scias ĝin parkere?*
– *Mi ne volis fidi miajn proprajn okulojn. Mi ĝin legis almenaŭ dek fojojn.*
– *Bonvolu montri la leteron.*
– *Bedaŭrinde mi ne povas ĝin montri.*
– *Ĉu vi ne kunportis ĝin?*
– *Jen la situacio, la leteron, kiun – kiel mi jam menciis –, mi legis almenaŭ dek fojojn kaj metis ĝin ien aŭ mi ne scias, kio okazis al ĝi... Nu, sufiĉe diri, ke mi nenie ĝin trovis, kvankam mi serĉis ĝin en ĉiuj anguloj de la loĝejo.*
– *Do, temas pri sennoma letero?*
– *Jes.*
– *Mi konsilas al vi sinjoro doktoro iri hejmen, ree serĉi la leteron kaj ĝin trovinte, revenu.*
– *Sed ĝi estas absolute netrovebla!*
– *Se vi lasis la leteron en via ĉambro, tiukaze ĝi tutcerte troviĝas tie.*
– *Ne estas tie.*
– *Ĉu iu vizitis vin ekde hieraŭ?*
– *Neniu.*
– *Do, neniu povis ĝin ŝteli.*
– *Ne. Maksimume dum tiu tempo, kiam mi rapidis al la dommajstro.*
– *Ĉu vi lasis la pordon de la loĝejo malfermita?*
– *Pri tio mi ne memoras.*
– *Ĉu vi memoras pri nenio? Nek pri tio, ĉu la poŝtisto sonorigis aŭ ne, nek pri tio, ĉu vi lasis la pordon de la loĝejo malfermita?*
– *Certaj aferoj estas obskuraj antaŭ miaj okuloj, sinjoro policestro, tion mi konfesas, sed mi senkulpigas min per ekscitita animstato, aliparte mi parkeris al vi laŭvorte la leteron, kaj se vi deziras, mi povas ĝin ripeti.*
– *Ne necesas. Sen la letero mi povas nenion fari en ĉi tiu afero.*
– *Sed sinjoro policestro, ja iu min akuzas pri murdo! Ekde sesdek du jaroj mi honeste vivas sur la Tero, ekde tridek tri eĉ unu polvero ne makulis miajn agojn kaj jen, abrupte aperas sennoma leterskribinto kaj...*
– *Mi petas vin, sinjoro doktoro, ne ekscitiĝu. Se oni povas konkludi el la stilo de la letero parkere citita de vi... „Mi havas la honoron sciigi vin." „Mi petas vin urĝe disponi pri la afero".. kaj tiel plu... nu, temas pri stranga, mi povas diri, pri nenormala ŝerco...*
– *Unue ankaŭ mi pensis pri tio, sinjoro policestro, sed iom poste mi trovis tro simpla kaj – kiel diri? – tre komforta ĉi tiun klarigon.*
– *Mi ripetas, sen la letero mi ne povas esti je via helpo.*
– *Do, vi lasas lin fuĝi?*

– *Mi ne povas spuri sennoman leterskribinton, kiu ne havas sennoman leteron.*
– *Mi pensas ne pri la skribinto de la letero.*
– *Sed pri kiu?*
– *Pri la murdinto.*
– *Pri kia murdinto?*
– *Kiun la leterskribinto alvokas konfesi la agon.*
– *Mi ne komprenas, al kio vi aludas?*
– *Laŭ la letero, tiun murdon iu „en sia vivo" faris. Alivorte, en nedifinebla tempo. Ĝi povis okazi antaŭ jardekoj.*
– *Mi petas vin, sinjoro doktoro, ne misuzi mian paciencon. La sennoma letero – vi tiel konfesis – estis adresita al via nomo.*
– *La adreso povas esti erara. Eble la letero apartenas al aliulo. Al iu, kiu „en sia vivo" fakte murdis kaj eble la amikon de la leterskribinto, lian parencon aŭ lian konaton li murdis.*
– *Nu, via fantazio estas sufiĉe romantika.*
– *Mi ne neas. Originale mi volis fariĝi verkisto, sed bonŝance mi divenis, ke la libroj de aliaj pli interesas min ol tiuj kiujn mi verkus. Pro tio mi ankris ĉe la bibliotekista kariero.*
– *Mi ne kredas, sinjoro doktoro, ke la leterskribinto povus esti konfuzinta vin kun kiu ajn. La nekonato volis fari vin ŝercobjekto aŭ volis vin ĉikani, jen ĉio. Ĉu troviĝas inter viaj amikoj aŭ konatoj iu, pri kiu tio estas supozebla?*
– *Mi ne havas konjekton pri tio.*
– *Jen, mia propono. Provu vi mem propramane demaski la sekreton, kvankam eblas, ke la kulpulo sin prezentos. Ĉiaokaze, faru al li bonan lavon kaj klarigu al li, ke ne decas fari tiajn idiotajn ŝercojn.*
– *Mi vidas, sinjoro policestro, ke vi volas liberiĝi de mi.*
– *Mi havas multe da laboro. Ne ofendiĝu.*
– *Ĉu vi ne vidas, ke la afero ne estas tiel simpla, kia ĝi ŝajnis en la unua momento?*
– *Kion vi volas diri per tio?*
– *Mi ne por tio estas ĉi tie, ke vi ekirigu detektivan esploron pri la sennoma leterskribinto, sed tial, ke vi fetu lumon sur la sekreton.*
– *Sur kian sekreton?*
– *Sur tiun, ke... pro la ĉielo! Helpu al mi! Ĉu vi ne vidas, ke mi regas ĉiam pli malfacile miajn emociojn... La letero... la diablo kunportu ĉi tiun leteron.. mi ne volas tordi plu la demandon.. Abrupte ĝi estis tie... poste ĝi senspure malaperis...*
– *Nu, malaperis, do malaperis. Kial tiom maltrankviligas vin tio?*
– *Sed la leterportisto! Ĉu li sonorigis aŭ ne? Ĉu estis elŝaltita la kurento aŭ ne?*
– *Ne kriu, mi petas vin!*
– *Mi petas pardonon. Tial mi estas tiel ekscitita, ĉar neklarigeblaj duboj min atakis...*
– *Ĉu li sonorigis, ĉu li ne sonorigis, li transdonis al vi la leteron.*
– *Jes... Kvazaŭ li estus ĝin transdoninta.*
– *Kio estas al vi, sinjoro doktoro? Ĉu vi havas kapturniĝon?*
– *Ho, nenio... mia sangopremo ne estas tre ideala, sed tio havas nenian signifon... Mi adiaŭas, mi ne volas ŝteli de vi vian karan tempon... jes, vi certe pravas, sinjoro policestro... Stulta ŝerco min tiom ekscitis. Bedaŭrinde mi havas tian naturon. Mi prenas ĉion grava al mia koro kaj – kiel vi ĝuste konstatis – mi havas emon je fantaziado. Eĉ tio traflugis al mi tra la kapo, ke eble... kiel diri? ... mi komencis jam akuzi min mem.*
– *Pri kio?*
– *Ke la leterskribinto scias ion pri mi, kion mi ne scias. Sinjoro policestro, por mi la sola trankviliga solvo estus, se vi min priaŭskultus.*
– *Pri kia afero?*
– *Pri la afero de la murdo. Mi ŝatus esti absolute certa pri mia senkulpeco. Mi ne estas freneza. Mi scias precize, kion mi diras. Mi ne havas dubon pri mi mem. Mi estis ĉiam honesta homo. Tamen mi ne estas tute trankvila.*
– *Ĉu vi estis soldato?*
– *Jes, serĝento. Mi soldatiĝis en oktobro de mil naŭcent kvardek.*
– *Ĉu vi batalis ankaŭ en la fronto?*
– *Jes. Ekde majo de mil naŭcent kvardek du ĝis januaro de mil naŭcent kvardek tri. Pro mia hernio mi estis definitive forpermesita.*
– *Ĉu ne el tio originas via troa skrupulo?*
– *Kion vi komprenas sub tio ĉi?*
– *Vi pasigis la plej grandan parton de via vivo inter libroj. La literaturo kapablas ĉion. Eble danĝermaniere ĝi delikatigis vian sentemon. Estas imageble, ke ia sekreta memakuzo liberiĝis en vi pro la letero. Eble vi partoprenis en korpalkorpa batalo aŭ en simila milita agado kaj nun al vi estas la sento...*
– *Mi deforis en kontoro ankaŭ en la fronto. Eĉ unu batalon mi ne partoprenis.*
– *Ni vidu kelkajn eblojn. Nun ni pririgardu la staton de la afero. Mi ne volas, ke vi denove min ĝenu per ĉi tiu afero, kiu plie apartenas al neŭrologo. Ĉu vi ne denuncis iun*

en mil naŭcent kvardek kvar, en kvindek aŭ en kvindek sep?

– Ah, sinjoro policestro!

– Jes, jes, sed... mi pensis ne pri intenca denunco. Kelkfoje oni povas fari nepripensitajn deklarojn, per kiuj aliaj povas implikiĝi en malagrablaĵojn.

– Neniam mi permesis al mi, ke politikaj pasioj min ekregu.

– Tamen.. kiel vi kondutis en tiuj tempoj, kiam tiaspecaj homaj malfortaĵoj kiel malkuraĝo, timo aŭ oportunismo, apartenis al la kondiĉo de la pluvivado.

– Mi fortenis min de ĉiuj malpuraj manifestadoj de la historio.

– Ĉu iu petis helpon de vi en la fus menciitaj tempoj kaj se jes, ĉu vi ne rifuzis al tiu vian helpon?

– Okazis ties kontraŭaĵo, sinjoro policestro. En la lasta semajno de la milito, Budapeŝta junulo kun kiu mi militservis en la fronto antaŭ mia ekssoldatiĝo, petis min kaŝi lin de antaŭ la sagokrucanoj. Li estis dizertinto. Mi lin kaŝis.

– Kie?

– En mia loĝejo.

– Ĉu li surhavis soldatan uniformon?

– Ne. Mi renkontiĝis surstrate kun li civilvestita.

– Kaj ĉu via estinta kamarado estis ĉe vi serĉita?

– Jes. La sekvan tagon posttagmeze.

– Do, oni lin arestis.

– Ne. La junulo frumatene foriĝis.

– Ĉu li pasigis ĉe vi nur la nokton?

– Jes.

– Kial li ne restis plu ĉe vi?

– Ĉar... mi tiel pensis, ke ĉe mi li ne estas en sekureco. Dank' al Dio, mia antaŭsento estis ĝusta. Kiam la sagokrucanoj revenis, jam eĉ lian spuron ili ne trovis.

– Unuvorte, ĉu vi konsilis al li foriri?

– Jes.

– Kaj kiel li akceptis vian konsilon?

– Unue iom nekomprene, sed baldaŭ li komprenis, ke mi pravas kaj li foriris. Jene li saviĝis.

– Mi pensas, ke li estis dankema al vi?

– Mi ne scias. Mi ne vidis lin plu.

– Ĉu li ne vizitis vin post la milito?

– Ne.

– Kaj ĉu vi ne interesiĝis pri li?

– Kie mi povus esti interesiĝinta? Li ne estas ĉi-tieulo.

– Kompreneble. Tamen la junulo povus esti skribinta kelkajn vortojn. Fine do, vi savis lian vivon.

– Li ne skribis.

– Eble tial, ĉar... li ne povis.

– Laŭ vi, sinjoro policestro, kio lin malhelpis? Ĉu maldanko aŭ indiferento?

– Aŭ la morto.

– Pri tio mi ne pensis.

– Kiu scias? Eblas, kiam li foriris laŭ via konsilo, oni lin kaptis. Multaj ceremonioj ne estis faritaj pri la dizertintoj.

– Ne! Li ne povis esti mortigita!

– Mi menciis tion kiel eblon.

– Tiam oni estus lin mortiginta, se li estus trovita ĉe mi.

– Certe estas tiel. Kondiĉe ke... la malfeliĉulo estis fakte serĉita ĉe vi.

– Mi furas al vi, ke... Eĉ nun tranĉas miajn orelojn ilia senpacienca sonorigo.

– Ankaŭ la poŝtisto sonorigis.

– Kion vi diris?

– Li sonorigis, se ne estis elŝaltita la kurento.

– Ĉu vi min suspektas, ke...

– Pri nenio mi vin suspektas. Vi suspektas vin mem. Aŭ ĉu mi eraras?

– Vi ne eraras, sinjoro policestro.

– Vi donis al li rifuĝon.. poste vi elpelis la rifuĝinton.

– Mi nur..

– La dizertinto, se vi ne forsendus lin, vivus eĉ hodiaŭ.

– Sed se..

– Ne estas: sed. La sagokrucanoj serĉantaj dizertintojn ne venis al vi.

– Eĉ nun mi aŭdas la danĝeron signifantan sonoron de la sonorilo.

– Kompreneble vi ĝin aŭdas. Ĉu vi aŭdis ankaŭ la sonorigon de la leterportisto? Kvankam la kurento estis elŝaltita. Aŭ ĉu la kurento ne estis elŝaltita? Egale. Vi transprenis ankaŭ la sennoman leteron, kiun neniam skribis al vi iu. Kaj ĝin neniu skribos al vi iam.

– Do, ĉu vi min nun arestas?

– Ĉu vi revas eĉ nun, sinjoro bibliotekisto?

– Ĉu vi ne prenas min murdinto?

– Nur fiulo, kiu – se ni bone pripensas la aferon – esence estis humanisto – aŭdiĝis ankoraŭ la voĉo de la policestro, poste... estingiĝis la krepuska lumo sur la skribotablo de la bibliotekisto. Ankaŭ ĉi tiu tago forpasis kiel la aliaj.

El la hungara: István Nagy

Komentoj pri „Lingva Laboratorio"

Mi aplaŭdas la iniciaton de HV, kiu kuraĝis aperigi (en n. 4-1983) la artikolon de Bernard Golden „Lingva Laboratorio", kie nia faktotuma kaj ĉioscianta lingvisto analizas kritike kelkajn erarojn kaj misstilaĵojn, aperintajn en la numero 1-1983 de la hungara revuo.

Laŭdinda afero, kvankam, miaopinie, estus pli profite direkti la atenton kaj la ruĝan krajonon al aliaj revuoj, kie tiuj mislingvaĵoj aperadas multe pli abunde ol en HV (miaj ekzempleroj de „Monato" estas plenaj de ruĝaj substrekoj.).

Do, ĉar, komente de la artikolo, la redaktoro de HV invitas la legantojn esprimi sian opinion pri la diskutitaj problemoj, mi deziras eldiri miajn rimarkojn.

1 – Uzo de la artikolo

Premisante, ke estas iom pleonasme paroli pri „difina" artikolo, ĉar esperanto posedas nur unu (nedifina, partitiva, duala aŭ aliaj ne ekzistas), Golden plene pravas en la donitaj ekzemploj. Li krome diras ĝuste, kiam li asertas, ke, ĉefe en la verkoj de (eĉ famaj) slavaj aŭtoroj, ties uzado estas ofte kaprica, hazarda.

2 – Transitiveco de verboj

Se ni volas esti senrezerve De Saussureaj kaj PIV-aj, Golden tute juste didaktikas en la akuzitaj kazoj.

Tamen mi demandas al mi, kiu dekretis (laŭ mi erare), ke „urĝi" kaj „eĥi" estas transitivaj.

Mi tute ne deziras implikiĝi en la ĝangalan problemon de la gramatika karaktero de la esperantaj radikoj, sed, eĉ se tiel estas, mi ne akordas kun la verba transitiveco de tiuj du verboj. Laŭ mi „urĝ-" devus esti adjektiva (do, „urĝi" - esti urĝa). Same pri la elsubstantive derivita „eĥi" (- esti eĥo, fari eĥon). La ekzemplo de PIV, „urĝigi" - esti pelata de urĝeco, ne ŝajnas al mi tre logika. Mi pensas ke, en la frazo kritikita de Golden, estus tute regule parafrazi: „la kreskantaj bezonoj *igis* urĝa la intervenon..." Imagu krome, ke en la itala verbo „urĝi" tute ne ekzistas. Ni diras: „la afero estas urĝa", „mi havas urĝon", k.s.

Konklude, mi lasas al pli kompetentaj gramatikistoj (kaj tia Golden sendube estas) la solvon de tiuj problemoj. Iliajn opiniojn mi respektas; mi nur esperas ne esti krucumita se ankaŭ mi – spite la PIV-econ – iam uzos tiujn verbojn kun netransitiva signifo. Des pli, ke mi estas en bona kompanio; ja mi rimarkis ke ĉiam pli multaj verkistoj emas atribui duoblan signifon: transitivan kaj netransitivan, al pluraj verboj, tiel ke, en la lastatempaj verkoj, la sufiksoj ig kaj iĝ daŭre malplimultiĝas (kontrolu statistike, se vi ne kredas). Kaj des pli, ke eĉ Waringhien (en la traduko de „La poemoj de Omar Kajam) skribas: „Juna herbo niajn okulojn plaĉas."

Aldone al la temo – kvankam ekster la artikolo de Golden – mi aŭdacas diri, ke same ne logika kaj ŝoka ŝajnas al mi la transitiveco (denove malgraŭ ties PIV-eco) de aliaj du verboj: „kruci" kaj „teruri", en la koncerna numero de HV (4-1983, paĝo 156).

3 – Adverbaj participoj

Laŭ mia modesta opinio Golden trafas ĝuste ĉe paragrafoj *a* kaj *c*. Male, ĉe *b*, la frazo ŝajnas al mi (kiel komentas Benczik) bone komprenebla kaj korekta (Jes, mi scias, ke eĉ tiu „korekta" estas PIV-spita).

4 – Vortordo kaj stilo

La kritikita frazkonstruo estas evidente fuŝstila (eĉ en la originalo, mi konjektas), kun pleonasma abundo de redundancaj adjektivoj kaj tordita sintakso, ĉefe pro la tipe hungara (sed ne nur hungara) kutimo sendi la subjekton ĉe la frazfinon. Kio povas foje krei agrablajn efektojn en poezio, sed efikas malplaĉe en prozo, precipe en longaj frazoj. Tiaj konstruoj aspektas almenaŭ strangaj al okcidenteŭropanoj, alkutimitaj al sintaksa konstruo: subjekto, predikato, komplementoj.

Antaŭ nelonge, ekzemple, mi ricevis de hungaro leteron kun ĉi tiu frazo: „Plaĉis al mi la de vi jam delonge kaj kompetente redaktata gazeto." Ĉe ni neniu konstruus tiun frazon tiel – ni skribus: „Plaĉis al mi la gazeto de vi..."

„La nuntempaj kadroj, la naciaj kaj internaciaj strukturoj apenaŭ kapablas harmoniigi la teoriajn kun la praktikaj metodoj. Estas fakte malfacile adapti ties rustiĝintajn mekanismojn kun la aktualaj informfluoj, kun la tendencoj de nia epoko, kiuj postulas novajn principojn kaj modelojn."

Temas ĉiukaze pri seke teoria periodo, kun ĝeneralaj, nebulaj deklaroj (tipaj de la politika kaj sindikata paroljargonoj). Tamen mia versio ŝajnas al mi almenaŭ komprenebla.

5 – Uzo de fremdaj vortoj

Mi neniam komprenis la vekriojn de tiuj ĝisekstremaj „puristoj", kiuj pretendus ke esperanto estu absolute sendifekta, integre neinfluita deekstere, ĉiusence pli perfekta ol la aliaj, jarcentojn transpertintaj, naciaj lingvoj. Ĉiam mi taksis iom naivaj kaj anakronismaj tiujn ĝisostulojn, kiuj skandaliĝas se en esperantajn tekstojn enŝoviĝas foje tipe nacilingvaj vortoj aŭ dirmanieroj, ĝenerale internacie konataj kaj ofte tute netradukeblaj (aŭ nur mise tradukeblaj). Tiu fenomeno okazas abunde en ĉiu nacia lingvo, kaj neniu ŝokiĝas pro tio. Kial ĉe ni? („Lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza", sentencis Zamenhof).

Koncerne la vortojn kritikitajn de Golden (solarium, pizzeria, bowling, windsurf), estus veŝajne eble traduki ilin per tipe esperantaj (skemismaj) kunmetaĵoj (sunumejo, piccejo (abomene!), mantena pilkludo (same!), ventsurftabulo) aŭ proponi neologismojn (solariumo, piccerio, bovlingo, vindsurfo), sed ambaŭ solvoj ŝajnas al mi monstre ridindaj kaj sendube malpli kompreneblaj ol la originaloj.

Do, resume, mi ne mortpafus la tradukiston de tiu reklamanonco.

Aldo *de' Giorgi*

PIRATA METODO

DUM 5 TAGOJ ESPERANTON

Foje okazis, ke en la ĉefurbo de iu araba lando oni devis ŝanĝi la asfalton en ĉefstrato pli ol 10 kilometrojn longa. La straton oni povis fermi nur por 24 horoj. Estis konkurso. La mono ne gravis, nur la tempo. La usona firmao kiu gajnis la konkurson kaj tiel entreprenis la laboron, havis nur solan postulon: tutan jaron prepari sin al la laboro. Konsentite! La laboro estis farita dum 23 horoj 53 minutoj.

En kelkaj numeroj de Budapeŝta Informilo kaj aliaj gazetoj jam aperis informoj pri ekspresa kurso de Esperanto. Ankaŭ Hungara Radio raportis pri tiu ĉi (onidire) stranga metodo. Dum la 68a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto ni havis la okazon prezenti 45-minutan provlecionon pri la metodo enkadre de la Tago de la Lernejo.

La celo de tiu ĉi artikolo estas doni iaspecan resumon pri la metodo kaj prezenti fragmentojn el 3-jara esplorlaboro. Kelkaj statistikaj informoj:

– 1981: 2 eksperimentaj kursoj – 198 gelernantoj
– 1982: 3 kursoj – 128 gelernantoj
– 1983: 4 kursoj – 176 gelernantoj

Detale ni raportas nur pri la lasta (9-a) rekorda kurso, kiun partoprenis 96 (!) gelernantoj, 16 instruistoj kaj 6 teknikaj laboristoj (helpantoj).

Ekde 1982 ĉiu kurso havas iun fantazian nomon: ORION, „Nebulaj Aŭroroj", „Teatra Printempo de Fiŝoj", „Komunaj Fiŝtagoj", „Piratfiŝoj en Majo".

Foje la eldona sekcio de Hungara Esperanto-Asocio iniciatis eldoni strangan lernolibron kun la titolo „Dum 30 tagoj EsperantoN." Oni sciis, ke ĝi kaŭzos grandajn diskutojn. Ĝi kaŭzis... Multaj homoj diris al la aŭtoro de la libro – kaj eĉ hodiaŭ diradas la samon kelkaj naivuloj: „Eble vi ne pensis serioze, kiam vi donis la titolon al via lernolibro, ja 30 tagoj estas tute nereala tempo." Jes, estimata samideano, Vi pravas! Por ellerni Esperanton 30 tagoj estas vere nerealaj. 30 tagoj estas tro longa tempo.

Tiel komenciĝis ĉio. Nature se oni volas instrui Esperanton dum ege mallonga tempo, oni devas uzi tute aliajn metodojn ol la kutimaj kaj oni devas labori simile al tio kiel tion faris iam la usona firmao. La unuan superintensan (piratmetodan) kurson ni preparis dum unu jaro kaj eĉ la antaŭlaboroj de la lasta daŭris 3 monatojn. La celo de tiu laboro estas fari ĉion kio estas farebla antaŭ la kurso (ekkoni la lernantojn, fari afiŝojn, horskizojn ktp); gajni la unuan batalon t.e. en la momento de la alveno kredigi al ili, ke ĉi tie ĉio okazas en ilia intereso kaj tiuj ĉi tagoj de lingvolernado estos por ili la granda aventuro en la vivo.

«Fiŝoj en la Aŭtuno»

Tio estis la nomo de la lasta superintensa lingvokurso de Esperanto okazinta en du semajnfinoj, la 4-an, 5-an, 6-an kaj 7-an kaj poste la 11-an, 12-an kaj 13-an de Novembro. Al la kurso aliĝis pli ol 100 homoj el tuta Hungario. 96 estis akceptitaj. Ĉio okazis laŭ la plano. Inter la 17.01 kaj 18.47 alvenis ĉiuj lernontoj. Surprizoj sekvis unu la alian. La unua surprizo estis tio, ke la gvidantoj tuj ekkonis la lernantojn malgraŭ tio, ke tiujn ĉi ili vidis la unuan fojon en la vivo. En la piratmetoda kurso „oni"



Antaŭ la okuloj de la kursanoj pendas afiŝoj pri kiuj temas en la prelego, kaj la nemalhavebla FIŜO kiel objekto de la koncentriĝo kaj simbolo de la kurso (Foto de Z. Fejér)

konas ne nur la nomon, sed ankaŭ la hobiojn kaj la tutan biografion de la lernanto. La aliĝilo enhavas 31 demandojn, lokon por fotoportreto kaj ĉiu aliĝanto verkas mallongan biografion kaj konceptaĵon pri fiŝo. (La aliĝilon kompilis psikologo.)

Post la kurso okazis nedeviga ekzameno, kiun partoprenis 36 lernantoj. La ekzamenanto estis Alfonz Pechán. Ĉiuj ekzamenoj estis sukcesaj. Averaĝa rezulto: 3,92. (La plej bona klasifikaĵo estas 5.)

En tiu ĉi kurso, simile al la ĝisnunaj, ni ne devigis la lernantojn ekzameniĝi, tamen ni okupiĝis pri la kontrolo de ilia lingvoscio. Dum la kurso ili skribis ege malmulte. Ilia ĉefa verko estis amletero (konceptaĵo) skribita antaŭ la fino de la kurso. Pri tradukado ili absolute ne okupiĝis. Post 8-minuta preparo la unuan traduktaskon ili faris dum la ekzameno. Tio estis metodo „naĝi en profunda akvo". Ili naĝis sufiĉe bone, kvankam la stilon oni povas ankoraŭ perfektigi. Do, per la helpo de tiaj skribaj dokumentoj ni povis kontroli kaj prezenti iliajn konojn.

Pli ol 20 procentoj havas rezulton eminentan aŭ bonegan, 40 procentoj estas kun rezulto bona kaj 30 kun meza. El 100 lernantoj 6-8 dum 5 tagoj ne atingas la novelon de sukcesa A-ekzameno. El ili 3-4 atingus tian nivelon se la kurso daŭrus ekzemple 7 tagojn kaj ĉiam restas homoj kun amaraj sentoj sed tamen ne tute sen espero. Al la kurso estis akceptitaj ĉiuj aliĝintoj en la aĝo super 15 jaroj. La plej aĝa lernanto havis 70 jarojn. El sociologia

vidpunkto la konsisto de la grupo estis ege varia kaj taŭga por la eltiro de ĝeneralaj konkludoj.

Tiu ĉi kurso estis la unua en la historio de Hungara Esperanto-Asocio, kie vidmagnetofono (kun dek kasedoj) estis uzata. La kurson karakterizis ankoraŭ la apliko de multaj novaj elementoj.

Pirata Metodo?

La aŭtomobilo estas moderna trafikilo sed tamen ne eblas veturi per ĝi dum kvin horoj ekzemple el Budapeŝto al Moskvo. Eĉ la plej bona tipo ne kapablas pri tio dum aviadilo meze bona tion ebligas tute facile. Tiu ĉi penso estis la ĉefa gvidilo por ni kiam ni decidis: kiun metodon uzi kaj kiun ne uzi.

Sugestopedio estas la genia eltrovaĵo de la bulgara profesoro Lozanov. Pri la temo aperis multaj libroj kaj artikoloj. Surbaze de tio, kion ni kolektis pri la Lozanova metodo, ni mem evoluigis nian propran sugestian sistemon. Kelkajn ideojn eble tamen valoras mencii. Laŭ la metodo de Lozanov oni instruas po 4 studhorojn tage kaj oni ne instruas gramatikon. Ni instruas po 10 studhorojn tage kaj instruas gramatikon. Profesoro Lozanov okupiĝas pri psikoterapio kaj aldone instruas lingvojn, ni instruas lingvojn kaj tio estas siaspeca psikoterapio.

Ni aplikas sugestion, kio estas tre grava parto, sed ne nur ĝi konsistigas la piratan metodon. Estas ankoraŭ aliaj partoj almenaŭ tiel same gravaj.

Estas teorio laŭ kiu lingvolernado estas procezo multe pli psikologia ol intelekta. Ĝuste pro tio ni turnas grandan atenton pri la psikaj fenomenoj dum la instruado kaj lernado. Ankaŭ la intelekta flanko havas sian lokon en nia sistemo.

La piratismon karakterizas kompleta manko de ĉio, kio memorigas pri la lernejo. Ni povus ĝin nomi kompleta kaj plena kontraŭlernejismo. Sola ekzemplo: ni ne uzas nigran tabulon. Kial?

– Ĉar ĝi memorigas pri la lernejo kaj psike estas malkonvena;

– ĉar skribi sur ĝi bezonas multe da tempo;

– ĉar la instruisto staras dorse al la lernantoj, sekve mankas kontakto kun ili;

– ĉar eĉ la plej bona instruisto ne kapablas tiel bone desegni kaj skribi kiel profesia grafikisto;

– ĉar post la klarigo la instruisto viŝas la tabulon, ĉio malaperas.

Anstataŭ la nigra tabulo ni uzas afiŝojn. Ili plie memorigas pri teatro aŭ strato ol pri lernejo. Ili estas faritaj de profesiaj grafikistoj antaŭ la kurso. Post la klarigo ili ne estas forviŝitaj sed ĉiam pendas antaŭ la okuloj de la lernantoj. La instruisto dum la tuta tempo povas vidi la lernantojn. Helpe de tiuj afiŝoj ni instruas la gramatikon de Esperanto.

Ni havis la kuraĝon fundamenti la tutan gramatikon sur la homa intelekto, t.e. sur la logiko. Ni instruas la tutan gramatikon laŭ la plej kruela gramatika metodo en nacia lingvo. Proksimume ĉi tie komenciĝas la piratismo. Enkadre de tio ni instruas la participojn dum duoble 45 minutoj kaj tiel same la vortfaradon (ĉiujn afiksojn) dum duoble 45 minutoj. Fakuloj diras, ke tio estas malbona. Ilia opinio ne gravas! Gravas la opinio de la lern-

La paŭzo daŭras 15 minutojn. La „fiŝoj" banas sin en la aŭtuna sunbrilo (Foto de Z. Fejéer)

antoj, kiuj komprenas ĉion kaj aplikas la komprenitajn regulojn. La instruado de gramatiko daŭras entute 613 minutojn. Poste ni transiras al la rekta metodo kaj komenciĝas la instruado de la vortoj. Minimume ni instruas 1000 radikojn, praktike 1700–2000 el kiuj fariĝas aktivaj 1200–1500. Dum la enkapigo de vortoj ni laboras kaj en plena grupo (de 30 ĝis 100 lernantoj) kaj en malgrandaj grupoj (po 5-12 personoj). Ĉiutage ni instruas 10 studhorojn kun 15-minutaj paŭzoj kaj 2-hora posttagmeza ripozo.

Eble necesas klarigi, ke en la kursoj ĉiam estas eksterlandaj instruistoj. Nun partoprenas en ĝi ok eksterlandaj kaj ok hungaraj geesperantistoj. Eksterlandanoj venis el Germana Demokratia Respubliko, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario. La kurson gvidis Jozefo Horváth (*Pi*loto) el Hungario, „Vicdirektoro" estis Péter András Rados (*Po*eto) – kune *PiPo* Nefumanta. Pri instruado de kantoj kaj muziko respondecis Györgyi Mézes (Cindrulino el Mirlando), muzikinstruistino. En la laboro partoprenis ankoraŭ la konstantaj membroj de la grupo, spertaj geinstruistoj, inter ili la belega Kleopatra kiu fariĝis aktorino kaj Ernesto Vespo. (Atenton! Tiuj ĉi estas pseŭdonomoj.) Ĉeestis kompreneble ankaŭ denaskaj esperantistoj, ĉar ĉe ni oni ne lernas la lingvon sed vivas en ĝi.

Novaj nomoj – novaj homoj

En la kurso neniu rajtas uzi kaj malkovri sian veran nomon kaj profesion. Ili estas sekretaj. La kursanoj havas fantazian nomon. Tiu ĉi metodo estas aplikata ankaŭ en la kursoj gvidataj laŭ la metodo de Lozanov. La unua celo de la novaj nomoj kaj profesioj estas liberigi la lernanton de la ŝarĝo de socia prestiĝo. La dua celo estas instrui la prononcon de kelkaj malfacilaj sonoj (ekz. en la angla lingvo). La tria celo – eble tiu estas nur ĉe ni – estas enŝteli la gramatikon en la kapojn. Kiel ni faras tion?

Alvenas la kursanoj kiuj ne konas unu la alian. Ekzistas natura bezono por la interkonatiĝo. Tiun ĉi bezonon ni eluzas por la enkapigo de la gramatiko kaj de certaj vortoj. Pro la novaj nomoj ili fariĝas vere pli kuraĝaj, sed tio ankoraŭ ne estas ĉio. Gravas tio, ke la nomo estu belsona, esprimu la memon de la posedanto kaj havu gramatikajn informojn. Jen estas kelkaj nomoj por ekzemplo el la lasta kurso.

– STEĈJO KUNIKLETO dresisto de leonoj;
– NATALIA BRILA gvidantino de vojaĝo ĉirkaŭtera, taksisto;
– HILDA LINDA kudristino laŭ kiu labori ne hontindas;
– RAPIDMANA BILL kiu konas Hispanan Isabelan la Belan, arbaristo;
– LUDOVIKO BRIKO havonta ventan surftabulon, lignaĵisto;
– RITA DIPLOMITA fotistino vidinta siluron de 26 kilogramoj;
– ESMERALDA ADMIRAL' diablino de sep maroj, pirato.

Paralele kun la interkonatiĝo okazas la instruado de la gramatiko. Kiel ekzemplo staras antaŭ la publiko iu(j) el la lernantoj en kies nomo enestas la koncerna gramatikaĵo.

Lernado trans la volo

Bonaj helpiloj por la analizado de la psikaj procezoj estas tiuj laboraĵoj kiujn la lernantoj skribas ĉiutage hungarlingve dum 5 minutoj en la fino de la lasta studhoro. La temo estas: Kiel mi fartas? Kio plaĉis kaj kio ne? Laŭ ili oni povas sekvi la ŝanĝiĝon de la opinioj.

En la unua tago ankoraŭ ĉio estas en ordo. La unuan periodon ĉiuj trapasas trankvile. Pro la novaĵoj kaj aro da surprizoj la kursanoj sentas nenion.

La tradicia nigra tabulo ne estas uzata. La lernantojn ĉirkaŭas barilo el afiŝoj. Tiuj pendas dum la tuta kurso en la prelegejo (salono „Zamenhof") (Foto de Z. Fejér)

Laŭ la dramaturgio oni povas alveni frue, malkonvene (ĝuste tiam...) kaj malfrue. Tio estas la idea bazo por instrui la kunmetitajn tempojn.

La dua tago estas la tago de la gramatiko. Vera tralavo de cerbo. Vespere ili interkonatiĝas kun ONT, ANT, INT formoj kaj kunmetitaj tempoj. Poste ili skribas: „Tio estas tralavo de cerbo." „Mi ne povas atenti plu." „Je la 18-a horo mia cerbo fermiĝis." „Ĉiujn kaptis la paniko." „Ĉe iu punkto oni komencas dubi pri la metodo – nun ĝuste tio okazas al mi." „Mi timas, ke mi lernas nenion." „Mi fartas kvazaŭ mi estus traknedita per Esperanto."

En la tria (transira) tago komenciĝas la ŝanĝiĝo. Ĉe kelkaj homoj ankoraŭ daŭras la prigramatika krizo, aliaj trapasas jam la duan (prileksikan). 28-jara stevardino skribas pri tio jene: „Hieraŭ posttagmeze je la 4-a horo mi sentis, ke mi estas tre elĉerpita, kaj ke mi ne povas elteni plu."

Tiu ĉi konduto estas natura. En iu periodo la homoj komencas dubi, sed ni helpas al ili venki la krizon per diversaj metodoj. La lacecon por kelka tempo forgesigas muziko, kantoj kaj bona humoro. Tiuj ĉi estas ege bezonataj ĉar la 45 minutaj studhoroj estas konstruitaj el 3-10 minutaj onoj dum kiuj ni fluigas en la kapojn multege da densigitaj informoj. La koncentriĝon helpas LA FIŜO – temo ĉirkaŭ kiu la materialo estas grupigita. Gravan rolon ludas la ĝisminuta precizeco kaj la sloganoj.

„Soldatoj, de sur la pinto de l' piramidoj vin alrigardas kvardek fieraj jarcentoj." „Vivere non est necesse, navigare necesse est." „La vojon ĝisiri, eĉ pluve sin tiri."

Tiujn vortojn la kursanoj ripetas kelkfoje en koruso. Tio refreŝigas ilin kaj la enhavo iĝas ilia propra penso. Tion pruvas eĉ laborajoj en kiuj troveblas similaj frazoj. „... mi estas tre elĉerpita, kaj ke mi ne povas elteni plu. Ĉi tiu sento baldaŭ forpasis kaj mi ekhavis novan forton." „Mi sentas teruran lacecon, sed LA VOJON ĜISIRI, EĈ PLUVE SIN TIRI." La efiko de tiuj ĉi artifikoj daŭras eĉ postkurse.

34-jara inĝeniero, patro de tri infanoj (en la kurso nomata KARLO GAŬSO, la granda rusa poeto) la ŝanĝiĝon priskribas tiel: „La abismo ĉe kies rando mi staris laŭ nekomprenebla maniero ŝanĝiĝis. La transan bordon hieraŭ mi ne vidis. Hodiaŭ, komencinte la salton – ŝajnas al mi – mi vidas la transan bordon. Eble la bordoj proksimiĝis iom unu al la alia, kvankam mi estas ankoraŭ fluganta en la aero. (Fluganta, sed ne falanta! Do, la „fiŝo" ekparolis. Hodiaŭ mi denove rigardis la vidkasedojn. Hieraŭ mi komprenis nur unu procenton. Hodiaŭ tio estas jam okdek. Mi esperas, ke ĉio iros tiel plu."

Dank' al ĉio ĉi post la tria tago jam ne estas aliaj krizoj. La tuttaga laboro transformas la homojn. En la fino preskaŭ ĉiu havas kontraŭan opinion rilate al tiu de la komenco. La malesperiĝinta stevardino skribis nur tiom: „Mi sentas, ke mia lingvoscio evoluis." Aliaj, iom pli energiaj tipoj skribas jene: „Mi tre fidas vian metodon ĉar dum 4 tagoj vi faris al mi miraklon. Antaŭ la kurso mi konis nur kelkajn vortojn, kaj en la fino mi parolis eĉ ne malbone."

Tiu ĉi laboro estas farata kaj ankaŭ la artikolo estas skribita kiel respondo al la demando: Ĉu oni rajtas instrui Esperanton tiel same kiel oni faras tion pri aliaj lingvoj? Ni elpensis novan teknologion por la rapida instruado kaj lernado de Esperanto, ĉar ni ofte aŭdas: „Mi ne havas emon lerni Esperanton ĉar iu el miaj amikinoj jam tri jarojn lernas ĝin." Laŭ nia opinio oni devas ne prediki pri la facileco kaj rapida ellerno de Esperanto sed oni devas pruvi tion en la praktiko.

Jozefo *Horváth* – Péter András *Rados*

Paĝo de originala poezio

Zora Heide

Al mia patro

Sur la sceno de la vivodramo
sepdekjaroj glore vin brakumas
en la rolo de bonkora homo
vi fariĝis ŝatata aktoro

Antaŭ vi ekran' de l' pasinto
flusas kvazaŭ tajdo de l' fato
post vagado sur vojoj cirkvitaj
vin invitas cirklo rememora

Florar' printempa burĝonoj sopiraj
varmeca somero laboroj martiraj
abunda aŭtun' rikolta trezor'
riĉa ornamo por vintra dekor'
interne de l' cirklo kolora

Fiera estu pro omaĝoj oftaj
benataj estu doloroj adoptaj
de ter' ĉagrenuloj
kredante naive al ĉies sincero
vivante kun firma espero
ke harmonie plena
cirkulos tera globo

Imre Szabó

Tero de Promesoj

Tra la ŝvito aperis
fine la Tero de Promesoj
ĝis ŝvebis lante
(kvar nuboj tenis ĝin,
kvar anĝeloj gardis ĝin,
kvar sunoj fekundigis ĝin.)
falis guto da pluvo
ni ĉiuj
rigardis lian manon
tie ruĝis la guto
meze kun najlo.

Eli Urbanová

Saliko

Rapide pasis temp' de rozoj.
Kaj ree ravas min saliko;
tipa kroneg' precipe supre
komencas kolorigi kupre
kvazaŭ sub tuŝo de peniko.
Arbo videbla de surkaje;
saliko kun sennombraj branĉoj,
de kiuj pendas longaj franĝoj
melankolie kaj malgaje.
Ĝia ĉi-jare lasta ĉarmo;
saliko en modera suno
karakteriza por aŭtuno,
ĉe akvo pura kiel larmo.
Saliko estas mi, saliko;
iom kaduka, iom verda,
jam rezignanta, mi plu perdas
la foliaron... Aĥ, amiko!
Rapide pasis temp' de rozoj.

Carmel Mallia

Nigra ĉevalo
Ĉu ne sufiĉe suferas
la homaro?
Eĉ malsana, preferas
la korpo morti;
satiĝas ĝia agonimurmuro
dum hermite kantas
la haven-lumturo.

*

Griza ĉevalo
lasta dancada ritmo
ĉirkaŭ la mondoĉerko.
Ve, se de l'Altul' l'artverko
krevas porĉiame!
Sed ja krevenda ĉio
finaldrame!

Aldo de' Giorgi

Gepatraj turmentoj

Niaj turmentoj nunaj
estas
por tiu morgaŭo via,
filino mia, kiam,
en aĝo, ne plu verda,
vi reinventarios
vian vivkaruselon
kaj ĉirkaŭ via menso ŝvebos
amikoj senkonturaj
kaj svaga historio.

Verŝajne via memoro
kelkajn momentojn revizitos
en iamaj kalendaroj;
vi pridemandos mute
la stelojn aŭ la nubojn,
kie fantomos eble
l' imagoj forgesitaj
de la gepatroj viaj.

Vi rememoros dise-mise
la forfetitan tempon:
niajn predikajn grumblojn,
la nekomprenojn, la ribelojn,
vian forfuĝan emon.

Lante, saŭdade,
longiĝos en la manoj
la rozario...
Ŝajnos al vi, ke, ja,
finfine vi nin amis sed:
kiomaj mistrafoj reciprokaj!

Ĉi tie, en la hejmo,
vakis la seĝo via
preskaŭ ĉiam.
Kaj ni, ni vin atendis
kun kor' batanta
kaj silentis.

Niaj turmentoj nunaj
estas
por tiu morgaŭo via,
filino nia, kiam,
estante mem patrino,
vi tiros la bridilojn
de via inta vivo...
fantomos ĉirkaŭ vi
ombroj en paradizo.

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

11. ESPERANTISTOJ KONTRAŬ LA FAŜISMO

La pasinto de la Esperanto-movado abundas je humanismaj, demokrataj, laboristmovadaj tradicioj. Tiujn tradiciojn karakterizas – memkomprenebleco – ankaŭ la *internacieco*, kiun oni malofte mencias, nur pro la evidenteco.

En la jardekoj inter la mondmilitoj en pli kaj pli multaj landoj faŝistaj fortoj ekminacis, kaj landon post lando ili eĉ akaparis la potencon. Tial en la dudekaj-tridekaj jaroj la sociapolitika medio fariĝis malfavora, eĉ malamika kontraŭ la Esperanto-movado. La faŝisma potenco – estante kontraŭhoma, militisma, kontraŭdemokrata, kaj ne malpli *naciisma* – neeviteble fariĝis malamiko de la esperantistoj.

El inter la Esperanto-organizaĵoj speciale la laboristaj entreprenis aktivan kontraŭfaŝisman agadon, ja ili havis duoblan ligitecon: ili estis parto kaj de la laborista, kaj de la internacilingva movadoj.

Landon post lando

Antaŭ kvindek jaroj, en 1933 en *Germanio* komenciĝis la definitiva disbato de la laborista Esperanto-movado. *La unuaj viktimoj* estis la komunisttendenca Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj la socialdemokrata Socialista Esperanto-Asocio. La faŝistoj same likvidis ankaŭ la internacian organizaĵon Internacio de Proletaj Esperantistoj, kies sidejo estis en Berlino, kune kun ĝia organo „Internaciisto". kaj la eldonejon EKRELO. Ĉio ĉi okazis en marto de 1933, tuj post la provoka bruligo de la imperia parlamentejo (Reichstag). La frakaso de la menciitaj asocioj koncernis tri kvaronojn de la germana esperantistaro. Multaj el ili mortis en la fifamaj koncentrejoj. Kaj post la solidiĝo de la faŝisma potenco ankaŭ la neŭtrala Germana Esperanto-Asocio ne evitis sian sorton: oni likvidis ĝin en 1936.

La alia internacia organizaĵo, la socialdemokrat-tendenca *Internacio de Socialistaj Esperantistoj*, fondiĝis kelkajn monatojn post la tragikaj Germaniaj eventoj, en junio de 1933, en la Laborista Hejmo de Floridsdorf, laborista kvartalo en Vieno. Sed ĝi ne transvivis eĉ unu jaron, kiam en

Rankoviĉ Anĝa (1909-1942)

Aŭstrio la aŭstrofaŝista registaro kaptis la okazon de la t.n. „Schutzbundribelo" en februaro de 1934, kaj malpermesis ĉiuspecan laboristan organizaĵon. La faŝistoj per kanonoj bombardis la laboristajn kvartalojn de Vieno. Tiel ili ruinigis i.a. ankaŭ la Laboristan Hejmon de Floridsdorf, konatan kunvenejon de la *Aŭstria Laborista Ligo Esperantista*, kies gvidantoj fuĝis en Ĉeĥoslovakion. Inter ili estis ankaŭ *Franz Jonas*, kiu en la sesdekajsepdekaj jaroj estis la prezidento de Aŭstrio.

Dum tiuj februaraj tagoj en la najbara *Hungario* la centro, la gvidantoj de la *Hungaria Esperantista Societo Laborista* jam fuĝis en kaŝlokon. Sed la polico surprizatakis kaj arestis ilin. La organizaĵon jure oni malpermesis en aprilo, kaj konfiskis ĉiujn ĝiajn havaĵojn.

Samtempe komenciĝis la severaj persekutoj kontraŭ la *Japana Proleta-Esperantista Unio*. Komenciĝis arestoj, kaj preskaŭ ĉiu grupo estis „elradikigita kaj forsarkita". Multaj suferis en malliberejo, aliaj devis punlabori, kaj kelkaj eĉ mortis dum la malliberigo, aŭ post la liberiĝo, pro la torturoj travivitaj.

Monaton post la malpermeso en Hungario, en majo de 1934 venkis la monarkofaŝista puĉo en *Bulgario*. La nova, militista-faŝista registaro tuj poste malpermesis la *Bulgaran Laboristan Esperanto-Asocion*. Dum la posta jaro oni arestis kaj kondamnis je malliberejo vicon da aktivuloj, kiuj kaŝe

daŭrigis sian agadon en pluraj urboj.

En la postaj jaroj oni malpermesis la *polan*, la *latvan* kaj aliajn laboristajn Esperanto-asociojn. En 1936 estis fermitaj ĉiuj – ankaŭ la neŭtralaj – Esperanto-asocioj de *Portugalio*. En la najbara *Hispanio* preskaŭ ĉiuj esperantistoj estis respublikanaj. La respondo de la faŝistoj: en la urbo Córdoba ili mortpafis la tutan membraron de la Esperanto-grupo. Multaj esperantistoj per armiloj batalis por la respubliko, i.a. la prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio, *Julio Mangada-Rosenörn*, generalo. Multaj esperantistoj batalis kaj falis en la vicoj de la Internaciaj Brigadoj. Post la hispana civilmilito ankaŭ la esperantistajn brigadanojn oni fermis en sudfranciajn koncentrejojn. Tie, en Gurs, 64 el ili verkis faman pamfleton, en kiu ili defendis la kontraŭfaŝisman spiriton kontraŭ la estraro de jam degenerinta SAT-movado.

Post la faŝista anekso de *Aŭstrio* en 1938 oni dissolvis ankaŭ la tieajn neŭtralajn Esperanto-organizaĵojn, kaj fermis la Internacian Esperanto-Muzeon. Kelkaj kuraĝuloj kaŝe daŭrigis la poresperantan agadon, kelkajn el ili oni arestis. Inter ili estis *Gustav Weber*, kiun oni transportis en Mauthasenon. Post teruraj suferoj kaj en mensa perturbiĝo li devis fosi amastombojn por kadavroj, kiujn la kremaciejoj jam ne plu sukcesis bruligi. Foje SS-gardisto deprenis el liaj manoj la pezan ŝovelilon kaj frapis lin ĝis la morto. Tio okazis du semajnojn antaŭ la liberiĝo de tiu koncentrejo.

En *Pollando* en 1939, kelkajn tagojn post la okupo de Varsovio, laŭ speciala ordono el Berlino oni arestis gefilojn de Zamenhof: *Adam, Zofia kaj Lidja*. Ĉiuj pereis en la faŝistaj koncentrejoj, kune kun miloj da judaj kaj nejudaj polaj esperantistoj.

En *Bulgario* la esperantistoj jam inter la unuaj partoprenis la perarmilan kontraŭfaŝistan rezistadon en 1941-1944. Ili estis en la batalgrupoj, en la partizanaj taĉmentoj kaj aliloke, kaj multaj el ili oferis sian vivon. La bulgara movado notas 202 *esperantistajn martirojn*, el tiu kruela etapo. Inter la viktimoj estis ankaŭ la ekssekretario de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio, *Nikola Ŝopov*. Li estis membro de batalgrupo, denuncita kaj pendumita en la malliberejo en 1941.

En *Jugoslavio* tuj post la germana okupado en 1941 la kroataj faŝistoj detruante invadis la ejojn de la Esperanto-organizaĵoj kaj arestis la aktivulojn. Sed disvolviĝis la popol-leviĝo kontraŭ la faŝistaj okupantoj kaj iliaj lakeoj, kaj la esperantistoj fidelis al siaj humanismaj kaj internaciismaj tradicioj ĝis la lasta konsekvenco: ili aliĝis al la partizana armeo aŭ alimaniere rezistis. La jugoslava movado notas *340 esperantistojn, falintajn dum la naciliberiga milito*. Tridek sep el ili ricevis la plej altan nacian distingon *„popola heroo"*, ekz. *Ivo-Lola Ribar*, proksima kunlaboranto de Josip Broz Tito.

* * *



Nikola Šopov, ekzekutita en 1941

La faŝismo falis kaj alvenis la tagoj de la libera esperantista agado. Ne okazis vane la klopodoj kaj batalo de niaj pereintaj martiroj, herooj.

Honoron al ili!

Ivo-Lola Ribar (1916-1944)

Szilárd Bálint

SERVOFARO DE EVA

Karlo kaj Stefano, du rompŝtelistoj sukcesis eskapi el la malliberejo. Ili trasegis la kradon de la fenestro, kaj pere de kunligitaj litotukoj ili malsupren grimpis al la tero. Tutan tagon ili marŝis en pinarbaro, vadis tra marĉetoj, post kiuj sekaj muskoj lacigis iliajn enpremiĝintajn piedojn. La varmego estis sufoka, ie-tie svarmis muŝoj kaj dissaltantaj lokustoj super la oste seka herbaro velkinta pro la sunvarmo. Tamen ili senhalte, ĉar malkviete, rapidis antaŭen.

Tamen iam ili devis ekripozi malantaŭ densaj arbustoj sub betuloj. La prizona uniformo algluiĝis sur la korpon de la rifuĝantoj pro la ŝvito, kaj ne mirinde, ke atingante lageton ili ĝuis kun plezuro la banon, antaŭe ne tro preferitan, kaj avide trinkis el la apenaŭ pura akvo. La krepusko jam vualis per densa bluo la arbaron, ekbrilis la unuaj steloj, kaj post nelonga tempo la ege lacaj rifuĝantoj endormiĝis.

Frumatene varmetaj gutoj falis desur la arboj kaj vekis ilin. Laŭta birdokviko salutis la aŭroron. Niaj herooj trovis okzalon kaj fungojn por satigi siajn postulemajn stomakojn.

– Kion fari nun? – demandis Stefano.

– Ni ripozu iomete por kolekti forton, ja, la policanoj tutcerte jam perdis niajn piedsignojn ĉe la marĉo...

Ĝuste tiumomente helikoptero zumis sur la lazura ĉielo, kaj ili tuj kaŝis sin sub la arbustojn. Ili serĉas nin! – diris Karlo – ni devas akiri civilan veston urĝe!

Ili ekiris malsupren al la valo, kie buntaj bovinoj paŝtiĝis. Alpa ligna domo estis videbla sur la deklivo inter pinarboj, kaj alproksimiĝinte ili rimarkis, ke tiu ne estas loĝata. Sur la pordo de la ĉasdomo pendis slipo kun la teksto: „Mi foriris al la urbo, posttagmeze mi revenos – la zorganto."

Penetri en la domon – estis kiel infanludo por la rompŝtelistoj. La prizonvestoj baldaŭ forbrulis en la kameno. Troviĝis civilaj vestoj kaj abunde da manĝaĵo – ĉio kontentigis la duopon, kiuj zorge reŝlosis malantaŭ si la pordon, kiam ili ekiris supren al la monto. Desupre ili ekvidis proksime fervojlinion, kiun ŝancon ili ne volis preterlasi, kaj tial descendis ĝis la reloj. Post horo ili jam saltis sur la lastan vagonon de la malrapida ŝarĝtrajno – fine venis la momento por ĝoje ridegi!

Vespere ili frapis en la proksima urbo la pordon de konatoj, multfoje punitaj personoj, tie loĝis ankaŭ la patrino de Stefano. Kiam ili rakontis kiel okazis la fuĝo, Stefano eĉ ne rimarkis, ke la granda manplato de la patrino eksvingas por forte klaki sur lia vizaĝo. Tre bone ŝi sciis, kiel survangi iun, ja ŝi ne malofte interbatadis en drinkejo. Do, ĉi-momente ŝi enmetis en la baton sian plenan forton, tamen la konsterniĝo de Stefano estis eĉ pli granda ol la forta doloro.

– Forportu vin! – kriis la patrino, kaj la du fuĝantoj rapide malaperis en la nigra nokto.

* *

En la deĵorejo de la polico sonoris la telefono: – Ĉi tie la direktoro de la arestejo... du malliberuloj fuĝis, venu tuj!

Post kelkaj minutoj la alarmaŭto kun laŭta sirenmuĝo rapidis al la malliberejo. Du kriminalistoj kunportis famajn polichundojn. La spuroj estis freŝaj, do la hundoj ekscitite tiris la rimetojn tenantajn policistojn tra la densa arbaro. Vespere la hundoj perdis ĉiun spuron ĉe la marĉeto, oni do reiris senrezulte antaŭ la nokto. Matene helikoptero krozis dum horoj tie, sed vane. Posttagmeze venis la anonco, ke malgraŭ la ŝajne netuŝita pordo, en la ĉasdomo estis renversitaj aĵoj, kaj mankas du civilaj vestoj.

La detektivoj tuj rapidis al la ĉasdomo, kie la hundoj retrovis spurojn, kiuj kondukis ĝis la reloj, sed tie ili malaperis. Estis facile supozi, ke la krimuloj grimpis sur iun vagonaron, per kiu ili povis forvojaĝi, sed al kiu direkto?

Oni serĉis ilin en loĝejoj de la konataj kunkulpuloj. Tion ne evitis ankaŭ la loĝejo de la patrino de Stefano, tamen ŝi kolere protestis: Kial vi ne gardas pli bone mian filon en la malliberejo – ŝi grumblis – nenion mi scias pri li! Jen, venas senbezone eĉ du detektivoj! Tial dungas la polico superfluajn salajrulojn, jen... – kaj tiel plu ŝi ĵetadis la vortojn.

Kiam la detektivoj raportis al la policestro pri la senrezulta serĉado, la ridetanta leŭtenantino Eva turnis sin al la kapitano:

– Mi insiste petas, bonvolu komisii min pri tiu afero! Dum unu semajno mi certe kaptos ilin.

La kapitano surprizite aŭskultis ŝin. Post iom da hezitado li tamen eligis: – Estu do... eklaboru tiucele!

* *

Kara Leganto! Mankas la fino de la historio: kiamaniere plenumis la surprenitan taskon la juna policistino

Eva? La redakcio petas vian helpon por fini la historion – per ne pli ol 30 tajpitaj linioj. La plej bone solvanto ricevos libropremion kaj la teksto aperos en H.V. Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi numero.

Daŭrigo

de la novelo „La ovo de Kolumbo"
aperinta en la n-ro 1983/1. Ĝia aŭtoro estas Maria Kovács, Budapeŝto.

Laŭ la verdikto la ovoj estas naturaj „sekvaĵoj" de la kokinoj. Sekve la ovoj apartenas al la posedanto de la kokinoj, t.e. al la viandofabriko. Ja, laŭ la kutimo, la aĉetanto transprenas la varon ĉe la vendanto. La viandofabriko siavice ne havas la rajton rezigni pri la ovoj, ĉar ili iĝis *kooperativa* posedaĵo, kies suma valoro – dum jaroj ĉiutage 50-60 ovoj! – ne estas tiel bagatela, ke la anoj de la kooperativo unuanime neglektus ĝin! Sekve la edzino ŝtelis; tamen tion malgravigas, ke ŝi savis valoron disde neniiĝo. Cetere, tio montras al la respondecon de la fabrika estraro, ĉar certe ne ĉiuj ovoj rompiĝas dum la transportado. Tiel ricevis solvon ankaŭ la demando 3.)

Pri la demando 2.) la verdikto atentigis, ke pro la ne-protesto kontraŭ la ŝtelado ĝenerale ne ekzistis kulpiga paragrafo. Alivorte, nek la najbarino, nek aliulo estas leĝe devigataj denunci tiun ŝteladon. Kompreneble la ŝoforo – kiel edzo – eĉ malpli devas denunci sian edzinon. Do nek la najbarino, nek la ŝoforo estas kunkulpuloj, sekve ili ne ricevas punon. Kaŭze de la plurspecaj konataj cirkonstancoj (inter ili estas la neglektema konduto de la viandofabriko) la tribunalo povas kiel eble malpliigi la punon pro la kontinua ŝtelado: la ĝis nun senpuna Maria Mózes ricevis „tribunalan admonon", anstataŭ pli severa puno.

Krome, la tribunalo admonis la viandofabrikon por estonte serioze prizorgi kaj kontroli la ovo-transportadon.

Majstro de grandaj violonistoj

Dum la 19-a jarcento abundis grandaj muzikistoj en Hungario, talentuloj, kiuj grave influis la muzikan vivon de la mondo. Ni rememoris jam kelkajn el tiuj elstaruloj; nun ni konatiĝos kun la fama fondinto de la hungara violonskolo, en kiu daŭre edukiĝas – ne nur hungaraj – famiĝintaj artistoj.

Jenő *Hubay* estis vera infano de la 19-a jarcento, kaj li tre rapide atingis la suprojn de sia arto. Naskiĝinta en la jaro 1858 en familio de bona violonisto, li baldaŭ montris eksterordinaran muzikan kapablon, kiun komence flegis mem la patro. Li estis nur 9-jara, kiam antaŭ publiko li jam prezentis la orkestran violonkoncerton de *Viotti*. Post kelkaj jaroj la juna talentulo – ankoraŭ nur 13-jara. – lernis jam ĉe la tiam plej rekonita majstro, József *Joachim*. Tiu famega hungara artisto, amiko de Ferenc *Liszt*, tiutempe havis en Berlino artisto-lernejon. Tie kolektiĝis el la tuta Eŭropo multaj poste famiĝintaj junaj talentuloj. Kvar jaroj estis sufiĉaj tie por Hubay, kiu post tiuj studoj revenis al Budapeŝto. Sekvis multaj grandsukcesaj koncertoj, plurfoje ankaŭ kun Liszt, kiu alte taksis la kapablojn de la junulo.

Kiam Liszt rekomendis al siaj Parizaj amikoj la junan violoniston, tiuj organizis por la 20-jara Hubay seriojn da koncertoj tra Francio, Belgio, Nederlando. Plena rekono kaj granda honoro akceptis lin dum la longaj koncert-vojaĝoj. La tiel akiritaj famo kaj respekto kulminis, kiam oni invitis lin esti profesoro de la Brusela muzika altlernejo.

La internacia famo de la hungara violonisto instigis la hungaran ministron pri kulturo inviti lin en 1886 al la Budapeŝta Muzika Akademio, por plenumi tie la edukadon de novaj violonistoj. Antaŭ ol akcepti tiun postenon, Hubay insiste proponis inviti ankaŭ David *Popper*, la elstaran violonĉeliston, kiu same estis eksterlande koncertanta hungara artisto. Tiel ankaŭ la alia grava kordinstrumento ricevis eminentan prizorganton en Budapeŝto.

Hubay plene reorganizis la instruadon de la violonistoj. Li enkondukis proprajn reform-metodojn, kiuj postulis kaj helpis akiri la plej virtuozan teknikon ĉe la junaj violonistoj, samtempe altgrade artan esprimadon de la muzikverkoj. Kiel unu el la plej grandaj virtuozoj de sia epoko, li mem donis eminentajn ekzemplojn por siaj disĉiploj kiel profundiĝi en la artaj detaloj de la muzikpecoj. Multaj komponistoj petis lin unuafoje prezenti la novajn komponaĵojn, ankaŭ *Brahms* – kiu plurfoje koncertis en Budapeŝto – konfidis al la kvarteto de Hubay kaj Popper prezenti siajn kvartet-pecojn en la Eŭropaj-koncertejoj.

La *Hubay-metodo* de la violoninstruado akiris altan rangon en la muzika mondo. De Aŭstrio ĝis Ameriko estas listigeblaj la landoj, de kie venis al Hubay la plej talentaj junaj violonistoj por atingi la plej altajn gradojn en la arto. Inter la plej famaj artistoj Stefi Geyer, József Szigeti, Emil Telmányi, Erna Rubinstein, Ede Zathurecky devenis el lia skolo. Mem Hubay estis ofte invitita instrui en eksterlandaj altlernejoj, en Ĝenevo, Londono kaj aliloke – sed li rifuzis tiujn proponojn kaj restis en Budapeŝto, kie post 1919 li iĝis la direktoro de la Muzika Akademio.

Inter liaj pli ol cent *komponaĵoj* troviĝas violon-koncertoj, simfonioj, „ĉardo-scenoj", el kiuj pluraj restis tre ŝatataj pecoj inter la grandaj violonistoj. El liaj *ok operoj* iĝis tutmonde la plej konata – prezentita en pli ol 70 operejoj – „La violonisto de Cremona". Ties daŭraj sukcesoj tra la tuta mondo igis tre feliĉa la maljunan majstron, samkiel la artisto-karieroj de liaj plej famaj disĉiploj. Li mortis en 1937, post longa, sukcesplena laborema vivo.

István *László*

PANORAMO



La Festivala Orkestro

L. Bernstein ĉe János Kádár

Budapeŝta Printempa Festivalo

Inter la 16-a kaj 25-a de marto 1984 la kvaran fojon la Hungara Turisma Oficejo aranĝos en la hungara ĉefurbo la Budapeŝtan Printempan Festivalon. Tiu ĉi Festivalo dum la pasintaj jaroj atingis grandan popularecon: la diversajn kulturajn aranĝojn, okazigitajn enkadre de la Festivalo, en 1981 vizitis 110 000 personoj, en 1982 300 000 personoj, kaj en la pasinta jaro ili altiris 500 000 vizitantojn.

Kiel niaj legantoj certe scias, en 1982 kaj 1983 enkadre de la Festivalo okazis ankaŭ Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Bedaŭrinde, ĉijare tiu ĉi aranĝo ne eniris la festivalan programon, sed la organizantoj promesis, ke venontjare la esperantistaj teatroamantoj denove povos aplaŭdi al Esperantaj teatraj prezentadoj en Budapeŝto.

El la plej elstaraj hungaraj muzikistoj fondiĝis ankaŭ aparta – kvankam ne konstanta – Festivala Orkestro, sub la gvidado de la elstara hungara kapelestro Iván *Fischer.* Tiu ĉi orkestro signife kontribuos al la altigo de la nivelo de la festivalaj muzikaj aranĝoj.

Kiel dum la lastaj jaroj, ankaŭ ĉijare dum la Festivalo okazos ekspozicio sub la titolo *Vojaĝo '84.* En tiu ĉi ekspozicio – kiel ĝis nun ĉiam – havos standon ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio.

Bernstein en Budapeŝto

En novembro de 1983 vizitis Budapeŝton Leonard *Bernstein,* mondfama komponisto, kapelestro kaj muzikpedagogo. Lia koncerto en la Budapeŝta Teatro „Erkel" estis dissendita ankaŭ per televido – oni povas diri, ke tiu ĉi koncerto estis la ĉefa muzika evento en nia lando dum la pasinta jaro. La mondfaman muzikiston akceptis ankaŭ János *Kádár,* la unua sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio.

PANORAMO



Pacdemonstracio antaŭ la Parlamentejo

La 20-an de septembro 1983 ĉirkaŭ 50 000 hungaraj gejunuloj faris pacdemonstracion en Budapeŝto antaŭ la Parlamentejo. La gejunuloj protestis kontraŭ la lokigo de mezdistancaj raketoj en Okcidenta Eŭropo. La demonstracio okazis vespere, kun torĉoj, kaj tiamaniere ĝi tre efike altiris la atenton de ĉiuj Budapeŝtanoj, kiuj, kompreneble estas solidaraj kun la deziroj de la junularo vivi en paco. La reprezentantoj de la demonstracio transdonis al Antal *Apró*, la prezidanto de la Hungara Parlamento pacmemorandon, subskribitan de 2 milionoj 500 mil hungaraj gejunuloj.



Dum la vespera pacdemonstracio Antal Apró transprenas la pacpostulajn subskribojn

George Bush kaj György Lázár

Hungaraj-usonaj intertraktoj

George *Bush*, la vicprezidento de Usono aŭtune de la pasinta jaro vizitis Budapeŝton kaj havis intertraktojn kun la gvidantoj de la Hungara Popolrespubliko. La centra temo de la intertraktoj estis la hungaraj-usonaj rilatoj, precipe la ebloj de la amplekso de la ekonomia kunlaborado inter la du landoj, sed estis pritraktitaj ankaŭ la ĉefaj problemoj de la internacia politika vivo. Dum la sama tempo okazis intertraktoj ankaŭ en Vaŝingtono: tie renkontiĝis la du ministroj pri eksteraj rilatoj, George *Schulz* kaj d-ro Péter *Várkonyi*.



Aliĝo al internaciaj organizaĵoj

Ekde la 1-a de januaro 1984 la hungara ŝtata flugkompanio MALÉV aliĝis al IATA, la internacia organizaĵo de flugkompanioj. MALÉV estas la 125-a membro de tiu ĉi grava internacia organizaĵo.

Lastatempe Hungario aliĝis al pluraj internaciaj organizaĵoj, interalie al la Internacia Mona Fonduso, la Internacia Banko por Rekonstruo kaj Evoluigo („Monda Banko") kaj al Interpol.

METALLOGLOBUS

Informas la servo por klientoj.

Budapest XIII. Dózsa György út 57.
Telefono: 401-321

La varoj aĉeteblas:

Budapest XIII. Pozsonyi út 25.
Telefono: 127-688, 123-071

Al konstruigantoj kaj riparigantoj de loĝejoj por instali endomajn akvokondukilojn METALLOGLOBUS rekomendas premtubojn kaj kunligajn interorganojn el Poliviniklorido (PVC)

Por kunigi tubojn pere de interorganoj oni uzas gluaĵon, aŭ, por alfiksi ilin al la tradiciaj metaltuboj, oni uzas la tiucele kreitajn ŝraŭbumajn tubjuntilojn.

REVUO DE REVUOJ

Denove ek! – post la paŭzo pro la kongresaj raportindaĵoj, kiuj estis feliĉe multaj kaj indaj, do provizore konsumis niajn paĝojn. La revuantaj notoj amasiĝis en la tirkesto, grandparte ili eĉ velkos tie, ne ricevonte presinkon. Ĉu bedaŭri tiun papersorton? Laŭ miaj duonjarcentaj spertoj ne E-ujo certaj temoj ripete reviviĝas, samkiel ree floras ĉiujare kampoj – malgraŭ plukado...

Tia eterna temo estas la facileco de Eo. La nuna diskuto en ESPERANTA FINNLANDO (3-4) turnis sin nun al la facileco de la *angla.* Tio estas ja evidenta, ĉu ne – por ĝia denaska parolanto. Prave almontras *J. Jäntti* al la logika, la pensadon sekvanta kaj per gramatikaĵoj ĝin *malkaŝe prezentanta* esprimado de Eo, kaj aliflanke al la kaprompiloj de naciaj lingvoj. Tiuj klaraj gramatikaj indikiloj faras ja Eon agrable manipulebla kaj ĉiurilate klara. Certe, oni devas ilin „bedaŭrinde" lerni, dum parolo prononci, kaj ne erarige engluti (kion la angla iagrade permesas). La lingva facileco – ne forgesu! – dependas ankaŭ de la fonetiko, kompreneblo, ortografio, krom aliaj faktoroj.

Al tio trudas sin la nekutima vidpunkto de *István Nemere* en MONATO (10), kiu konsideras la disvastiĝon de la angla en kelkaj terenoj *nur ŝajna.* Inter aliaj pro tio, ke pro konataj demografiaj kaŭzoj en la mondo la angle parolantaj popoloj *proporcie malpliiĝas.* Nu, tiu dedukto verŝajne neniun fortimigos lerni la anglan por siaj celoj. La allogajn bildraportojn pri hundoj oni espereble daŭrigos en la revuo (laste pri la savantoj el lavangoj).

„Manifestacii, jes aŭ ne? ? " Per tiu alvoka titolo kaj la sekva sincertona diskuto invitis KOMUNA E-GAZETO (10) la esperantistojn al la oktobra pacmanifestacio en Hago. La vid- kaj starpunktoj de viroj kaj virinoj el diversaj tavoloj fine kulminis per JES – „ĉar esperantistoj strebas al paca socio! " Tiel devas esti! Fabrikistoj kaj negocistoj de multekostaj armiloj strebas enkapigi al multaj la „tolereblon" de la nuklea milito, kaj tiun fi-ideon ili kamuflas per kriegoj pri minacanta atako flanke de la kapitalismon forĵetintaj landoj (kiuj jam terurege suferis pro la mondmilitoj). Domaĝe, troviĝas ankaŭ inter esperantistoj nebulaj kapoj, kiujn infektis la kriegoj de la militinstigantoj – mem subtenantaj en tri kontinentoj tiranajn, eĉ rasismajn reĝimojn. Iliaj Esperantlingvaj frazoj aperas foje en iuj gazetoj. Indas tion mencii, ankaŭ por forpreni naivajn iluziojn pri la pacemo de „ĉiuj" esperantistoj.

El movada vidpunkto mi opinias tute nova maniero la analizan artikolon de Detlev Blanke en DER ESPERANTIST (1): „12 rimarkoj pri la hungara movado". Mian komenton motivas ne ĉar temas pri hungara afero, sed ĉar ĝi pioniras al konciza (tamen sufiĉe detala) karakterizado de landaj movadoj. Trafas, eĉ se la aŭtoro – eksterlande – ne provis, eble ne povis, al la 12 punktoj aldoni ekzemple forigendajn mankojn de la movado. La klara distingo inter la trajtoj de la hungara movado, la precizema analizado, faras tiun „ĝenron" aparte utila, imitinda ankaŭ por aliaj landaj movadoj. La loko tie ĉi ne permesas konigi ĝin pli amplekse; mi citas nur ĝian bazan aserton: „La hungara movado havas unikan profilon, kiu distingiĝas per originaleco kaj multflankeco." Studindaj 12 punktoj ankaŭ por hungaroj!

Giganta, rekorda – modelo kaj inspiro – etoso kiu eniras la historion; tiaj kaj similaj epitetoj akompanas la 68an Kongreson tra nia gazetaro de Kanado ĝis Ĉinio. La raportintoj nun neniel troigis, la Kongreso ĉiurilate kunportis grandiozajn dimensiojn, kiuj povas paroli por si mem, sen memflato antaŭ neesperantistoj. Inter ni eblis mencii rimarkojn, rimarketojn; kelkfoje la enlande kutiman mankon de orientado, alifoje ĝenajn ŝtupargrimpadojn, vicojn de Epoŝtmark-aĉetantoj (ĉu tio ne estas evitebla en UK-oj?), multajn miremajn „krokodilojn", malkapablajn eldiri E-ajn vortojn – kaj mi jam atingis la finon de tiu vico, prenita el la gazetaro. ESPERANTO (sept-okt.) substrekis la harmonian kaj senmankan neŭtralecon, ekzistantan dum la UK; HEROLDO (10-11) ne malpli entuziasme rimarkis, ke la ekstera eĥo – en Budapeŝto kaj en la mondo – atingis senprecedencan intensecon. „Ne nur Kongreso, sed ankaŭ Teatra Festivalo" – asertis tiu gazeto akorde kun aliaj. Vere, la multaj artaj programeroj – ankaŭ en Debrecen ĉe la junuloj – akiris grandan atenton en nia vasta gazetaro. Kaj kiel kutime okazas ĉiefoje, la kritikoj kolizias inter si pri certaj prezentaĵoj aŭ rolantoj. Tute en ordo, sed la „diversa nivelo" estis tuj rimarkebla ankaŭ inter ili – kvankam tio certe ne rilatas al la du menciitaj internaciaj gazetoj.

Mezmara Stelo (2-3) informis pri la sukcesinta publika propagando en Malto, okaze de la forveturo de la tiea kongresa karavano (kiu trovis historiajn paralelojn dum kongresa ekskurso al Eger, iam same sieĝita de... turkoj. Aliaj gazetoj trovis aliajn paralelojn, rimarki necesajn interesaĵojn. Sed ili plene *konsentis* pri la ĝenerale harmonia etoso (NORVEGA E-ISTO 4), ke plej impresa estis la ĉiama ebleco senpere kontakti homojn el plej diversaj regionoj (EL POPOLA ĈINIO, E-AKTUELL kaj aliaj). Renkonto kaj harmonio: jen gravegaj celoj de niaj Universalaj Kongresoj, feliĉe sukcesintaj en Budapeŝto.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ignat Florian Bociort
Profesoro de la Universitato de Timişoara (Rumanio)

KRITIKO DE LA TEZOJ KIUJ NEAS LA PROGRESON DE LA LITERATURO KAJ ARTO

La skeptikaj aŭ negativismaj konceptoj pri la ekzisto aŭ pri la ebleco de progreso de la estetika valoro (do de la literaturo kaj arto) havas agnostikan kaj sendeterminisman bazon. Esence, tiaj pozicioj baziĝas sur la sekvantaj kvar argumentoj*:

a) *La unua argumento de la spektikuloj.* La artaj sistemoj t.e. la verkistoj, la literaturaj verkoj, la literaturaj skoloj ktp. konsistigas *nekompareblajn fenomenojn;* tial oni ne povas konstati progreson de unu al alia. Oni asertas ke ne povas esti komparataj inter si Homero kaj Dante, Shakespeare kaj Balzac, Balzac kaj Tolstoj, Eminescu kaj Arghezi ktp. Ili estas „samvaloraj", do kie estas la progreso?

Nia respondo. La eraro, sur kiu baziĝas ĉi tiu argumento, fontas el la intenco kompari sistemojn tro kompleksajn, tial neesploreblajn laŭ vojo pure intuicia. La intuicio, konilo neperfekta, estis prenita kiel sufiĉa kriterio por konstati la progreson; la fakto ke ĝi kapitulacis, estis rigardata kiel pruvo ke en la arto ne ekzistas progreso. La metodmankoj kondukas ĉiam al eraraj konkludoj, regule al agnostikaj konkludoj. Ĉi-kaze, anstataŭ observi la mankojn en la metodo, oni konkludis la neekziston de la progreso! Signifoplene estas, ke pluraj aŭtoroj, kiuj neas la progreson en la historio de la universalaj literaturo kaj arto, akceptas ĝin en tiuj fragmentoj de la historio, kie la intuicio sufiĉas por konstati ties realecon. Vere en la evoluo de iu verkisto ekde juneco ĝis matureco, en la disvolviĝo de la naciaj literaturoj ekde la originoj ĝis la grandaj klasikuloj, en la kadro de tiel nomataj historiaj „cikloj" aŭ „serioj" (Croce) ktp., estas facile observi ke la progreso eblas kaj realas. Samtempe, la skeptikuloj akceptas komparon inter grandaj kaj malgrandaj verkistoj. Do, ne estas vere ke la verkistoj ne estas nekompareblaj. La rumana estetikisto Tudor Vianu rimarkis la kontraŭdiron kaj asertis, ke inter „malegalaj" verkistoj, kaj nur inter tiaj, la komparo eblas. Nu, alimaniere ne estus eblaj la kritiko, la historio de literaturoj; la kampo de la literaturo transformiĝus tiel en ĥaotikan amason de „neinterkompareblaj" produktaĵoj.

La homa socio, kiel memperfektiga, memreguliga sistemo, faras konstante komparojn por taksi la rezultojn atingitajn ĝis iu momento kaj por optimumigi sian konduton, cele de supera rezulto en nova okazo, do en nova praktika procedo aŭ agado. En ĉiuj sferoj de la vivo ni aplikas la komparojn. Ĉu estas la sferoj de la arto kaj literaturo tute alitipaj ol la ceteraj homaj agadoj? Neniam la *psikologio de la kreado,* kiu studas la ĝeneralajn trajtojn de homa kreiva agado, asertis — ja eĉ ne povas aserti — tiaĵon, kvankam, kompreneble, ĝi akceptas specifecon de ĉiu agadtipo; sed ĉi tiu specifeco eliminas neniun agadformon el la sfero de la homaj agadoj, bazitaj, *ĉiuj,* sur interna (ena), *ĝenerala modelo* de la krea homa kondutado. La tradicia estetiko, bazita sur la intuicio, demetis la armilojn tuj, kiam ĝi troviĝis sur kampo, kie la intuicio ne plu sufiĉas por observi la realajn ecojn de la aĵoj. Sed estas rimarkinde, ke ne nur la estetiko, kaj ne nur la sfero de la arto konis la eraron pri kiu temas. Oni interkomparis ankaŭ la grandajn generalojn (Napoleonon kaj Cezaron), kaj la grandajn scienculojn (Ejnstejnon kaj Neŭtonon), kaj la rezulto estis la sama: tia komparo kondukas al nenia rezulto, sed el tio ni ne konkludos ke ne ekzistas progreso de la militarto aŭ progreso de la sciencoj. La teorio de la progreso, en kiu ajn agadkampo, havas nenian bezonon kompari „ĝenerale" personecojn kiuj agadis en la koncerna kampo. „Ĝenerale" kompari Dante-n kun Vergilio estas do nekonkludige ne ĉar ili estas verkistoj, sed ĝuste ĉar ili estas komparataj „ĝenerale"; alivorte, la eraro kuŝas ne en la fakto ke ili estas komparataj, sed en *la maniero* laŭ kiu ili estas komparataj. La komparo inter du aĵoj aŭ fenomenoj estas logika operacio, kiu efektiviĝas ĉiam laŭ konkreta vidpunkto: ni komparas du konkretajn ecojn, komparas, ekzemple du homojn el la vidpunkto de inteligenteco, kulturo, diligenteco, aĝo, alteco, ni komparas du sambrancajn sportistojn, laŭ la kriterioj por mezuri la rezultojn enkadre de la koncerna sportobranĉo, sed ni ne povas kompari boksiston kun skermisto, krom se ni havas taŭgan sistemon al kiu ni rilatigu la poentojn akiritajn de ili ambaŭ ktp. Du literaturaj verkoj, kaj tiom pli du verkistoj, estas fenomenoj nekompareble pli kompleksaj ol du sportaj rezultoj mezureblaj en minutoj kaj sekundoj, kaj tamen iuj estetikistoj deziras kompari intuicie Homeron kaj Tolstoj, aŭ Vergilion kun Dante, operaciante per ia ekstertempa, eksterhistoria modelo de perfekteco.

La interkomparo de du verkistoj devas komenciĝi per la konsidero de la elementoj (komponentoj) de la artoverko kaj per la analizo de la maniero en kiu ĉi tiuj elementoj unuope, kaj poste la verkoj en tuteco, realigas iliajn specifajn funkciojn. (Tio signifas ke antaŭ ĉio estas necese difini unusence la celon aŭ la celojn de la arto kaj literaturo en la socio.) La komparo povas konduki al la konkludo, ke el iu vidpunkto (temo, filozofio, personoj, lingvo, verso ktp.), iu verkisto superas, el alia vidpunkto malsuperas iun antaŭulon aŭ samtempulon. Ni devas rekonstrui la internan literaturan modelon de koncerna epoko, poste la literaturajn internajn modelojn laŭ kiuj verkis du komparendaj verkistoj, do ni devas konsciencigi la modelojn (*kompleksoj de invariantoj*) de iliaj verkoj kaj kompari ĉi tiujn individuajn *modelojn* inter ili kaj kun la modelo praktikata en ilia epoko; oni komparu ilin el la perspektivo de la funkcioj (delica, ĝuiga, formiga, eduka, instrua ktp.) de la arto en la socio. Ni do konsciu pri la kompleksecо de la sistemo *estetika valoro,* pri la fakto ke ĝi inkluzivas *multegon* da valoroj kiuj realiĝas ĉe la niveloj: tema, idea, problema, tipologia (la universo de la personoj), arkitektura, stila, lingva, metrika-prozodia, poema, drama, lirika, rakonta, plastika, ktp. niveloj kiujn oni devas rigardi funkcie kaj kuntekste: certa arta solvo taŭgas enkadre de certa struktura tipo, kaj maltaŭgas en alia; ĝi povas esti solvo optimuma, banala aŭ falsa rilate al iu difinita taksadsistemo enhavanta ideologiajn komponentojn (filozofian, moralan, politikan) kaj neideologiajn (lingvon, ritmon ktp.). La diskuto do ne povas esti disigata disde la idealoj (unue de la *estetika*); nu, kiel sciate, la idealoj evoluas en la historio de la socio. Sed la taksado de la literatura-arta verko okazas en perspektivo *nuntempa.* Ja ankaŭ la „nuntempa perspektivo" ne estas homogena sistemo en niaj tagoj, tial la taksadkriterioj de la arto (nuntempa aŭ pasinttempa) diferencas laŭ la arta tendenco de la taksanta sistemo. Sed ne ĉiuj ĉi tiuj tendencoj servas egale la homan konsciencon kaj destinon, tial la *valoro,* kaj respektive la progreso, ne povas esti konstatataj, ĝis la plej etaj detaloj, „laŭ ĉies vidpunkto". Ili devas esti konstatataj kiel valoro kaj progreso, laŭ la vidpunkto de la plej altaj idealoj de la homaro, idealoj kiuj, havante historiajn-filozofiajn determinitecojn, do *sociajn* bazojn, tial la progreso ne estas unudirekta kaj linia, sed *kampa,* larĝonda, en formo de reliefo varia. La kompleksecо de problemo ne devas fortimigi nin. La homaro *havas* kriteriojn por taksado de literaturaj verkoj; jam de centoj da jaroj ĝi aplikas taksadkriteriojn fontantajn el „la plej altaj idealoj de la homaro"; la pruvo de tio estas la kvazaŭunanima konsento rilate al la fakto ke certaj kreaĵoj estas majstroverkoj (epopeoj de Homero), aliaj estas „meritaj" kaj iuj produktaĵoj estas fuŝaĵo kaj „kiĉo"

Konkludo: la literaturaj verkoj estas kompareblaj laŭ iliaj internaj abstraktaj modeloj.

b) *La dua argumento* de la skeptika starpunkto, rilate la ekziston de progreso en arto, apogas sin sur la ideo, larĝe disvastiĝinta en la moderna estetiko, ke majstroverko estus unikaĵo, fenomeno unika, dum ĉiuj aliaj produktoj de la homa spirito, estas „serioproduktaĵoj" senfine ripeteblaj, laŭ la sama modelo, komuna al ĉiuj samspecaj produktaĵoj. Certe, la ideo de *„unikeco"* de „absoluta originaleco", de „produktaĵo tute neripetebla" estas neakordigebla kun la ideo de progreso. La progreso inkludas *leĝon, leĝecon,* do la ĝeneralon, dum la ideo de unikeco absolutigas la individuecon, pritraktas verkon kiel produktaĵon kreitan ekskluzive per individueco de la verkinto — kiu ankaŭ estas neripetebla kaj unika.

Nia respondo. Fakte ankaŭ ĉi tiu tezo malobservas la invariantojn de la arta verko, ĝiajn elementojn komunajn kun elementojn de aliaj verkoj de ĉiamaj kaj ĉieaj: ĉiuj havas *temon,* kaj multaj eĉ komunan temon — kiel ekzemple amon, vivon, morton, feliĉon, homan dignon, naturon ktp. — *entenas* ideojn kaj sentimentojn, havas personojn respektive rolulojn, aŭ almenaŭ lirikan heroon (persono parolanta en la lirika verko aŭ rakontanta en la epika), havas komunajn kompoziciajn strukturojn, komunan lingvon, komunan versfaradan sistemon ktp. ktp. Certe, kiam ni diras „komunan" ni ne komprenas „identan"; ĉi tiuj elementoj estas komunaj tre larĝsence: la poeziaĵoj, kiuj havas kiel temon, ekzemple, *la amon,* havas, kaj ne havas la „saman temon", ĉar en ĉiu aŭtenta verko aperas alia manifestiĝo de tiu ĝeneralhoma sentimento. La objektivaj trajtoj de la homaj sentimentoj estas la samaj ĉe ĉiuj individuoj, kio signifas ke ni renkontas ĉiam denove en la verkoj „universalaĵojn", sed ĉi tiuj aperas ĉiam malsame en iu aŭ alia konkreta situacio, ĉe iu aŭ alia individuo, en iu aŭ alia verko. Samtempe la ĝeneralaj donitaĵoj, komunaj, de la individua konscio, estas historie kaj biologie determinitaj, ili respondas al invariantoj (ja, certe, ankaŭ ili varieblaj), de la socia kaj natura realo. Nu bone, la teorio kiu parolas pri la „neripeteb-leco" de la verko, de la individuoj ktp., alivorte donas nefilozofian solvon al la rilato inter la ĝenerala — la partikulara — la individua. Ĉi tiu eraro kondukis la novkantanojn Rickert kaj Windelband al la tezo pri la „unikeco de la sociaj fenomenoj", kaj, nature, al la neo de la socia progreso, de la historiaj sociaj leĝoj: certe, ĉiuj historiaj faktoj estas „unikaĵoj", ili ne ripetiĝas dufoje en la ekzakte sama formo, sed el tio oni ne povas dedukti la ideon pri la absoluta unikeco de ĉi tiuj faktoj. Oni scias ja, ke ne nur la historiaj fenomenoj, sed *ĉiuj* realaj fenomenoj estas „neripeteblaj", ĉiuj estas sistemoj „unikaj". La opozicio inter la fenomenoj naturaj, kiuj estus „ripeteblaj", kaj sociaj, kiuj estus „neripeteblaj", estas erara. Ankaŭ la naturaj fenomenoj ne estas „absolute ripeteblaj"! La identeco de du fenomenoj (du rivoluoj de la sama planedo, du elementaj korpuskloj de la materio ktp.), estas nur hipotezo de la esploranto, mensa konstruaĵo, ne objektiva fakto. Nenio ripetiĝas idente en la universo. Ĉiuj leĝoj de la universo realiĝas ĉiukaze en „aliaj kondiĉoj".

En arta aŭ literatura verko, same kiel en kiu ajn alia kreaĵo de la homa menso, ni devas rimarki ke *kreado* entenas novan informon, antaŭe nekonitan, novan rilaton inter la fenomenoj de la ĉirkaŭanta mondo. Ĉi tiu novaĵo estas unikaĵo. Kiam, ekzemple, scienculo malkovras novan fizikan leĝon, ĉi tiu leĝo, formulita unue en lia menso, havas, vere, unikecon, ĝi estas „unikaĵo". Unikaĵo estas ekzemple ankaŭ la malkovro de la perspektivo en la plastikaj artoj, en certa historia momento de la arta evoluo. La *invento,* la novigaĵo en scienco aŭ arto, signifas kreadon, sed ni devas rimarki tuj, ke eĉ ĉi tiu momento ne estas unikaĵo, en senco absoluta, ĉar temas pri aplikado de pensadprincipoj, antaŭe malkovritaj de aliulo. Sed en la momento kiam ĉi tiu invento, ĉi tiu malkovraĵo de la homa menso, estas objektivigata far sia kreinto, t.e. ĝi estas aplikata por krei novan produkton (novan tipon de aparato, novan artverkon), ĝi povas esti multobligata senfine far la socio, ĝi fariĝas „serioproduktaĵo", produktaĵo por vasta konsumado. La aserto ke artverko estas unikaĵo, dum ĉiuj aliaj produktoj de la homa menso estus „serioproduktaĵoj", fontas el la eraro interrilatigi du *malsamajn aspektojn* de la agadoj, en arta unuflanke, kaj teknika-scienca aliflanke: nome, la verko estis rigardata nur en ĝia krea, noviga aspekto, dum la krea aspekto en la scienco kaj tekniko estas malobservata, kaj sekve, la teknikaj-sciencaj produktaĵoj estis rigardataj nur en ilia ekstera simileco, do kiel „serioproduktaĵoj", kiel estas, ekzemple, la industriaj varoj en magazeno. Sed ankaŭ en librovendejo la literaturaj verkoj estas „serioproduktaĵoj"! La eraro, kiun ni prikomentas, kondukis al la paradoksa konkludo, ke romano, kaj eĉ kiu ajn romano, estas „unikaĵo", dum la verko de Ejnstejn estus „serioproduktaĵo", ĉar ĝi ne estas arto! Ambaŭ tipoj (arta kaj sciencteknika) de krea agado inkludas multnombrajn antaŭajn malkovrojn, kun la diferenco, ke ĉi tiu „kolektiva" materialo de ideoj kaj konceptoj estas multe pli granda kompleksekco kompare kun fizika aŭ kemia principo. La novigaĵo povas aperi en artverko ĉe la nivelo de pluraj komponentoj de ĝia strukturo, kaj samtempe, ĉe la nivelo de aliaj komponentoj povas okazi ke la artisto perdu parton de la de majstroverko estas rekte erariga kaj konfuza en la kazo de intuiciaj esplormetodoj. Ĉiukaze, mi ne kredos ke oni povas aserti ke baroka kreaĵo estas pli „unika" ol peco de metalo destinita al la unuaj mekanikaj aparatoj, tiom longe kiom tiu ĉi peco ekzistis en nur unu ekzemplero, kiel manlaboraĵo longe polurita. Ne hazarde tiuj, kiuj parolas pri la „unikeco" de la artverko, konsideras ĉiam la majstroverkojn, la monumentajn kreaĵojn, do la plej kompleksajn sistemojn troviĝantajn en la universo de la arto, forgesante, ke ĝuste ĉi tiuj monumentaj verkoj estas ofte, en pli-malpli granda mezuro, kolektivaj produktaĵoj, ĉu temas pri la majstroverkoj folkloraj, de la popola kreado, kiel la rumana balado „Miorița" (Šafideto), ĉu pri la Homeraj epopeoj, ĉu pri la grandaj katedraloj. Estas konate ke kelkaj partoj de la verkoj de Shakespeare, Goethe aŭ Mozart ne apartenas al la koncerna kreinto. Goethe, kiu ne faris sekreton el la enesto de pluraj antaŭaj verkistoj en siaj verkoj, mencias ke ankaŭ lia amiko Schiller kontribuis al la kreado de „Faŭsto", kaj li nomas „frenezulo je propra konto" verkiston kiu pensas ke lia ĉefa tasko estas „absoluta originaleco".

La literatura verko estas do, same kiel kiu ajn alia kreaĵo de la homa menso, sistemo kun kontinuoj, kun elementoj „ĝeneralaj", kaj la progreso realiĝas deire de ĉi tiaj elementoj. La majstroverko estas samtempe sistemo ripetanta kaj noviganta. Ĝi ne estas komplete novigaĵo; regule, ĝi ne estas eĉ „plejgrandparte" novigaĵo. Cetere, la tasko de la arto ne konsistas el tiu „esti tute alia" ol la antaŭa, ĉar ankaŭ la homa konscio de nia epoko ne estas „tute alia" ol tiu de la antaŭa epoko, ĉar samkiel ankaŭ la historia realaĵo de niaj tagoj ne estas komplete malsimila al la antaŭa, kio klarigeblas, laste, per la invariantoj de la objektiva realaĵo, per la konstantoj de la naturo, de la socio.

Konkludo. La teorio pri la absoluta unikeco de la artverko estas sen filozofia bazo.

c) *La tria argumento,* kiun uzas tiuj kiuj neas la progreson en la arto, baziĝas sur la ideo ke en la arto ne ekzistas kreadmetodo kiel ekzistas en la scienco; ke en la arto oni ne aplikas regulojn kaj principojn, ke ĝi ne baziĝas sur „lernado", ke la arto ne povas esti lernata. La estetika valoro ne kreskas per sumigo de „partaj veroj", kiel kreskas la scienca ekkono. Do, laŭ ĉi tiu argumento la scienco aŭ „teoria valoro" kreskas per sumigo, per adicio de partaj veroj, dum en la arto tia evoluo ne eblas. Ankaŭ ĉi tiu tezo havas larĝan disvastiĝon, ja unu el ĝiaj prestiĝaj kreintoj estis Immanuel Kant.

Nia respondo. Evidente, sen metodo, sen lernado, sen akumulado de informo, ne eblas la progreso, ĉar ĝi postulas ĉiubranĉe prilaboradon de la antaŭa sperto, kaj la transprenon el ĉi tiu sperto de ĉio kio estas ankoraŭ vivpova, ĝi postulas la transprenon de la optimumaj rezultoj de la pasinteco, same kiel de la kondutoj kaj agadmanieroj kondukintaj al tiuj rezultoj; ĝi postulas same, la

starigon de principoj baziĝantaj sur la efikaj, sukcesplenaj, antaŭaj spertoj. La principoj estas manifestiĝformoj de la leĝoj de diversaj agadtipoj. Ili estas do, esenca ekkono. Unuvorte, sen konado ne ekzistas progreso. Sed ja ĝuste la *konado* en la arto estas neata far Kant. Por li, la arto estas la regno de la genio, kaj la genio laboras sen reguloj kaj normoj. Tial, laŭ li, ekzistas metodo en la scienco, sed ne ekzistas metodo en la arto. Neniu povas lerni krei majstroverkojn, similajn al tiuj de Shakespeare aŭ Dante, sed la metodo de Neŭtono estas aplikebla far kiu ajn. Ĉi tiu opozicio entenas eraron, kaj ĝi ne estas la sola eraro kiun ni renkontas en la komparoj faritaj inter la arto kaj la scienco; tio montras ke estas necese submeti hodiaŭ al nova, atenta analizo, el la perspektivo de la nuntempa kono, la rilatojn arto-scienco, aŭ pli ĝuste, inter certa speco de arto (literaturo, arkitekturo ktp.) kaj la teknika-scienca pensado. En la konatan opozicion de Kant enŝoviĝis eraro, kiu eĉ ne eatas tiel subtila, kiel estas, kutime, la eraroj de la filozofoj. La paralelo proponita de li estus edifa, havus logikan kaj historian pravigon, nur se oni povus formuli ĝin tiel: ni ne povas lerni la metodon krei majstroverkojn kiel Shakespeare aŭ Dante, sed ni povas lerni la metodon fari geniajn malkovrojn kiel Neŭtono aŭ Ejnstejn! La paralelo kiun Kant proponas al ni, en la *Kritiko de la juĝkapablo,* ne estas komparo inter la arto kaj la scienco, sed inter kreaĵo kaj imitaĵo. Kiu „lernas" la metodon de Neŭtono, lernas fakte kopii lin. Li estas epigono, ne kreanto, kaj epigonoj ekzistas, eĉ troe, ankaŭ en la literaturo kaj arto. Kreado signifas ne nure la agadon de verkisto sidanta ĉetable kaj komponanta skribaĵojn; ankaŭ ne agadon de mezvalora pentristo troviĝanta tutan tagon antaŭ sia stablo kaj tolo. Kreado, en la scienca senco, senco uzata en la moderna teorio pri la informo, signifas *novan informon,* antaŭe nekonatan, novan elementon en la modelo de iu agado, novan rilaton inter la fenomenoj de la ĉirkaŭanta mondo, rimarkiĝon de nova, pli ĝenerala leĝo surbaze de la antaŭaj konoj, surbaze de novaj eksperimentoj ktp. Nu bone, nek en la arto, nek en la scienco povas esti lernata la metodo atingi rekte ĉi tiun novan informon, *la kreon;* ne povas esti lernata la metodo malkovri la kaŭzojn ekzemple de la kancero. Do, la kreaĵo naskiĝas ankaŭ en la scienco, sen normoj, sen receptoj. Sed tio neniel signifas, ke ne ekzistas „lernado en la scienco", preparo de la esploristoj por iliaj estontaj malkovroj, sen kio ili do, devus alfronti la ekkonon de la naturo ĝuste ĉe la komenco. La tuta scienco, kiun posedas la homaro en ĉi tiu momento, povas esti lernata, ĝi estas sistemo de konoj kun objektiva valoro, ekstreme riĉa heredaĵo kuŝanta ĉe la bazo de la homa agado en diversaj vivsferoj, kaj estas, samtempe, konkeritaj pozicioj en la akiro de aliaj scioj, pere de kiuj la homa konado progresos. Konklude, ankaŭ la scienco povas esti lernata nur ĝis certa punkto, nome ĝis la momento kiam komenciĝas la propredirita kreado. Ekde tie, la esploristo ne plu havas „metodon". Nu bone, ĝis ĉi tiu punkto ekzistas lernado ankaŭ en la arto! Kion alian signifus la institutoj pri arto, la institutoj pri teatrologio, la konservatorioj? La pentristoj de la Renesanco havis lernantojn, kiuj estis venantaj de malproksime por *lerni* la pentroarton. Pluraj klasikaj verkistoj konfesas malkaŝe ke ili *lernis* de la grandaj antaŭuloj, kaj iuj verkistoj plenumis veran lernoservon ĉe alies skolo, eĉ se ili pli-malpli frue emancipiĝis. La lernado en la arto estas ekstreme multflanka procezo, kun sekvoj por la nivelo de ĉiuj komponeroj de la verko, ekde la temelekto ĝis la kompona strukturo kaj la versteknikо. La verkisto lernas, ekzemple, por kompreni la funkcian strukturon de la literatura verko, do la elementojn pere de kiuj la verko efektivigas siajn funkciojn; li meditas pri la optimumaj solvoj, troviĝantaj en la elstaraj majstroverkoj de la homaro, konkludas rilate la manieron realigi la maksimuman funkcikapablon de la komponentoj de diverstipaj artaj strukturoj (dramo, romano ktp.). Sed samtempe, studante atente kaj diligente la plej gravajn kreaĵojn de la antaŭuloj, la hodiaŭa verkisto evoluigas siajn talentоn, personecon (la kreivan fantazion, inteligenton, observokapablon, la lingvon en kiu li estas verkonta ktp.). Lia personeco disvolviĝas, evidente, ankaŭ pere de aliaj studoj, foje tre malproksimaj de liaj nuraj literaturaj okupoj, same kiel ĝi disvolviĝas ankaŭ pere de la kontakto kun realaĵoj de la ĉiutaga vivo, pere de partopreno en la okazintaĵoj de lia epoko ktp. — ĉiuj tiaj ekzistformoj estante samtempe lernvojoj (en la scienco, en la arto, en la vivo ktp.). Hodiaŭ estas sciate ke la personeco de la artisto inkluzivas kaj *ingenium* (talenton), kaj *ars* (metion); la metion — tion sciis jam antikvuloj — oni povas lerni. Sed ni asertas ke oni povas lerni multe pli ol la nuran *„metion"*, ke la personeco artisma ne estas sole nur donaco de la naturo plus metio; la natura talento ne estas ora bulo, kiun la artisto posedas en fiksita kvanto, sed estas *procezo,* kiu povas evolui aŭ malevolui, do estas grandparte la rezulto de formiga procezo, rezulto de la *lernado* — en la plej vasta senco. Sen lernado, „natura talento" kreas arton naivan. *Poeta doctus* restas konstanta idealo; la informo bezonata de li devas enteni la kreivajn strategiojn kiuj montriĝis supere funkcikapablaj, la abstraktajn modelojn optimume realigitajn far la antaŭuloj, la momentojn taŭgajn ricevi novajn artajn funkciojn, en novaj monumentaj verkoj, la vojojn por la kreskigo de la arta efikeco de ĉiu konstituanto de la verko; li devas same familiariĝi kun la teoriaj disputoj de sia epoko, kun ties ideologiaj sistemoj, kun la scienca filozofio, kun la socipolitikaj problemoj. La bildo de poeto kantanta instinkte, kiel kantas la birdo sur la branĉo, aŭ vilaĝa muzikisto, estas diletantaĵo kiu povas nur malutili al la arto, restigante ĝin sur primitiva, rudimenta nivelo. Ni ne forgesu ke la informo havas apartan kapablon akceli la kreadon de nova informo! Ĝuste ĉi tiu eco de la informo igas tiel grava la lernadon en ĉiuj kampoj de agado kaj ebligas la progreson de la homaj agadoj. Ekzistas nenia kialo elpreni la arton el la ĝenerala agadmodelo de *homo creator.* La principoj, la metodoj ktp. ekzistas ĉie en la homa agado: ili estas esenca informo, strikte necesa por la starigo de ĉiu estonta strategio. Lerni ilin, ne signifas nepre imiti ilin, sed nur ekscii, informiĝi pri tio „kion scias ankaŭ la kontraŭulo", tio signifas ke la principoj estas destinitaj levi la strategiiston sur la ekkonnivelon jam atingitan far la homaro; poste restas lia kapablo krei novan informon kiu portos lin en la universon de la valorkreantoj. La elstara rumana kritikisto kaj literaturhistoriisto, George Călinescu, estis plene rajtigita aserti, ke la geniulo ne kreas sen principoj kaj normoj, sed ne limiĝas al ĉi tiuj; ke la regulojn kaj principojn oni devas primediti, ne nepre apliki.

Ĝuste la fakto, ke la informo estas amasigebla, ebligas la progreson kaj en la biologia sfero, kaj en la socia. La informo estas sumigebla, kio povigas ĉiun tipon de la homa agado ricevi direkton suprenirantan, same kiel la perdo de informo kondukas al descenda evoluo en la organizado de ĉiuj teologiaj sistemoj. Ju pli riĉa kaj laŭ raciaj kriterioj selektita estas la informo, des pli grandaj estas la sukcesŝancoj de la praktikanto. Tiel klarigeblas la fakto ke la klasikaj epokoj kaj la elstaraj kreantoj respektas kaj konservas la valorojn de la pasinteco, dum la dekadencaj sistemoj (epokoj, artistoj) estas nihilismaj, negativismaj, kaj la sistemoj epigonaj ne kapablas pliriĉigi la ekzistantan strukturan informon. La elstaraj personecoj artaj aŭ sciencaj strebas al la maksimuma informo de la epoko, de la homaro, tial ilia kreaĵo ne estas plene enkadrigebla en tendencojn, skolojn, grupiĝojn ktp., kiuj estas nur subsistemoj de la epokoj. Sed samtempe, la verkoj povas esti eksplikataj nek rilate al la genezo, nek al la funkcio, krom per la karakterizaj trajtoj de la epoko en kiu ili aperis.

Konkludo. Ankaŭ en la literaturo kaj arto estas nepre necesaj metodo, principoj, informo.

d) *La kvara argumento* de la tezo pri la neekzisto de progreso en la arto de la homaro baziĝas sur la teorio de Benedetto Croce pri la tiel nomataj „progresivaj cikloj" aŭ „historiaj serioj". Croce akceptas la ideon de estetika progreso de la arto kaj de la literaturo nur enkadre de la „progresivaj cikloj": li akceptas progreson ekde la mezepokaj aŭtoroj de „misteroj" kaj „vizioj" ĝis Dante, akceptas la progreson dum la Elizabeta periodo de la angla literaturo ekde la sensignifaj verkistoj ĝis Shakespeare, progreson ekde *Sturm und Drang* ĝis *Werther* kaj *Faust* en la germana literaturo,

progreson de la kavalira literaturo ekde Pulĉi ĝis Ariosto en la itala, ĉar, diras Croce, temas ĉiufoje pri „progresivaj serioj", pri „cikloj", sed laŭ la itala estetikisto ne ekzistas progreso laŭlonge de la tuta literatura historio de la homaro. La progreso ĉesus, laŭ li, post kiam la afekcia materialo kuŝanta ĉe la bazo de ciklo atingis sian plej altan artan esprimon; post tio komenciĝus la regreso, la epigonismo.

Nia respondo. Grandtrajte, ĉi tiu tezo reduktiĝas al la eraroj starantaj ĉe la bazo de la aliaj argumentoj kontraŭ la ideo de progreso: la nekomparebleco de la artaj sistemoj, la „unikeca" karaktero de la verko kaj la „neebleco" de principoj kaj metodo en la arto. Croce, videble, konsideras la „ciklojn" historiajn kiel izolitajn sistemojn, kiuj havas internan organan strukturon, sed ne havas rilatojn inter si; iu ciklo neniel konstituiĝas en alian ciklon. Por li, la arta agado havas lokon enkadre de ĉiu ciklo, konforme al iu abstrakta modelo, specifa por la koncerna ciklo. La disvolviĝo de ĉi tiu modelo okazus surbaze de elĉerpebla materialo. Kiam la koncerna ciklo, respektive la arto de tiu ciklo, donis ĉion per si eblan, tiam la modelo atingis la mezuron al si propran, la disvolviĝo ĉesas kaj komenciĝas la malkreskiĝo, la regreso. En ĉi tiu tezo kombiniĝas la ideo, pli malnova, de la „historiaj cikloj" kun la observo, intuicia, de la arta progreso dum certaj historiaj periodoj kaj ankaŭ kun la eraro troigi la donitaĵojn akiritajn intuicie. La ideo de arta progreso enkadre de iuj historiaj periodoj, enkadre de „progresivaj cikloj" estas konforma al empiriaj elementaj observoj, al la komuna natura bonsento. Croce estas elstara literaturhistoriisto, li ne povis ne rimarki, ke dum certaj historiaj periodoj de la naciaj literaturoj, la estetika progreso estas evidenta — ekde iu verkisto troviĝanta ĉe la komenco de unu literatura epoko ĝis alia en kiu ĉi tiu epoko trovis sian plej altan esprimon. Ni atentigas ke ĉi tiuj periodoj estas relative homogenaj sistemoj, tial la proceso estas pli facile observebla. Sed, simile al aliaj multaj esploristoj absolutigintaj la intuiciajn donitaĵojn, Croce neas la progreson en tiuj sferoj kie ĝi ne estas rimarkebla intuicie. Neniu povas nei ke la Renesanco en Italujo reprezentas „progresivan ciklon", sed Croce ne povas respondi la demandon, ĉu Rafaello aŭ Tiziano estas aŭ ne, en progreso rilate al Giotto, la elstara pentristo de la frua Renesanco, kaj li konkludas, ke ĉi-kaze, ne eblas kompari; tio estas eraro kiun ni pridiskutis sub punkto a), kiam ni okupiĝis pri la supozita „nekomparebleco" de la verkoj kaj verkistoj. La metodo de Croce estas nekapabla reliefigi la progreson enkadre de ciklo kaj des pli malmulte taŭgas lia metodo por klarigi ĉu ekzistas aŭ ne progreso ekster la „progresivaj cikloj"; tial Croce estas logike devigata aserti ke la prahistoriaj pentraĵoj sur grotaj muroj ne estas superaj aŭ malsuperaj al tiuj de la Renesanco, konkludo kies absurdeco estas intuicie videbla.

La teorio de Croce akceptas komparon inter verkistoj havantaj „la saman materialon", kiun ili prilaboras, kaj ĉi tiu materialo ekzistus nur enkadre de la cikloj; sekve, manke de komparadkriterio laŭlonge de la homara historio, mankus ankaŭ... la progreso. Dante, Shakespeare aŭ Goethe estus do en progreso rilate al siaj ĵusaj antaŭuloj, sed ne rilate al la homoj de la epoko primitiva! La historio havus progresleĝojn en siaj cikloj, sed kiel entuta sistemo, ĝi ne konus tiajn leĝojn, alidire, la partaj sistemoj (subsistemoj) progresas, sed la supersistemo ne! — ideo facile refutebla hodiaŭ, el la perspektivo de la ĝenerala sistemteorio: la disvolviĝo de kiu ajn nehomogena sistemo efektiviĝas ĝuste per parta, nesamtempa kaj neegala disvolviĝo de ĝiaj subsistemoj. Por strikte fundamenti sian teorion, Croce estus devinta demonstri almenaŭ la jenajn tezojn:

1) La kriterio de la progreso („la materialo per kiu operacias la artisto") estus la sole ebla kriterio enkadre de la ciklo kaj „aliaj ne plu estus" kiel Aristotelo (kelkfoje ironiita far Croce!) konstruis siajn argumentadojn.

2) Ĉi tiu kriterio funkcius perfekte enkadre de la ciklo kaj estus aplikebla al ĉiuj konkretaj kazoj.

3) Ĝi ne taŭgus funkcii ekster la cikloj.

4) Trans la limoj de la cikloj ne plu validus la disvolviĝleĝoj konstatitaj enkadre de la cikloj kaj, ĝenerale, ekzistus neniaj disvolviĝleĝoj ekster la cikloj, do, ĉe la nivelo de la supersistemoj, tiel ke principe estus neeblaj kiuj ajn progreskriterioj. Sed tian demonstradon Croce kaj liaj adeptoj ne faris, kaj, certe, eĉ ne estus povintaj fari. La „arta materialo" ne povas servi kiel sufiĉa kriterio por la ekkono de arta progreso, pro almenaŭ la jenaj kialoj:

— „la materialo" ne estas la sola komuna elemento en diversaj literaturaj verkoj, ĉar ĝi ne estas la sola komponero, kiun oni devas prikonsideri;

— surbaze de ĉi tiu kriterio ni ne povas konstati la progreson realiĝintan enkadre de la sama ciklo: kiel ni povus konstati, ekzemple surbaze de la materialo, la progreson de Shakespeare rilate al verkistoj antaŭaj en la sama ciklo?

— deirante de certa arta materialo povas naskiĝi en ĉiu momento epigonaj produktaĵoj troviĝantaj sur „horizontalo", inter kiuj oni ne povas konstati progreson aŭ regreson;

— la tiel nomataj „eternaj temoj", konsistigas „materialon" kiu transpasas la ciklojn, donante al la verkistoj laŭlonge de la jarcentoj „la saman materialon"; ĉu ekzistas, laŭ Croce, progreso en la traktado de ĉi tiu materialo? Se la literaturo ne konas progreson en la traktado de ĉi tiuj temoj, tio signifas ke la unueco de la prilaborenda materialo ne sufiĉas por doni direkton ascendan, progresivan al la literatura fenomeno; se la literaturo konas progreson en ĉi tiuj kazoj, ni devas konkludi ke, almenaŭ el ĉi tiu vidpunkto, ekzistas progreso *trans la progresivaj cikloj,* do ekzistas progreso de la homa arto, kontraŭdire al la tezo de Croce;

— kiel ni jam diris, la materialo de du verkistoj, de du verkoj ktp. estas kaj ne estas la sama. Du verkistoj, kiom ajn malsamaj, havas materialon (ideojn, sentojn, konceptojn, faktojn, situaciojn ktp.), ĝis certa mezuro komunan, kaj samtempe du verkistoj, kiom ajn proksimaj, aŭ eĉ du verkoj de la sama aŭtoro havas materialon iom malsaman, ĝi estas ĉiufoje „alia" kaj estintus normale ke Benedetto Croce rimarku tiun fakton ĉar li ja metis ĉe la bazon de sia estetiko la unikecon de artoverko kaj de la artista individueco. La eraron de la teorio pri absoluta unikeco ni jam montris sub la punkto b).

Por pli bone kompreni la eraron kiun entenas la teorio de la „progresivaj cikloj", ni rigardu, analogie, la sistemon de la bataliloj, ekde la pafarko ĝis la nuntempa detrua raketo. La evoluo de la pafarko, de la pulvopafiloj, de la kanono, de la raketo ktp. estas la sola kiun Croce pretus akcepti, sed, ĉar la pulvopafilo estas alia „progresiva ciklo" ol la arko kaj la raketo alia ciklo ol la kanono, tio signifus ke ni ne akceptu la progreson en la sfero de bataliloj. Sed ja la progreso kiu okazis en ĉi tiu sistemo de la bataliloj estas evidenta, kaj ĝi konsistis en la plibonigo de ĝiaj invariantoj, de la interna, abstrakta modelo de batalilsistemo, t.e. plibonigo de tiuj elementoj al ĝi specifaj, renkonteblaj en ĉiuj konkretaj historiaj formoj kiujn prenis la bataliloj: kreskis la elĵeta forto de la pafaĵo, ĝia detruforto, kreskis la precizeco en la frapo de la celaĵo ktp, do kreskis la specifa efikeco de la funkciaj komponentoj.

Do, ĉar en siaj diversaj historiaj manifestiĝoj la progreso estis pli evidenta, la teorio de la „progresivaj cikloj" estas nenio alia krom strebo teorie fundamenti fenomenon, kiu, intuicie, ne povis esti neata.

Konkludo. Ekzistas literatura kaj arta progreso *ene* de „progresivaj cikloj", de „historiaj serioj" kaj ekstere de ili.

*En tre mallonga formo, ĉi tiuj tezoj estis prezentitaj dum la Internacia Kongreso de Estetiko en 1972 (Actes du VII-e Congrès International D'Esthetique, Bucarest, 18 Août — 2 Septembre, 1972 I. Eldonejo de l' Academio de Socialisma Respubliko Rumanio, 1976, p. 728-732.)

Endre Tóth:

La tabakvendisto

La titolon „LA LIBRO DE LA JARO" pasintjare gajnis la originala novelaro de Endre Tóth: LAPPAR, LA ANTIKIRSTO. Nun estis la unua okazo, ke tiun prestiĝon atingis libro, eldonita de Hungara Esperanto-Asocio. Kaj ni supozas, ke tiu sukceso estis vere meritita: la verkoj de Endre Tóth (1931-1981) distingiĝas per eminenta observokapablo, analizemo penetranta en la esenson de la temo, kaj majstra envortigo de la animangoroj de la nuntempa homo. La ĉi-suba peco el la volumo – **La tabakvendisto** – ankaŭ pruvas, ke la noveloj de Endre Tóth estas altkvalitaj literaturaĵoj kaj allogaj legaĵoj samtempe.

Jen, alvenis la posttagmezo de la lasta tago. Hodiaŭ mi komencis bedaŭri, ke, antaŭ multe da jaroj, la grandegan butiktablon mi lokigis flanken, ne kontraŭ la enirpordon, kiel ĝenerale estas kutime, kaj de ĉi tie, kie ĝi nun staras, nur foje-foje mi ekvidas la figurojn preterrapidantajn antaŭ la pordo. Ĉiuj marŝas al la direkto de la stacidomo. Ĉiuj kunportas multe da pakaĵoj, kvazaŭ estus racie kunporti ion ajn.

Hodiaŭ nur malmultaj envenis al mi.

Frupostagmeze envenis juna virino, ŝi petis Saunus-on kvazaŭ ŝi ne scius, ke jam antaŭ semajnoj ĝi elĉerpiĝis.

– Mi bedaŭras, sinjorino – mi diris al ŝi ĝentile kaj aldonis kun iom da ironio – espereble plej baldaŭ.

Ŝi rigardis al mi ektimante, kaj forrapidis per pezaj paŝoj, frapadante per siaj alt-kalkanumaj sandaloj. Vidiĝis el ŝia aspekto la nervoelĉerpiĝo de la lastaj tagoj.

Kaj envenis ankaŭ la tapetisto, el la najbara ejo. Malice mi demandis, kion li deziras, kvazaŭ mi ne scius. Li petis Manakier-on, kion li fumas ĉiam.

Mi malŝatas tiun ĉi homon. Li havas malgrandetajn okulojn, sensangajn lipojn, grandajn lamenajn ostojn. Ĉiam mi imagis pri li, ke li havas humidajn manplatojn. Sed ne. Iam hazarde ni manpremis, kaj mi povis senti, ke li havas amikan varman manon. Ĉu li estis antipatia pro lia aroganta, pinta nazo?

– Ĉu vi ne pakas? – li demandis, kaj kaŝe rigardis miajn manojn, ĉu mi ĝuste repagas? Li pagis per granda monbileto, kiel ĉiuj nuntempe. Apenaŭ restis ŝanĝmono en la kaso.

– Ne – mi respondis al li – mi restos.

Subite li ekkaptis la redonitan monon, ĉife li kaŝis ĝin en la poŝo, kaj eliris preskaŭ kurante.

Mi devus translokigi la butiktablon. Kontraŭ la pordon, por ke mi pli bone vidu la straton. Sed ĝenis min, hodiaŭ, la lastan tagon fari ion ajn ne atendeblan. Mi decidis, ke mi restos disciplinita. Disciplinita kaj indiferenta, kiel la objektoj ĉirkaŭ mi.

Kontraŭ mi, sur la muro pendis la lastsemajna afiŝo de la kinejo. Oni enportis ĝin ĉiusemajne, kaj mi pendigis ĝin ĉiam akurate. Ĉi tiu montris la ĉefrolanton, kun lia barelventro; li portis frakon, okulvitrojn sur la nazo, brulanta cigaro paradis en la mano. Oni diras, ke mi similas lin. Tiu fakto kontentigis min. La tapetisto certe envias min pro tio. Nu, se tia naŭza tapetisto rifuĝas malproksimen, jam tial indas al mi resti.

Mi stariĝis kaj iris antaŭ la pordon. Ĉiun posttagmezon mi kutimas fari same. La vetero estis sufoke varma. En la kanaleto, apud la trotuaro la sablo ankoraŭ portis la postsignojn de la lasta pluvego. Mi ne ŝatas la homojn pale rapidantajn. Kaj ĉiuj al la sama direkto.

Virino marŝas sur la transa trotuaro kun du infanoj. En unu mano ŝi portas kaĝon kun papago. Pro Dio! Kial ŝi ne forlasas ĝin? Kio okazos kun la malfeliĉa birdo en la plenŝtopita vagonaro? Estas strange, ĉe kiaj afoj oni povas persisti. La infanoj estas multe pli sinceraj. Ili kunportas preskaŭ nenion. El iliaj timantaj okuloj videblas, ke ili scias, kial necesas rapidi.

– Maria! Iru al la bariero! – krias viro al ili kaj travagas la florbedon, kiu borderas la trotuaron.

Mi reiris en la butikon. Mi ne povis vidi plu tion. Laŭ mia opinio, la malordo estas netolerebla.

Mi pensis, ke alvenis la tempo por ekbruligi la lampojn. Ĉu mi iluminu la ŝildon? Depost kelke da tagoj, jam preskaŭ ĉiuj vendejoj estas fermitaj. Iuj eĉ ne ŝlositaj, nur forlasitaj. Mi ne volas fanfaroni per la iluminado. Neniam mi kontraŭstaris la publikan opinion kaj kutimon. La unua, kaj eble la lasta fojo estas tiu nuna. La ne-foriro.

Mi residiĝis malantaŭ la butiktablo. Dume iu venis en la butikon. La kolonelo. Mi nomas lin nur por mi mem kolonelo, en la vero li estis urba oficisto, sed lia grandega staturo, liaj voĉo kaj larĝaj manoj lin ŝajnigas plie oficiro, ol oficisto. Tuj mi elprenis por li du skatolojn de Lametta. Ĉiam li kutimas aĉeti tiun.

Nu, sinjoro, kiel vi fartas? Jes, alvenis la tempo! Kion vi diras? – li voĉtondris joviale. – Kiel kutime, Lametta-on mi petas. Nu jes. Mi

vidas. Vi jam elprenis ilin. Ja estas facile, por vi vendejistoj. La asocio de komercistoj zorgas pri vi. Aparta vagonaro. Certigitaj sidlokoj. Ĉu? Ĉe ni, ĉe la urbo, la ĉefoj jam forveturis, kaj nin, simplulojn lasis al la diablo. Estas feliĉe por mi, ke miajn idaĉojn mi forpelis jam antaŭ longe. Sed diru: kion mi faru kun mia malsana edzino? Kiam ankaŭ vi pakos?

– Mi restos – mi respondis, kaj klopodis ŝajni indiferenta.

Surprizite li silentis. Li gapis eksteren al la strato, kaj la du skatolojn li metis distrite en la poŝon.

– Nu, jes – li diris en nekutima, embarasita maniero, kaj subite turnis sin al mi, kaj etendis la manon. Ankaŭ tio ne estis kutima afero. Ŝajnis al mi, ke li ne decidis resti disciplinita. – Nu ĝis la... Adiaŭ mia amiko! Adiaŭ!

Kia grandega mano! Estas ridinde imagi, ke li skribis per ĝi ĉiutage en la oficejo. Hezitante li ekiris. Ĉe la pordo li returniĝis.

– Nu vidu, mi ne volas flati, sed tio... Via ago estas heroa... aŭ simila... Nu, vi scias, mi havas mian malsanan virinon. Mi ne povas resti. – Kaj li eliris.

Ie funkciis radio. Ĝi ripetis la saman avertan tekston. Dio scias jam kioman fojon. Ĉiam la saman tekston, nur la nomoj de la urboj ŝanĝiĝas. Kiam eksilentos la radio? Nu jes, ĝi eltenas longe. Oni ĉiam translokigas la dissendejon. Sed neniu povas eviti tion, kio proksimiĝas. Alvenos la tempo, kiam oni ne trovos lokon kiĉn translokigi ĝin. Ĝuste pro tio mi decidis resti.

– Ekiro je la kvardeka! – kriis iu antaŭ la vendejo. Ĝis tiam restis intervalo de duonhoro. Mi rigardis al la pendolhorloĝo, por alĝustigi mian brakhorloĝon. Sed ĝi haltis. Depost dudek du jaroj, nun okazis la unuan fojon, ke mi forgesis levi ĝin. Nu, ŝajnas, iomete mi forgesis la disciplinon, kun kiu mi volas atendi la venontan tempon. Mi levis la balaston, sed poste kion fari?

Mi ekmemoris, ke iam mi ĵetis en la butiktablon aventurromanon. Mi serĉis ĝin. La lastaj paĝoj mankis. Ĉu mi atingos ĝis la fino? Mi komencis legi. Mi miris, kiom mi povas atenti la legaĵon, kaj ankaŭ pro tio, kiom mi povas atenti min mem, la atentanton. Ĉu ĉiu homo povas fari same?

– Pardonu pro la ĝeno – alparolis min neatendite la edzino de la tapetisto, kiu dume envenis senbrue –, ĉu vi povus prunte-doni al mi grandan paperskatolon?

Tiu malfeliĉulino nun estas konsternita, ĉar mi legas. Laŭ ŝia opinio, kia konduto decas nun, kiam ili fuĝas? Tiu virino tute ne estas tiel antipatia, kiel ŝia edzo. Ĉiam mi miris, kiamaniere la tapetisto sukcesis ŝin kapti.

Mi iris malantaŭen, por serĉi paperskatolon, sed la pordon mi lasis malfermita iomete, kaj kaŝe rigardadis la virinon. Ŝi observis avide mian laboron. Preskaŭ mi ekridis. Tiu malfeliĉa ino imagas, ke sekreto estas skribita en la libro, kiun posedante mi ne bezonas fuĝi.

– Kian koloron havu la skatolo? – mi demandis ŝin moke, por iomete streĉi ŝiajn nervojn.

Ŝi ektremis, kvazaŭ ŝi estus kulpa.

– Tute egale – ŝi respondis – sed je Dio, mi petegas vin, rapidu. Ja restas duonhoro ĝis la ekiro.

Mi alportis al ŝi la skatolon, ŝi ekkaptis ĝin, kaj elkuris sen adiaŭo.

Ŝajnas al mi, ke ankaŭ al mi malutilis la ĝenerala ekscitiĝo, ĉar inter normalaj cirkonstancoj, mi nepre ne preterlasus la okazon ĉikani ŝin iomete. Mi residiĝis al mia libro, en kiu vagonaro fajfis. En la libro vagonaro fus estas fajfinta, kaj en la vero, ekstere vagonaro estas fajfonta. Oni rapidas ekstere al la stacidomo. Mi ĝojas, ke mi ne estas inter ili. Povas esti terura amaso tie. En tiaj okazoj mi ĉiam estas ege mallerta. Eble eĉ mi estus surtretita. Kia malfeliĉo estus malsukceso! Tie ĉi en la butiko estas multe pli bone. Mi povas atenti ankaŭ la libron. Mi ĝustigis eĉ preterlason, koncerne la pendolhorloĝon.

Jam estas preskaŭ tute vespere. Nun estas venonta la varmeta vento, tiatempe mi kutimas fermi la butikpordon. Nun mi ne emas fari tion.

Ŝajnas al mi, ke en la libro oni preparas elrabadon de vagonaro. La lokomotivo, kiu fus fajfis, nun ekaperas en la vojkurbiĝo. Kaj la kruelaspektaj viroj, kiuj fus ligis siajn ĉevalojn al la arboj, nun nerimarkeble ekkuŝas apud la fervojo. Nun venas en mian kapon, kiom da aferoj kaj agoj ankoraŭ mi eĉ ne provis. Nu, mi pensas ne ĝuste pri elrabado de vagonaro, sed certe estas multe da afoj, kiujn mi preterlasis.

La kolonelo ĝuste nun preterpaŝadas antaŭ la butiko.

– Mia kara, kiam mi estis en via aĝo... – li diras al iu. Li diras tion iom indigne, sed samtempe, ankaŭ joviale. Plaĉis al mi, ke en tiu konfuza situacio ankaŭ li konservis sian kutiman manieron. Sed mi ekmemoras, ke li forgesis pagi. Ĉu tamen li estas iom konfuza? Mi devis ekrideti. Mi sentis kompenson pro la pendolhorloĝo. Kio okazus, se mi irus post lin? – Pardonu, sinjoro! Du skatoloj...

– Ho, je la diablo! – li dirus. – Tute mi freneziĝis en tiu aĉa renversiĝo!

Ne. Ne estus bone. Mi lasu lin. Tiamaniere mi povas min senti iom supera. Kaj kio okazos pri la mono? Kiu scias?

Intertempe ŝajnas al mi, ke en la libro oni ne preparas rabon, oni volas nur kaŝi sin.

Dume la strato iĝis tute silenta. Mi rigardis al la horloĝo. Nur tri minutoj mankas. Mi volis legi plu, sed miaj kruroj preferus streĉiĝi. Malrapide mi elpromenis al la strato. Eĉ unu stelo ne vidiĝis. Jes. La radio antaŭdiris, ke tiel okazos. „Estas atendebla forta nubiĝo." Mi amblis al la transa flanko. De tie mi povis vidi la lagon. Ĉie sufoka silento. De malproksime, en la direkto de la stacidomo aŭdiĝas, ke la vagonaro malrapide ekiras. Se mi estus apud la fervojo, mi ekprovus. Mi ekkuŝus, kiel oni faras tion en la romano. Kia sento povas esti kaŝi sin?

Malrapide ekpluvetis. Ankaŭ tion antaŭdiris la radio. Mi ekiris al la lagobordo. Antaŭ la domo de la ĉefdirektoro mi haltis. Ĝi estis grandega fanfarona vilao. En la vestiblo lumis lampo, mi povis vidi ĝin tra la pordo,

lasita malfermita. Sur la planko kuŝis kaose afoj, paperoj, skatoloj, kaj ĉiaspecaĵoj. Mi eniris tra la ĝardenpordo. Nun unuafoje mi faras viziton en la ĉefdirektora domo. Mi eniris la vestiblon. Travadis sur la afoj, krakantaj sub miaj ŝuoj, kaj malŝaltis la lampon. Laŭ mia opinio, la malordo estas netolerebla.

Kiam mi staris denove en la ĝardeno, ia kantaĉo venis en miajn orelojn. Atendante mi atentis. Ĝi venis el la direkto de la lago. Jen. Mi ekkonis ĝin. La raŭkan voĉon de la almozulino. Ŝi estas ĉiam ebria. Mi ekvidis ŝin, baraktantan inter la ĝardenoj. Kompatindulino. Certe ŝi preterlasis la vagonaron. Aŭ ne? Estas eble, ke ankaŭ ŝi volas resti. Ni restis duope en la silenta urbo. La pluvo intensiĝis, dika pluvero trafis mian cigaron. Mi forfetis ĝin. Mi ekiris reen al la butiko. La folioj pendis senstreĉe de la arboj, kiel piedoj de mortaj anseroj. Tristega estas tiu urbo, perdanta siajn logantojn.

Unue mi volis fermi la pordon malantaŭ mi, poste mi tamen lasis ĝin malfermita. Mi kredas, ke hodiaŭ mi uzos dormigilon. Mi memoras, ke restis ankoraŭ kelke da piloloj.

Ĉu indas atendi, kio okazos?

Dolorĉesigo

Per premado – respektive per masaĝo – sur certaj punktoj de la plando eblas ĉesigi negravajn, sed des pli ĝenajn dolorojn de kapo, dentoj, dorso kaj similajn.

Sur la homa plando troviĝas ja t.n. refleks-zonoj, kiuj kontaktiĝas kun preskaŭ ĉiuj korpopartoj. Sur tio baziĝas la antikvaj dolorĉesigaj kaj terapiaj metodoj de la ĉinoj kaj hindoj. Ili ĉesigis dolorojn, kaŭzitajn de negravaj malsanoj, lerte masaĝante kaj premante diversajn partojn de la plando.

Pasis jarcentoj, kaj forgesiĝis tiuj praaj kuracmetodoj. Nuntempe oni pli kaj pli atentas la senmedikamentajn manierojn, inter ili la eblojn por ĉesigi dolorojn kaj misfunkciadojn de organoj, helpe de plandomasaĝo.

Por taŭga rezulto ne sufiĉos, se ni uzos nur la proprajn fingropintojn. Oni bezonas fakulon, kiu precizege trafas sur la plando la refleks-punktojn, la senskapablajn zonojn, kiuj transigas la efikojn al la opaj organoj. Tamen se iu multe praktikas, povos atingi post iom da tempo la kapablon fari por si mem la sanigan masaĝon. Plej konvene oni faru tion en kuŝa pozicio.

Kiel jam menciite, bona rezulto estiĝos nur okaze de ne tre gravaj misfunkciadoj, kiel la malregulaĵoj de digestado aŭ sangocirkulado, doloroj de kapo, reno aŭ galo. Se temas pri gravaj organaj malsanoj – galoŝtono, intestostopiĝo, akutaj inflamoj, ostaj rompiĝoj kaj krevoj k.a. – oni nepre turnu sin al kuracisto, ĉar memkuracado ne helpos.

Nervaj doloroj ĉesas, se oni masaĝas la fingropintojn de ambaŭ piedoj – sed tiam oni neglektu la dikfingrojn. Okaze de doloro oni faru dum kelkaj minutoj milde rondirajn masaĝajn movojn sur la punktoj indikitaj sur la desegno. La masaĝo estas ĝenerale per fingropintoj farenda, la ungoj ne estu tro longaj. Tamen ili ne estu tiom mallongaj, kio malfaciligus palpi kaj trafi la sensajn punktojn.

Vidu sur la desegno la plandajn refleks-zonojn (numeritajn); per ilia masaĝo ĉesos certaj doloroj, respektive funkciaj disturboj.



1.) Doloro kap-supre, migreno, kapdoloro
2.) hormon-funkciado
3.) streso, maldormemo
4.) nuka doloro
5.) nuk-vertebra doloro
6.) naza kataro (korizo)
7.) okul-laciĝo
8.) ganglion-formiĝo
9.) dentodoloro
10.) oreldoloro
11.) brustodoloro (masaĝi sur la dekstra plando, se ĉirkaŭ la koro: masaĝi sur la maldekstra plando)
12.) vertebro-doloro
13.) doloro de urinveziko, reno; metabolo
14.) stomako
15.) intesta inerteco, obstrukco
16.) talia doloro
17.) iskiatalgio
18.) doloro de sakro
19.) doloro de ŝultro kaj dorso.

Kompilis: László *Molnár*

SAGOJ KAJ DEHAKITAJ PIEDOJ

Arkeologiaj esploroj sur la areo de la Malgranda Balatono

Hodiaŭ ni nomas Malgranda Balatono la teritorion inter la vilaĝo Balatonhidvég kaj la enfluejo de la rivero Zala. Tamen tio ne estis ĉiam same. La Malgrandan Balatonon neniu dokumento mencias ĝis la jaro 1805. Pli frue Balatono estis konsiderata unusola kohera lago, kio tute ne estas mirinda, ja en la turka epoko (16-17-aj jarcentoj), sed eĉ en granda parto de la 18a jarcento la surfaco de la lago troviĝis 109 m-ojn super la marnivelo, sekve la tuta areo de la Malgranda Balatono kuŝis sub akvo plurajn metrojn alta. En la 1820-aj jaroj pro la seka vetero, kaj pro la reguligo de la kanalo Sió en 1831 la akvonivelo malaltiĝis ĝis 106-107 metroj, kio rezultigis sekiĝon de insuloj en la malsupra valo de Zala. En 1863 ekfunkciis la kluzo Sió, kaj la surfaco plu malaltiĝis ĝis 104,5 metroj. La valo de Zala kaj la Malgranda Balatono rapide marĉiĝis. En la nuna jarcento la riveron Zala oni prenis inter digojn por gajni plug- kaj herbokampojn. La digoj tra la Malgranda Balatono kondukas la riveron Zala al Balatono ĉe la suda fino de la terkolo Fenékpuszta. La rivero alportas sian sedimenton ne plu en la Malgrandan Balatonon, sed en Balatonon, kaj la golfo de Keszthely rapide ŝlimiĝas.

Por havi puran akvon

La problemoj preme aperis post la estigo de la granduzina agrikulturo, ja la rivero kaj la pluvoj liveris multe da kemiaĵoj kaj mineralaj sterkoj en la lagon. Pro la industriiĝo de la valo Zala plimultiĝis ankaŭ la polucia akvo. La lago fariĝis riĉa je nutraĵoj kaj ekabundis marherboj, kio minacis per neniigo la golfon. Fine de la 1970-aj jaroj la registaro energie ekagis por savi la lagon. Krom la limigo de uzado de kemiaĵoj kaj kreskigo de la kapacito de la akvopurigejoj la planoj enhavas ankaŭ la subakvigon de la Malgranda Balatono kaj de la malsupra etapo de la valo Zala. Tiel subakviĝos ĉirkaŭ 75 kvadratkilometroj. La unua ŝtupo de la subakvigo okazos en 1984 kaj koncernos ĉ. 20 kvadratajn kilometrojn. En la nova digosistemo la akvo restos 120 tagojn, dume demetiĝas ne nur la sedimentoj, sed malkombiniĝos ankaŭ la nitrogen- kaj forfor-enhavaj kemiaĵoj, do relative pura akvo enfluos la golfon de Keszthely.

Mistero de la sankta bosko

Jam en la periodo de la laborplanado komenciĝis la prospektorado de la tereno por malkaŝi, kiaj kaj kiom da arkeologiaj trovejoj subakviĝos kaj fariĝos neesploreblaj. Ni trovis pli ol kvindek trovejojn. La plimulto estis provizoraj restejoj, iamaj aziloj aŭ malgrandaj marĉaj fortikaĵoj, sed troviĝis ankaŭ tre gravaj arkeologiaj trovlokoj. Ni trovis preskaŭ sur ĉiuj insuloj objektojn el la 9-10-aj jarcentoj. Ili pruvas, ke la klimato ebligis loĝi 106-109 m-ojn alte super la marnivelo.

La savo de la arkeologiaj trovaĵoj komenciĝis en 1981 dank' al la subteno de Okcident-Transdanubia Hidrologia Direkcio. La elfosadojn gvidas arkeologoj de la departemento Zala kunlabore kun la kolegoj de la Hungara Nacia Muzeo kaj de la Arkeologia Esplorinstituto. Sub la direktado de la Balatona Muzeo okazis elfosadoj ĝis nun en du lokoj.

La unua trovejo estas leŭsa monteto apud Alsóbáránypuszta ekster la subakvigota aero. La elfosado estis necesa, ĉar la tero de tie estos portata por fortikigi la digojn. Troviĝis sporade loĝlokaj arkeologiaj materialoj el la kuproepoko, el la fino de la bronzoepoko kaj el la frua Romia erao, krome tomboj kun cindro el la bronza kaj el la frua cezara epokoj, tamen la vera interesaĵo de la trovloko estis la tombejo kun skeletoj el la malfrua periodo de la popolmigrado. El la malriĉiĝintaj posteuloj de la havarepoka populacio ĉi tie estas entombigitaj pli ol 300 kadavroj en 100 jaroj inter la mezoj de la 9-a kaj 10-a jarcentoj. La loĝantaro ĝisfine restis pagana, kvankam tiu areo tra la tuta 9-a jarcento apartenis al la Franka Ostmark, kie la misiistoj de la Salzburga ĉefepiskopejo energie konvertis jam ekde la jarcenta komenco. Pluraj fontoj mencias ankaŭ preĝejojn en la ĉirkaŭaĵo.

Jam la mapo de la tombejo sugestas, ke ĉi tie estas entombigitaj paganoj. En la centro de la tombejo, en cirklo kun 10-12 m-ojn longa diametro mankas la tomboj, aŭ eblas trovi nur kelkajn skeletojn orientitajn laŭ nordo-sudo aŭ sudo-nordo, diference de la ĝenerala okcidento-oriento. Tiuj areoj estis verŝajne arboriĉaj t.n. sanktaj boskoj, kie oni entombigis nur kuriozajn mortintojn. Malsame direktitaj tomboj troviĝas ankaŭ ĉe la rando de la tombejo. Ankaŭ la tomba lokigo de la mortintoj montras paganajn kutimojn. Krom la etenditaj estas malkovritaj ankaŭ ŝrumpigitaj skeletoj kaj mortintoj entombigitaj en diversaj „dormaj pozoj". Tamen la plej bonaj pruvoj pri la kredo de la transmonda pluvivo de la korpo estas la apudmetaĵoj. En preskaŭ 80 procentoj de la tomboj ni trovis ceramikaĵojn, en kiuj oni metis nutraĵon por la transmonda vivo. En la tomboj, kie ne estis ujoj, ripozis verŝajne tre malriĉaj aŭ la ujo estis farita el malkomponiĝemaj materialoj: ligno aŭ ledo. La komunumo estis socie tavoliĝinta, tamen eĉ la elituloj ne estis vere riĉaj. Ni ne trovis orajn juvelojn, ankaŭ arĝentaj elteriĝis sporade. Ili ne soldatis, ĉar ankaŭ la armiloj mankas. Nur en du tomboj estis sapogintoj, kiuj ne estas apudmetaĵoj, sed la sagoj estis pafitaj en la duone plenigitajn tombojn dum la entombiga ceremonio. Oni volis malebligi verŝajne la revenon de la spirito de la mortinto.

El la virinaj tomboj estas menciindaj la vitraj kolieroj, la orelpendaĵoj kaj la ringoj. La plej oftaj trovaĵoj en la viraj tomboj estas la feraj tranĉiloj, fajroŝtono kun fero, ŝtona akrigilo kaj razilo. Estas unikaj la „salujoj" el cervokorno, el kiuj sur unu estas videbla ankaŭ bele ĉizita ornamo. En la infantomboj estas ofta apudmetaĵo la bronza tintileto, kiun ili surhavis ankaŭ vivante, por ke la patrinoj sciu kie kuradas la infanoj. La juĝado de kulpuloj estis tre severa. Verŝajne la grava ŝtelado estis punata per la dehako de piedoj. Tio estas spertebla en tri tomboj. Du kulpuloj mortis pro la puno kaj iliaj dehakitaj piedoj estis metitaj apud ilin. La tria transvivis la „operacion", ĉar la tibio kaj la fibulo kunkreskis.

Kvankam la plej malfruaj restaĵoj devenas el la unua parto de la 10-a jarcento, tamen verŝajne la ĉi tieaj loĝantoj ne havis pli rektan kontakton kun la patrujkonkeraj hungaroj, ĉar eĉ unusola juvelo ne troviĝas, kiu apartenus al la karakteriza kostumo de la hungaroj.

Proksime de la eŭkaristio

En la alia trovloko, sur la insulo Borjúállás ankoraŭ daŭras la elfosado. Unue en la kuproepoko loĝis ĉi tie homoj, sed el tiu periodo ni trovis ĝis nun rubokavojn. Denove en la unua duono de la 9-a jarcento aperis loĝantoj, kiuj meze de la jarcento konvertiĝis al la kristanismo. Tiam ili ĉe la rando de la loĝloko ebenigis areon de 25x30 m, kaj ili plenigis per tero interalie ankaŭ tri putojn. La fenditaj lignotabuloj, kiuj servis kiel interna muro de la putoj, restis en bona stato kaj eminente montras la strukturon de la putoj. La ebenigitan areon ili ĉirkaŭis per palisaro: ili fosis ĉ. 70 cm-ojn profundan tranĉeon kaj la palisojn metis dense, kiuj ĉ. 2 m-ojn altis super la surfaco. Ankaŭ la 15 m-ojn longa kaj preskaŭ 7 m-ojn larĝa preĝejo fariĝis el ligno. La dimensioj konvenas al tiuj de la vilaĝaj preĝejoj en la epoko de la Árpád-dinastio. Evidente la senfundamentaj muroj ne postlasis signojn, tamen ni trovis partojn de la iama planko. Ie ekster la marĉo ili malkonstruis Romian vilaon, kaj ili kovris per ties murbrikoj la plankon de la preĝejo. Kie mankis la planko, tamen montris la manko de tomboj, ke ni estas sur la areo de la preĝejo, ekzemple en la apsido. Ili komenciĝis rekte ĉe la preĝejmuro, ekstreme dense apud la sanktejo. Tio estas katolika kutimo, ĉar la mortintoj estis tiel plej proksime de la eŭkaristio.

En la loĝloko vivis ĉ. 200 personoj. Ankaŭ la alta mortonombro de infanoj kontribuis, ke la tombejo baldaŭ pruviĝis malvasta. Tial la novaj tomboj estis fositaj sur la antaŭaj. Sude de la sanktejo ili surfosis eĉ kvin tombojn unu sur la alia.

La populacio, kiu entombigis siajn mortintojn ĉi tie, diferencis ankaŭ etnologie disde tiu en Alsóbárándpuszta. Ili estis sudaj slavoj alvenintaj en la 9-a jarcento el la teritorioj norde de Danubo. Tion pruvas plej bone la juveloj en la tomboj. Similaj objektoj estas troveblaj en la valo de Morava. Elstaras la orelpendaĵoj, el ili pluraj estas preparitaj el bonkvalita oro. Bronzaj juveloj raras, la plimulto estas arĝento kaj orizita arĝento. Estas aparte karakterizaj ankoraŭ la butonoj. Ĉe ambaŭ juvelspecoj la plej ofta ornamo estas la granulo kaj la filigrano.Kaze de la unua estas formitaj diversaj ornamaĵoj el globetoj, la dua signifas uzadon de torditaj kaj kanelitaj fadenoj. Tiuj juveloj estas delikataj majstraĵoj.

La ĉi tiea loĝantaro havis multe pli bonajn vivcirkonstancojn ol ĝiaj paganaj najbaroj entombigitaj 2 km-ojn proksime. La vivmaniero de ambaŭ komunumoj versajne ne diferencis grave. Ili ambaŭloke kulturis teron kaj bredis bestojn. Sur la insulo Borjúállás la unuan aserton pravigas muelŝtono, la duan ostoj de bestoj en la rubkavoj. Verŝajne havis gravan rolon ankaŭ la ĉasado, ĉar inter la bestostoj oftas ankaŭ restaĵoj de sovaĝaj bestoj. La diferenco estas klarigebla eble per tio, ke la insulo Borjúállás situas eĉ ne 800 m-ojn de la Fortikaĵinsulo Zalavár, al kiu el la loĝloko kondukis bone prikonstruita trabovojo. En tiu epoko la Fortikaĵinsulo estis ŝtatadministrada centro de la tuta Okcidenta Transdanubio, kiun la siatempaj fontoj nomis *Mosaburg* aŭ *Blatnograd* t.e. Marĉa Burgo. El la skribaj dokumentoj ni scias, ke *Mosaburg civitas* situis sur pluraj insuloj. La loĝloko sur insulo *Borjúállás*, do eble estis *suburbium*, suburbo de Mosaburg. La loĝantoj okupiĝis ne nur pri produktado de nutraĵoj. Ni trovis la restaĵojn de iu forĝejo kun preskaŭ 20 kg-oj da neprilaborita molfero. La multaj ostaj iloj pruvas la prilaboron de ostoj kaj ledoj.

En la vivo de la komunumo okazis iuj ŝanĝiĝoj post la apero de la patrujkonkeraj hungaroj. Estas plej okulfrape, ke la palisara muro ne estis renovigita, kvankam ĝi ruiniĝis ĝis la komenco de la 10-a jarcento. La ankoraŭ uzeblaj palisoj estis eltiritaj kaj ilia loko estis plenigita per rubaĵo. Jam ne plu estis io baranta la vastiĝon de la tombejo. Estis neniigitaj ankaŭ aliaj loĝlokaj konstruaĵoj, ĉefe sude de la preĝejo, kie estis fositaj novaj tomboj. La tombejo preskaŭ duobliĝis, kaj entombigoj unu sur la alia ĉesis. Evidente ankaŭ ĉi tie estas spertebla iuspeca malriĉiĝo en la 10-a jarcento. Tion montras ne nur la manko de valormetalaj juveloj, sed en la tombejparto el la 10-a jarcento tre raras lignaj ĉerkoj. Verŝajne la eminentuloj forfuĝis kaj rompiĝis aŭ almenaŭ malfortiĝis la pli fruaj nordaj kaj okcidentaj komercaj kontaktoj.

La loĝloko, laŭ la ĝisnunaj trovaĵoj, ĉesis meze de la 10-a jarcento. Ĝin ĉesigis ne perforta pereigo, ja spuroj de incendio ne troviĝas. La ĝustan kialon de la foriro ni ne konas. Eblas, ke sekvis malseka erao kaj la akvosurfaco altiĝis, pro kio la loĝantoj devis forfuĝi aŭ eble meze de la 10-a jarcento la plifortiĝinta hungara potenco, kadre de lokigo de la loĝantaro, asignis novan loĝlokon por la ĉi tie vivantoj. Ĉi lastan subtenas, ke preskaŭ samtempe ĉesis la enterigo en ambaŭ tombejoj kaj malfermiĝis la plej frua hungara tombejo en Zalavár. La esploroj daŭras en la trovloko, kiu estas tre interesa ankaŭ el scienca vidpunkto.

D-ro Róbert *Müller*
direktoro de Balatona Muzeo
Keszthely

Ĉizita salujo el cervokrono



Orelpendaĵoj ornamitaj per granuloj kaj filigrano



GAJA PAĜO

Ĉu kurioza?

– Mirinde! Via kvarjara fileto legas HUNGARA VIVO-n en la korto! Ĉu li vere scipovas jam legi?
– Kion vi imagas?! Li nur solvas la krucenigmon!

Ĉu stranga reklamo?

„Amuziĝu en nia fama restoracio! Eminenta kuirejo, bonega orkestro! Ĉiulunde vespera programo, biletoj ĉe la kelneroj. *Paŭzotago: lunde.*"

Ĉu kurioza paciento?

– Kiel vi fartas? – demandas la kuracisto de la malsanaspekta pacienco, kiu memfide respondas: Iom pli bone, ja mi severe sekvis la preskribon sur la medikamento.
– Ĉu vere? Kiun preskribon?
– Estis sur la etikedo: „Tenu ĝin strikte fermita."

Ĉu helpos pacienco?

– Via koro funkcias ja pli regule, ankaŭ via sangopremo kondutas pli ĝuste, la temperaturo konvenas: nur paciencon, paciencon...
– Mi vere ĝojas, doktoro – eligas la malsanulo per apenaŭ aŭdebla voĉo –, ke mi mortos sane...

Ho, tempoj...

La knaboj de la 8a klaso sendas leteron al la samklasaj knabinoj: „Venu posttagmeze en la parkon. Estus agrable iomete kisadi."

Baldaŭ venas la respondletero: „Skribu al la knabinoj de la 6a klaso! Ni jam iris pluen."

Ho, moroj...

– Ĝis la revido, kara sinjoro! – diris la matrikulisto post la geedziĝa ceremonio. – Ankaŭ alifoje mi staros je via dispono!

Ho, memoroj...

Ĉe la polico bier-odora junulo anoncas, ke lia edzino malaperis post drinkeja amuzado.
– Kiam okazis tiu amuzo? – interesiĝas la oficisto.
– Antaŭ kvar semajnoj.
– Kial nur hodiaŭ vi anoncas tion?
– Ĉar nur hodiaŭ matene mi rememoris, ke iam mi havis edzinon...

Ne nova metodo

– Grandiozaj estas viaj penadoj, profesoro – entuziasmas ĵurnalisto –, tiel vi vere sukcesos fari bebon en vitro! Sed ĉu vi ne provos foje per la tradicia metodo?



In-digno

Junulo fiere montras sian novan aŭton al la amikino. Unu butonpremo: fenestro malfermiĝas. Dua butonpremo: la tegmento de la aŭto foriĝas. Li premas alian butonon, kaj ventilatoro levas la jupon... Kolere ŝi ekkrias: Je diablo, ĉu propramane vi faras jam nenion?

In-cito

– Terure incitas min – plendas viro al amiko noktomeze ĉe stratangulo – kiel mi klariĝos al mia edzino, kie mi pasigis la vesperon?
– Neniom meditu! Rompu ŝi mem sian kapon pri tio!

Ĉu tiel okazis?

– Mi jam nenion diros al vi! – bolas la edzino.
La edza ĝemo mallaŭtas: – Nu, bone. Sed mallonge!

E.F.



Pri kio vi babilas kun mia antaŭa edzo?

SUBSKRIBO DE TRIJARA KONTRAKTO – LA PRODUKTADO JAM ĈIJARE KOMENCIĜOS

La Linŝpina kaj Teksindustria Entrepreno „Budaflax" kaj la brita firmao „Lee Cooper" – kun la perado de la Komercevoluiga AS „Intercooperation" – subskribis kontrakton por trijara kunlaborado.

La Teksfabriko de „Budaflax" en Csillaghegy (Budapeŝto) – jam konata sur la hungara merkato per la ŝatata kaj serĉata ĝinzo-ŝtofo de marko „Trapper" – surbaze de intensa teknologia evoluigado nun ekproduktis bonkvalitan ĝinzo-ŝtofon, kiun la brita firmao „Lee Cooper" trovis taŭga por tio, ke konfekciaĵoj faritaj el ĝi aperu sur la internacia merkato kun la markoŝildo „Lee Cooper".

Por la uzo de la markoŝildo „Budaflax" pagas procentaĵon al la brita firmao, kaj la hungara entrepreno mem akiras ankaŭ la maŝinojn, necesajn por la konfekciaj laboroj.

Surbaze de la tajlomodeloj kaj teknologio de la firmao „Lee Cooper" la konfekciajn laborojn plenumas la Vestaĵ-Kooperativo „EKISZ" kaj la Vestindustria Kooperativo. La produktado jam ĉijare komenciĝos, kaj atingos la dimensiojn de jare 250-300 mil ĝinzoj. La plimulto de tiuj ĉi laŭmode tajlitaj ĝinzoj iros al la hungara merkato, pere de la Vestokomerca Entrepreno „FER". Per tiuj ĝinzoj eblos anstataŭi okcidentan importon, kaj entute, ampleksiĝos la oferto de ĝinzoj sur la hungara merkato. Malpli grandan parton de la ĝinzoj kun marko „Lee Cooper" la Entrepreno „Budaflax" vendos al landoj kun internacie ŝanĝebla valuto.

Dum la daŭro de la trijara kunlabora kontrakto la firmao „Lee Cooper" disponigos al la hungara partnero ĉiujn informojn lige kun la produktado: teknologiajn kaj organizajn dokumentojn, kaj la novajn modkolektaĵojn. La fakuloj de la brita firmao sisteme vizitos la hungarajn produktejojn kaj donos konsilojn. Laŭ la kontrakto la protekto de la marko „Lee Cooper" kaj la konservado de la produktaĵoj estas la devo de „Budaflax".

La firmao „Lee Cooper" estas la plej granda produktanto de ĝinzoj en Eŭropo. Tiun ĉi grandan firmaon, kiu laboras en 16 landoj de kvin kontinentoj, fondis en 1908 Morris Cooper.

Unue ĝi produktis nur laborvestojn, dum la dua mondmilito ĝiaj uzinoj produktis la uniformojn de la brita armeo. Kiel kutime, la patron sekvis la filo ĉe la kapo de la entrepreno, kaj tiu juniĝo signifis ankaŭ la aperon de novaj produktaĵoj, kaj novan nomon por la firmao. La juna Harold Cooper – el la literoj de la propra nomo kaj el tiuj de la nomo de la edzino – kreis la nunan markon kaj startigis siajn ĝinzojn por konkeri unue Eŭropon kaj poste la tutan mondon.

Laŭ la licenco de la brita firmao en la fabrikoj de kvin kontinentoj oni produktas milionojn da ĉiam ŝatataj ĝinzoj. Malgraŭ la ĉiam pli ofte aŭdeblaj opinioj, laŭ kiuj la bluaj ĝinzoj eksmodiĝas, la firmao „Lee Cooper" opinias, ke tio neniam okazos. Kaj ŝajnas, ke ĝi pravas, ja la faktoj pruvas, ke malgraŭ la ĝenerala ekonomia regresado indas daŭre kreskigi la produktadon. La aĉetado de ĝinzoj ne malkreskas, eĉ, ĝi kreskas. Dum la lastaj dudek jaroj la vendoj de la firmao kreskis je 3000 %.

La sekreton de la sukceso la fakuloj vidas en la elasta adaptiĝo al la modo. La firmao ne persistas ĉe la tradiciaj fasonoj, la pantalonoj, jakoj, T-ĉemizoj kaj ĉemizoj fidele sekvas la modon. La kunlaborantoj de „Lee Cooper" asertas, ke – malgraŭ la ĝenerala supozo – ĝinzo devenas ne el Ameriko, sed el Eŭropo. La materialon de la blua ĝinzo la faka lingvo nomas „demin". Tiu nomo devenas el la nomo de la franca urbeto Serge de Nimes: tie oni produktis la unuan fojon dense teksitan kotonan ŝtofon, farbitan per indigo. Kaj la nomo „ĝinzo" venas de la Ĝenovaj maristoj, kiuj estis la unuaj uzantoj de la nedetrueblaj pantalonoj.

(X)

Grava propagandilo

Esperanto en la moderna mondo. Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj. Kompilis Rüdiger kaj Vilma Sindona Eichholz. Pliampleksigita dua eldono. 600 p. 21 cm. Bindita. Esperanto Press, Bailieboro, Ont., Kanado.
Prezo: 25,- usonaj dolaroj.

Jen klara kaj vasta informaro por kleruloj ne-esperantistoj, kompendia biblioteka manlibro, kies aspekto ekstera-interna jam impone impresas la foliumantojn. Ĉar ĝi devas informi eksterulojn pri la titoltemo, la enhavo estas dulingva: angla kaj iom malpli Esperanta. Estas taŭga la vortaro-gramatika prezento de nia lingvo: la fama letero de Zamenhof al Borovko ŝajnas aparte konvena por la interesiĝantoj.

La kompilintoj dediĉis grandan parton de la libro al la diversaj kapabloj de Esperanto, montris ĝian plenan maturecon por solvi taskojn de literatura kaj kultura komunikado inter la nacioj. Altvalora estas la studo de W. Auld: „La IL kiel tradukilo por literaturo", kaj ankaŭ aliaj daŭre validaj CED-dokumentoj, koncernantaj la temon. Kuraĝa kaj nekutima, do tiom pli interesveka ŝajnas la priskribo kaj propono de Vilma Sindona Eichholz pri la justa dulingvismo por Kanado, kie vivas minoritatoj kiel „blankaj negroj de Ameriko". Mankas loko por mencii ĉiujn seriozajn studojn: esperebleTroviĝos multaj, kiuj konsultos ĝin inter ĵurnalistoj, politikistoj, internaciaj organizaĵoj ktp.

Ilustraĵoj kaj foto-represaĵoj estis abunde kaj lerte elektitaj el fakaj kaj aliaj vortaroj, libroj, reklamoj kaj periodaĵoj por pruvi laŭ okulfrapa maniero la modernan praktikan uzadon de Esperanto: interalie ankaŭ el la eldonaĵoj de HEA kaj HV mem (intervjuo kun la kosmonaŭto Bertalan Farkas). Ĉio ĉi multe helpas la argumentadon de tiu plenzorge redaktita, kun amo presita kaj en bibliotekoj jam ne malhavebla libro.

Ervin *Fenyvesi*

Aroma lingvistika koktelo

Atanas D. Atanasov: La lingva esenco de Esperanto. UEA, Rotterdam, 1983. p. 175, 21 cm.
ISBN 92 9017 024 7.
Prezo: 27,- ned. gld.

La aŭtoro de ĉi tiu esearo Atanas Dančev Atanasov estis unu el la pioniroj de la Esperanto-movado. Li, 16-jara gimnaziano ellernis Esperanton en 1908 kaj ĝis sia morto en 1981, dum pli ol 70 jaroj restis aktiva. Esperantistoj en ĉiuj anguloj de la mondo konis lin jam antaŭ la dua mondmilito pro la bone ĉizitaj tradukoj el la bulgara literaturo. En 1963 li fariĝis prezidanto de Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj, en 1964 membro de Akademio de Esperanto kaj inter 1968-1969 ties vicprezidanto. Kiel filologo kaj laŭ instruiteco kaj laŭ korinklino ofte li aperigis artikolojn pri lingvaj demandoj en la Esperantlingva gazetaro.

Ĉi tiu verko esence estas la kolekto de tiuj artikoloj, redaktita, polurita de la verkanto mem, sed aperinta – bedaŭrinde – nur post la finiĝo de lia 89-jara riĉa vivo.

La volumo, bone legebla ankaŭ de esperantistoj, kiuj ne havas lingvistikan instruitecon, komenciĝas per prezento de la „propra logiko de Esperanto kiel lingvo". La aŭtoro trafe klarigas, ne postuli de interhoma lingvo matematikan logikon, sed por glate kaj elegante konstrui frazojn en iu lingvo oni devas ekkoni kaj aŭtomate apliki logikon de iu lingvo. Tiu logiko ne estas alia ol la scio pri la rilatoj inter la elementoj de la lingvo; do la specifa dinamika sistemo, la esenco de la lingvo. Ĝuste tia specifa partosistemo de Esperanto prezentita en la sekva artikolo estas la vortfarado en Esperanto. Sur dekduo da paĝoj vi povas legi resume ĉion, kion devas scii pri tio ĉiuj Esperanto-parolantoj.

La priskribo de fonetiko-fonologio de Esperanto estas nepre laŭdinda, des pli, ĉar tiu tereno de la lingvo kaj parolo ne estas sufiĉe prilumigata far la gramatikistoj kaj lernolibro-farantoj en Esperanto.

La valoro de resumo pri la ata/ita problemo troviĝas en tio, ke la aŭtoro prezentas la konsiderojn de la diversaj opiniantoj tute objektive kaj montras solvon dialektikan.

En aparta artikolo estas traktitaj kelkaj prepozicioj (la problemaj) el la vidpunkto de uzado. Ankaŭ la priju̇ĝo de la neologismoj, sinonimoj, homonimoj, onomatopeoj kaj interjekcioj fontas el la praktiko. Sen doni severajn opajn regulojn, la aŭtoro montras, kiel funkcias la „esencaj" bazaj determinantoj de la lingvo ankaŭ en ĉi tiuj okazoj.

Pri la propraj nomoj en Esperanto ADA preferus la fonetikan transliterigon, kiel la slavoj tion faras, sed **estas** preta akcepti la praktikajn kontraŭargumentojn de Henrik Seppik. Tamen li, bedaŭrinde, ne distingas inter la kategorioj de propraj nomoj.

Certe pro multaj legantoj estos instruaj ankaŭ la eseetoj pri opaj demandoj de la lingvouzo, la abundaj notoj kaj referencoj al libroj, artikoloj detale traktantaj iun lingvan fenomenon.

Ne troviĝas en la kolekto ĉapitroj disklasigantaj lingverojn en klasikajn kategoriojn, nek streboj krei skatolojn kaj ĉion fermi en ilin. Kompreneble ĝi ne estas anstataŭiganto de Plena Analiza Gramatiko (PAG), sed se vi timiĝas pro la ŝajna komplikeco de la facila Esperanto, prenu la recenzatan verkon. Se vi prenas PAG post la tralego de la *Lingva esenco,* vi jam pli bone komprenos la strukturon, kiu estas konstruita ne nur laŭ la tradiciaj postuloj de hindoeŭropaj gramatikistoj, sed kompreneble ankaŭ sub la influo de la specifa logiko de Esperanto.

*

La vorto „esenco" en PIV havas ankaŭ la difinon „densigita eltiraĵo el iuj substancoj ordinare bonodoraj aŭ aromaj." Mi sentis en la verko ankaŭ la kapablon de la aŭtoro porcii la esencon tiom, ke la koktelo restu bongusta kaj digestebla.

Kiam mi rekomendas la libron al ĉiuj esperantistoj dezirantaj ekkompreni funkciadon de tiu lingvistike specifa fenomeno, kiu estas la internacia artefarita lingvo Esperanto, mi esperas, ke legantoj lernos ne novajn regulojn, normojn, kiuj limigas la eblecojn krei gramatike ĝustajn frazojn, sed inverse, rekonante la specialajn internajn leĝojn de Esperanto (iom diferenca de la aliaj lingvoj) ili riĉigos siajn lingvajn rimedojn krei stile novajn, ankaŭ en nuancoj precizajn kaj en Esperanto tute hejmecajn frazojn.

*

Estas bedaŭrinde, ke preseraroj estas sufiĉe multe, des pli, ke ili ne estas facile malkovreblaj, la rezultaj eraraj vortoj ja en si mem estus korektaj, oni povas nur el la kunteksto eltrovi, kiu litero estas ŝanĝita, al-

donita aŭ ellasita. Krom kelkaj ĉagrenaj forestoj de akuzativaj finaĵoj estas troveblaj ankaŭ amuzaj tekstopartoj. Al mi pleje plaĉis referenco al verko de Kalocsay: Vojaĝo inter la temploj, Stafeto, 1966.

Tibor *Vaskó*

Sparkanta sprito

Kristiano Morgenŝterno: Palmŝtrojmo. El la germana tradukis Rikardo Ŝulco. Eldonis: Esperanto-Centro Paderborn, 1983. 19 cm. 181 p.
Prezo: 14,80 okcidentgermanaj markoj.

Kristiano Morgenŝterno – Christian Morgenstern (1871-1914) estas unu el la plej interesaj figuroj de la germana poezio. Lia verkaro havas minimume du vizaĝojn: unu melankolian kaj unu burleskan, groteskan.

Traduki melankolian poezion en Esperanton ne estas aparte malfacila – la modeloj, lingva kaj stila, ekzistas, ja granda parto de niaj poetoj portis kaj portas en sia koro la doloraron de la tuta homaro, kaj ili ne hezitas elversi kaj elversi ĝin en siaj poemaroj. Sed traduki pike ŝercajn, subtilaludajn, tamen krude simplajn poemojn, kiuj ĝuste per siaj krudo kaj simplo havas artefikon –tio en Esperanto estas taskego.

Mia germana lingvoscio estas tro mizera, por arogi kompari la tradukojn kun la originalo, sed fakte mi eĉ ne bedaŭras tion. Min kontentigas la fakto, ke la tradukinto prezentis al mi Esperantan version sparke spritan, impone simplan, sencosaturitan, ĝuindan. (Pro respekto al tiu plenumo, mi ne ekdiskutas kun li ĉi tie pri la esperantigo de ĉiuj propraj nomoj...)

La du protagonistoj de la verskolekto – Plamŝtrojmo kaj De Korfo – estas du tipoj, tamen kun trajtoj tre individuaj: kiel en la „Prologo" legeblas, Plamŝtrojmo estas imagita ekzistanta persono, De Korfo estas imagita senekzisteca persono. Kaj ili ambaŭ prezentas al ni en groteska spegulo la medion, en kiu ili vivas. La poemvicon foje-foje interrompas prozaj paĝoj, sur kiuj la tradukinto kvazaŭ prikomentas en Morgenŝterna stilo Esperantajn temojn. Unue mi ŝokiĝis pro tio, sed poste vere mi ĝuis tiujn komentojn.

Jen, poemaro, kiun eblas rekomendi ne nur al poeziamantoj, sed al ĉiu esperantisto, kiu ŝatas la humuron, kaj ŝatas ankaŭ pensi.

Vilmos *Benczik*

Fabelo pri la honesteco

Ora hakilo. Teksto de Fang Yuan. Bildoj de Yang Yongqing. Kolorilustrita fabelo. Eldonis Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 24 cm. 32 p. Prezo por Hungario: 45,- forintoj.

Kvankam sur la libro staras la indiko „Unua eldono, 1983", la sama fabelo kun pli abunda teksto kaj pli modestaj ilustraĵoj plurfoje aperis jam antaŭ dudeko da jaroj. Tamen, tiu ĉi eldono estas nepre havinda ankaŭ por tiuj, kiuj posedas iun el la malnovaj, ĉar la viglakoloraj, majstraj ilustraĵoj estas unike belaj.

La fabelo temas pri la honesteco de la malgranda knabo Xiasouo. Li perdas sian feran hakilon, kaj poste, kiam maljunulo kun blanka barbo proponas al li arĝentan, eĉ oran hakilon, li ne profitas la okazon riĉiĝi, sed akceptas nur la propran feran hakilon.

La simpla lingvaĵo, la belaj desegnaĵoj kaj ne laste la naive ĉarma didaktika enhavo taŭgigas tiun ĉi novan ĉinan eldonaĵon ankaŭ por lerneja uzo.

V. *Benczik*

ropolsaĝo de naciaj minoritatoj

Saĝo-sako. Ĉinaj popolaj rakontoj. Tradukis Fan Yizu. Polurita de Geoffrey Sutton. Ilustrita de Tian Yuan kaj Jin Ming. 18 cm, 74 p. Prezo por Hungario: 40,- forintoj.

La bele ilustrita volumeto enhavas mallongajn rakontojn el la folkloro de naciaj minoritatoj, vivantaj en la Ĉina Popola Respubliko: mongoloj, tibetanoj, kazaĥoj kaj la Jaŭ-nacieco. Ĉiuj rakontoj estas humuraj, kaj la kerna temo estas la venko de la popola saĝo super la riĉuloj.

Kelkaj el la temoj estas konataj ankaŭ el alia fonto, ekzemple tiu de la kazaĥa rakonto „Odoro de Manĝaĵo kaj Sono de Mono" – en la kazaĥa heroo Hoĝa Nasar ne estas malfacile rekoni la universalan popolfiguron de la islama mondo. Tio bele demonstras, ke la popoloj ne nur diferencas unu de la alia, sed montriĝas inter ili ankaŭ multaj parencaj trajtoj.

La mallongeco de la rakontoj taŭgigas ilin bone servi kiel postkursa – eble eĉ dumkursa – legaĵo, ja la simplaj temoj tute nature ricevas ankaŭ simplan lingvan veston. Sed, kompreneble, povas ĝui la freŝon de la popola humuro ankaŭ spertaj esperan-

tistoj, sen fari lingvan aŭ literaturan kompromison.

V. *Benczik*

Kio estas por vi Esperanto?

Detlev Blanke: Pri la „interna ideo" de Esperanto. Eseo. (Kion scii por organizi nian movadon? Diskutmaterialo. N-ro 2.) Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982.
21 cm, 29 p.
ISBN 963 571 046 1.
Prezo: 3,- ned.gld.

HEA tute prave represis broŝure la jam konatan eseon de Detlev Blanke, kun la espero, ke la kajero fariĝos diskutmaterialo en la Esperanto-kluboj.

La verko strebas malmistikigi iujn ideojn, kiuj ŝvebas inter la esperantistoj, meti la koncepton de la internacia lingvo sur materiisman fundamenton. La aŭtoro faras tion tre lerte, komprenante kaj komprenigante la altirfortojn de Esperanto.

Ĉu tamen Esperanto posedas iun „internan ideon"? Ni devas konsenti kun la aŭtoro, ke nek Esperanto, nek iu nacia lingvo, same kiel neniu alia instrumento, enhavas ideon. Sed, certe, ĉiu instrumento estas kreita por iu celo. La toporo havas la ĉefan celon hake utili al la homo. Ĝi tamen povas esti uzata ankaŭ kiel detruilo aŭ eĉ mortigilo.

Esperanto estas kreita por komunikado inter diversaj popoloj. Tio estas ĝia ĉefa celo, aŭ, metafore parolante, ĝia interna ideo. En diversaj cirkonstancoj la interna ideo iom aliformiĝas, konservante tamen sian esencon. Por la nuna tempo oni povas, en ĝeneralaj trajtoj, formuli ĝin jene: „paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj."

Tiel rezonante, oni povas konkludi pri sinonimeco de la nocioj „ĉefa celo de Esperanto", „la interna ideo de la Esperanto-movado", „la esperantismo".

Kompreneble, ĉiu esperantisto havas sian ideologion, do ne ekzistas iu unueca ideologio de la Esperanto-movado.

Kio do estas la altira forto de Esperanto? Tio estas la avantaĝoj, praktikaj kaj emociaj, kiujn donas la uzado de la internacia lingvo.

Ni revenu al la analogio kun la toporo. La hakisto amas sian instrumenton, se ĝi estas bonkvalita kaj taŭga por plenumi sian ĉefan celon. Simile, la esperantistaro amas sian instrumenton eĉ pli, ĉar ĝi konsideras ĝin bona, bela kaj plenumanta sian ĉefan celon: servi kiel ilo de transnacia komunikado. Sed ĉar la esperantistoj, same kiel aliaj homoj havas idealojn, ili penas kunigi siajn idealojn kun la esperantismo.

Detlev Blanke tute pravas dirante, ke tiuj idealoj jam ekzistis kerne de la mondkoncepto de la „ankoraŭ-ne-esperantisto", kaj plue, ke la „mistika forto" de Esperanto kuŝas ne en la lingvo mem, sed en la efiko de la komunikada procezo.

Iam, finante prelegon pri Esperanto, kaj rimarkinte la entuziasmiĝon de la aŭskultantoj, mi eldiris penson, kiu subite venis al mi: „Rigardu viajn amikojn, konatojn, kolegojn, najbarojn. Pri multaj el ili vi povos plimalpli certe supozi, ke ili povus fariĝi esperantistoj, sed pri kelkaj el ili vi estos absolute certaj, ke tiuj neniam fariĝos esperantistoj." La aŭskultantoj aprobe ekbruetis.

Do, legu la broŝuron, pridiskutu ĝin en via klubo, formu vian opinion.

Boris *Kolker*

Noveloj kontraŭ elmigrado el Esperantujo

Lorjak: Iluzioj. Originala novelaro. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, 1982, 21 cm, 182 p.
ISBN 963 571 082 8.
Prezo: 18,- ned.gld.

Tiun ĉi libron mi legis per unu spiro. Nu, ne tute per unu, ĉar dufoje mi devis stumbli: post la novelo „Ĝemeliĝo" sekvis ĝiaj tradukoj en la franca kaj angla, kaj post la novelo „Ŝŝ" pro la sekvanta franca traduko. Mi tralegis ankaŭ la tradukojn, kvankam malpli rapide kaj ne tute komprenante la kialon de ilia apero. Eble tio estas instigo al imito? Kial ne? Ekzistas ne tiom multaj originalaj Esperantlingvaj verkoj, kiuj estas tradukindaj nacilingven. La libro de Lorjak apartenas al tiu elito.

Ne, tiu ĉi libro ne apartenas al la klasikaĵoj. Ne svarmas en ĝi filozofiaj kaj edifaj temoj. Kaj tamen ju pli da tiaj libroj, des malpli da personoj elmigros el Esperantujo. Ĉar ĝi estas nutraĵo facile digestebla per ajna stomako – eĉ per tiu de komencanta esperantisto.

La libro konsistas el dek noveloj kun unuvortaj titoloj – la plejparto de tiuj noveloj jam aperis en revuoj. Kunigite ili prezentas sufiĉe homogenan libron, leĝeran legaĵon kun iom samŝablona strukturo, karakterizata de frape surpriza fino. Mi elĵetus nur la lastan novelon „Simipapag'", pro ĝia „sendenteco".

La libro estas saturita per franceca humuro, indulga ironio, kun pluraj aludoj pri movadaj trajtoj.

Jen la fama franca verkisto, sub influo de subita amo al japanino, kaj kreanta senmortajn verkojn, kiu ne suspektas, ke li estas mistifikata; dum la mistifikanto ne scias, ke mistifikata estas ankaŭ li („Iluzioj").

Jen la kompatinda juvelisto, decidanta mortigi sin pro kokro far la edzino. En tiu fatala momento lin ekturmentas cerbumado pri gramatikaj subtilaĵoj. La tragedio finiĝas kiel komedio, je ĉies kontento („Paf").



Jen pere de Esperanto komenciĝas internacia interŝanĝo de spertoj por preventi sinmortigojn – kaj poste por ilin stimuli. La farso finiĝus per geedziĝo. („Ĝemeliĝo").

La supraj estas nur kelkaj fantaziplenaj temoj el la multaj.

Kelkaj lingvaj peketoj, kiuj min ŝokis, dronas en amaso da freŝaj (mi dirus: plezurigaj) vortoj kaj parolturnoj. Konklude: ju pli da Lorjak-oj kaj Lorjak-aĵoj des pli bone.

Boris *Kolker*

Leterkesto

Ernst Diedrich, Warin, GDR: „Pli kaj pli da niaj lingvaj aŭtoritatuloj emas malfaciligi E-on per novaj, intentitaj reguloj" – vi skribis plende. Sendube, oni rimarkas ne malofte tiun malkonvenan, la lingvon katenigantan kaj la movadon bremsantan regulofabrikadon. Inventi arbitre regulojn estas ofte spertebla *konduto,* ekzemple ĉe oficistoj, juristoj, burokratoj, eĉ ĉe „potenculoj" kiel dommajstroj... La menciita fenomeno havas do siajn psikajn fontojn, kvazaŭ naturajn; tamen oni devas ĝin kaj la inventitajn regulojn repusi, ankaŭ neglekti! Aliflanke oni devas konscii, ke malgraŭ la tro memfida deklarado, tiuj E-aj „reguloj" estas plejofte *nur proponoj* por la „alta stilo", kaj ne por la ĉiutaga lingvouzo. Dependas de gustoj, de la aŭtoroj, ĉu dum literatura verkado ili respektos tiaspecajn proponojn. Ni konsentas, ke estus dezirinde, se tiuj gramatikistoj sen aplombo moderigus siajn reguldeklarojn, anoncante, ke tiuj spegulas *nur opiniojn.*

Carlo Geloso, Rosta, I: Certe, indas „semi konstante". Dankon pro via informo: vi tradukis en la italan la artikolon de prof. *László Deme:* Pli ol nura revado (1983/3, p. 84) por publikigi ĝin en itala lingvistika revuo kaj aliloke. Ni esperas, ke tiu spiritkapta pledo de prof. Deme por Eo havos bonan efikon inter la fakuloj-legantoj. En tiu direkto ege necesas ĉiu ajn antaŭpaŝo; do similaj agoj estas vere dezirindaj ankaŭ en aliaj landoj por utiligi tiun ĉi gravan elpaŝon de renoma fakulo.

Mag. Adamo Zabek, Tychy, PL: Ni ĝuis gajajn minutojn, dum ni legis, kiel vi instruis „superekspresе" hungarajn vortojn al pola vojaĝgrupo, sprite kaj amuzante. Perfekte! Ni rekomendas ĝin regule utiligi ĉe polaj karavanoj veturantaj al Hungario, ja oni devas konscii, ke dum eksterlanda vojaĝo *almenaŭ eta kono* de la loka lingvo estas nepre necesa. Ververe nenia „mondlingvo" faras tion superflua en nia epoko. Escepto estas nur se oni volas pasive pasigi la vojaĝon, plene dorlotite de la vojaĝburoo, do ne kiel veraj esperantistoj kutimas. Aliflanke, ekzemple „Esperantotur" povus per simila maniero profundigi la E-scion de siaj pasaĝeroj ekveturantaj al Esperantujo...

Gisella Marchioni, Gallarate, I: Kiam vi studas „Gvidlibro por supera ekzameno" k.s. librojn, la legadon ne devas malhelpi la nekonata *elparolo* de la aŭtoraj nomoj. Vi ja ne devas laŭtlegi! En venonta eldono indiki la proksimuman elparolon, estus vere bonvene, kvankam tio ne estas internacia kutimo (en italaj libroj ni ne rimarkis tiajn indikojn pri fremdaj nomoj!). Oni diskutas jam, ĉu uzi en Eo ankaŭ fremdajn literojn ĉe kelkaj nomoj (W, Y); sed kompletigi nian alfabeton per nur fonetikcelaj literoj (anst. Romagna: Romanya? ?) ŝajnas danĝera vojo. Precipe pro la valida principo: al ĉiu litero en Eo apartenas certa sono. Male, vi proponas duoblajn literojn! Fakte, en la plej multaj landoj oni ne kutimas fonetike transskribi fremdajn nomojn, sekve tio devas esti tutmonda problemo kaj ne sole Ea! Al tiu ĉi opinio ni alvenis, pripensinte vian interesan leteron kaj la lanĉitajn ideojn.

Valdo Banajtis, Nova Vilnia, Litovio, SU: Nin surprizis la misa informo de la litova gazeto pri hungara intenco eldoni E-lingve verkon de A. Dumas. Laŭtan rebaton tio ne bezonas, tamen bv. konvinki la informanton de tiu gazeto pri la malutileco de la neserioza E-propagando. – Ni konsentas kun kelkaj viaj rimarkoj koncerne stilajojn, akceptu dankon. Ni tamen avertas vin: ne aŭskultu „la pilastron", plie la „renoman preleginton"... Nu, legi nomojn en la Kongresa Gaja Paĝo, ekz. de la „kongresa edzineto", eble vi ne deziris serioze, ĉu ne? La signifon de la vorto „ceso" – bedaŭrinde – ni ankoraŭ ne konas.

A. Aruoja, Estonio; *Gábor D.* Vác, H. kaj aliaj: Plurajn sprite konceptitajn „plendojn" ni ricevis de vi – kaj prave, ĉar la Elizabeta Ponto malfeliĉe turniĝis sur la titolpaĝo de la n-ro 1983/4, kaj la aŭtoj ektrafikis sur ĝi maldekstre. Laŭ nia scio, la presejo ne devis finfine pagi kompenson pro akcidentoj – grincis dume nur niaj dentoj...

Tomišek Jindřich, Řikovice, CS: Laŭ viaj temp-indikoj ni konstatis, ke foje post 3-5 semajna prokrasto vi ricevis nian revuon. Pro tio bv. reklamacii ĉe la loka (landa) poŝta gazetservo. Por havigi tiucele bazon, jen la *proksimumaj aperdatoj de H.V.* en 1984: n-ro 1 meze de aprilo, n-ro 2 fine de majo, n-ro 3 komence de julio, n-ro 4 komence de aŭgusto, n-ro 5 fine de oktobro, n-ro 6 fine de decembro. (La ekspedado el Budapeŝto daŭras plurajn tagojn, tial ne eblas pli precizigi.) Laŭ la supraj eblas rimarki, ĉu la revuo alvenis akurate.

*

Informo pri operoj

S-ro Josef *Cink* informis nin, ke li tradukis en Esperanton la tekstojn de kvin operoj por la ĉeĥoslovaka teatra agentejo „Dilia". La kvin operoj de la komponisto Jaroslav *Kadlec* estas la jenaj: „Pri la granda beto", „En signo de la suno", „Printempa tago", „Bestetoj kaj rabistoj" kaj „Somera rapsodio".

„Printempa tago", „Bestetoj kaj rabistoj" kaj „Somera rapsodio" estas groteskaj unuaktaj operoj kun fabela temo. Ili estas destinitaj ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenaĝuloj. Ili havas minimumajn pretendojn al la orkestro kaj al la nombro kaj voĉ-kvalitoj de la kantistoj. Pro tio ili estas uzeblaj ankaŭ en teatraj kolektivoj nemuzikaj, se nur la roluloj havas ordinaran kant-kapablon. Por akompano sufiĉas malgranda orkestro aŭ nur fortepiano. Laŭ la cirkonstancoj de la muzika akompano estas tolereblaj specialaj aranĝoj en la muziko.

„En signo de la suno" kaj „Pri la granda beto", ankaŭ unuaktaj fabelaj operoj, postulas jam pli vastan kaj pli nivelan ensemblon kantistan kaj orkestran.

Esperantistaj teatraj kolektivoj, kiuj interesiĝas pri la supre nomitaj operoj, turnu sin (Esperantlingve) al la nomita agentejo: DILIA, Vyšehradská 28, poŝtkesto 34. 128 24 Praha 2, Ĉeĥoslovakio.

KONSILO AL POETOJ

Ni citas el *„La Arto Poetika de C.E.R. Bumy"*: „Do – viajn versojn fajlu sen ripozo, / ĝis ili fluos kiel bona prozo." (Kalocsay). La sekvajn 3 versojn vidu en linioj **H.1., 6.** kaj **V.13.** (ensendendaj linioj).

Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **13.** Havigi al si (R) **14.** Bleki lupe **16.** Transigi de iu lingvo al alia (R) **17.** Enigus pintan aĵon en iun **18.** Virina nomo, reen **20.** Delikata, agrabla odoro **21.** Difinita epoko **22.** Terura ventego **24.** Ekz. pro frosto (R) **25.** Saltema amfibio (R) **26.** Multe diskutata verba finaĵo **27.** Rimed' **28.** Identaj konsonantoj **30.** Mezo de korpo! **31.** Futura finaĵo **32.** Titol' de Jesuo **34.** ...ono, metalo **37.** Kormezo! **38.** Servo inter vendantoj kaj aĉetantoj **40.** Rajtiganta paperslip' **42.** Komenci moviĝon (R) **44.** Fino de l' intesto **46.** Parto de gazetpaĝo (R) **48.** Delikate plaĉa **50.** Malfrue **51.** Filozofie flegma **53.** Moke kritikanta verko (R) **55.** Enspirante altiri fluidaĵon (R) **56.** Modajn aferojn stulte kaj sendistinge imitanta viro **58.** Tre malmolan metalon **60.** 2000 – per romiaj ciferoj **62.** Fari specialan paŝon en ŝakludo **64.** Malplenaĵon en tero **65.** Glaso ..akvo **66.** ...doj: flugilaj bestoj **68.** Demokratia respubliko **69.** Monogramo de nekonato **71.** Kontraŭ-Nord' **72.** Reen: interjekcio por ripetigi **73.** Sensorgan' **75.** Suferanto pro malvarmumo **78.** Monavida (R) **79.** Ŝmiris per lako **81.** Alporti bonan rezulton **82.** Atingi la celitan **83.** Muzika intervalo **85.** Speco de nukso **87.** Loĝanto de Eŭropa lando (R) **88.** Deveno

Vertikale: **2.** Startas **3.** Ridaĉi (R) **4.** Kaveto **5.** Asocio Universala **6.** Elpreni **7.** Reen: per mirakla lampo li vokis la ĝinon **8.** Participa finaĵo **9.** Genro de papago (R) **10.** Esti en ia sanstato (R) **11.** Respektego **12.** Cifero aŭ nombro **15.** Japana versformo (R) **19.** Lokprepozicio **22.** Profite uzebla **23.** Parto de fiziko (R) **26.** Kurblini' **29.** Kondukanto de aviadilo (R) **32.** Rozruĝa **33.** Faros kaveton **35.** Notu bone! **36.** Siropan restaĵon de sukerfabrikado **38.** Sentos impreson de surprizo **39.** Otoman' **41.** Altan konstruaĵon **43.** Ĉarma dombest' **45.** Kiel V.23. **47.** Identaj literoj de ne troiga konduto **49.** Samtempa harmonia sonado (R) **52.** Naski antaŭtempe nevivipovan idon (R) **54.** Ankaŭ Hungara Vivo estas tio **57.** Nombro **59.** Plumbosondilo (de akvoprofundo, R) **61.** Eksterordinara fenomen' **63.** Establi kaj ekfunkciigi ion (R) **65.** Tralumigebla sed ne travidebla (R) **67.** „Nur... kuraĝe" **70.** Sensperte kredema **72.** Proponi iun por geedziĝo **74.** Apartenantaj al li **76.** Identaj vokaloj **77.** Mikse: riverego en Siberio **78.** Kolekti, kunvenigi (R) **80.** Senvokale reen: ekzistis **84.** Ornitologia Unuiĝo **86.** Nobla metal'.

Solvo de la krucenigmo en n-ro *1983/4:* Hortobágy, Velencei, Esztergom, Kaloča, IREN, Gyula, Herend, Insulo Margareta, Kecskemét, Miskolc.

Libropremion gajnis per lotumado: Manfred *Goldenbogen,* Stralsund, GDR; Lidia Neri *Lami,* Livorno, I; *Onet* Ionel, Cluj-Napoca, R. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.



Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Hungara Antologio

Redaktis: Vilmos Benczik

„Hungara Antologio" enhavas 241 verkojn de 73 aŭtoroj el la hungara literaturo, ekde la 12-a jarcento ĝis niaj tagoj. Signifa parto de la tradukoj venas el la plumo de Kalocsay, sed krom li 27 tradukistoj kontribuis al la impona volumo, inde prezentanta la kremon de la hungara literaturo.

1. Kiu estas la aŭtoro de la suba citaĵo:
   „Ek! Ne, tamen – lasu nun la kordojn,
   estos iam fest' en mondovaloj..."
2. Kiel mortas Johano Kis, la protagonisto de la novelo „Tragedio" de Zsigmond Móricz?
3. Kio estas la titolo de la novelo, en kiu lanĉiĝas la eblo, ke en Sovetunio ekzistas du urboj, nomataj „Tambov"?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la apero de tiu ĉi numero.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1983/4:

1. La unua viktimo de la rabista bando estis Jim, la negra sklavo.
2. Huckleberry Finn faris truon en la muro de la kabano per rompita segilpeco.
3. David Garrick kaj Edmond Kean prezentas sin mondfamaj aktoroj.

Libropremion gajnis per lotumado: Stefan *Bode,* Leipzig, DDR; Arija *Vulfa,* Jelgava, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

Studentoj de pedagogia altlernejo (*Eger*, Főiskola, Matematika-T. H-3300): Julio Holló, Stefano Deák, Miĥaelo Sinka kaj Eleonora Aradi, Zuzana Ale, Erika Budai – kun 20-26 j. gejunuloj. – Rimas *Macionis* (25) elektroteknikisto, kol. revuojn pri muziko, diskojn, flagetojn. Litovio-SU-235.030, *Kedainiai*, A/D nr.2. – *Kurĉanov* Aleksej (20) studento de Siberia pedag. inst. pri fremdlingvoj, kol. diskojn, ŝatas teatron, kinon, rock-muzikon. *Krasnojarsk*, str. Parašutnaja 6-80, SU-660.078. – S-ro Petr *Jursa*, pĉt, ktm. *Havířov*, Balzacova 9, CS-73601. – F-ino Marija *Kostova* (17) lernantino, pri turismo, lingvoj, muziko. *Petriĉ*, ul. Demir Hisar 21, BG-1850. – S-ro Jaroslav *Šitov* (27) instruisto, pri filozofio, literaturo, klasika muziko, bk. *Lvov*, ul. Lermontova 3, kv. 9. SU-290.005. – Barbara *Dabrowska* (31) oficistino, kun geamikoj tm, ankaŭ france. *Elblag*, ul. Barona 17/1. PL-82-300. – Weronika *Kuriata* (31) ankaŭ angle, ruse. *Elblag*, ul. Dzierzynskiego 38B-m3, PL-82-300. – Emeriko *Horváth* (23) aŭtolavisto, pri literaturo, folkloro, sociaj sciencoj. *Cakóháza*, Fó u.36. H-9165. – S-ro Vadim *Mireev* kun junuloj pri ekologio, evoluo de scienco kaj homaro, kulturo. *Ĉehov*, ul. Poligrafistov d.11, b. k.514. SU-142-300. – Elena *Turmanova* kun gejunuloj pri nuna germana literaturo. *Rentovo* (Moskva regiono), ul. Lenina d.16, kv.10. SU-143.952. – F-ino Lalila *Iljina* kun gejunuloj. *Baku*, Pas 8 kilometr d.3. kv.36. SU-370.119. – Aivar *Liepinš* (22) bibliotekisto, prez. de E-klubo pri ĵurnalistiko, fremdlingvoj. *Madona*-1. pk.25. Latvio-SU-229.220. – F-ino Malgorzata *Popialkiewicz* (25) pri poezio, popolarto, slojdo, ĝardenlaboroj. *Poznan*, ul. Strelecka 17-19. PL-61-846. – *Trifonova* Alla (30) pedagogo de infanvartejo. *Miass* (Ĉeljabinska reg.) pri Ĉernisevskogo I-32, SU-456.320. – *Demenjov* Vladimir (16) lernanto, *Miass*, pr. Avtozavodcev 48-25. – *Morozova* Valentina (36), *Miass*, ul. Popova 11-38. SU-456.318. – *Jurlova* Valentina (36) inĝeniero-konstruistino, pri profesiaj aferoj, ktm. *Miass*, Tuhaĉevskogo 4-2, SU-456.304. – Krysztof *Piotrowski* (14) ktm, kol. ĉion pri flaŭro kaj faŭno (pm, bk, foto, kc). *Wroclaw*, ul.R.Koch 1A, PL-51-122. – F-ino Zdravka *Dobreva* (38) oficistino kun noblanima, inteligenta viro por ev. geedziĝo, scias angle, france, germane, malmulte hungare. *Sofio*, str. Boris I, 140. BG-1000. – Zdislaw *Wierzbicki* (30) ktm, pri literaturo, muziko, sporto, turismo, teatro k.a. interš. bk, diskoj. *Wroclaw*, ul. Pabianicka 23/3, PL-53-339. – Olga *Tóth* kaj Erzsébet *Szakáts* amikinoj (31) kun fraŭloj pri sporto, vojaĝo, rec. gastigado. *Budapešto*, Márvány u.25. II.21. H-1126. – Inĝ. *Fomin* Aleksej (24) ktm. *Miass*, pr. Černisevskogo 6-29, SU-456.320. – *Bubenec* Nadeĵda (26) inĝeniero-konstruistino. *Miass*, ul. 8-Marta 173-22, SU-456.317. – S-ro *Nagy* József (20) kun gejunuloj pri sporto, muziko, pm, k.a. *Budapešto*, Tölgyfa u.14. II.15. H-1027. – Julita *Šlesinska* (19) studentino, ktm. *Poznan*, ul. Czwartaków 26/1, PL-61-495. – F-ino Stefka *Borisova* (17) teknika lernantino, ktm, pri arta gimnastiko, kol. kalendaretojn, sport-flagetojn, diskojn, bk. *Karnobat*, Klisura 18, BG-8400. – F-ino Dorota *Rut* (25) ktm. pri turismo, literaturo, mod. muziko, dia, interš. bk, tur.prospektojn, *Zabrze*, ul. Ligency 56, PL-41-804. – Boleslaw *Werenko* (40) kun gehungaroj pri E, pm, bk. *Swidnik*, ul. Czeresniowa. 12-81, PL-21-040. – *Jerjomina* Lubovj (28) flegistino, pĉt. *Miass*, ul. Uralskaja 81-2, SU-456.319. – *Koptjagina* Tatjana (65) pens. instruistino. *Miass*, pr. Autozavodvec 24-34. SU-456.304. – *Baškov* Jurij (32) tornisto. *Miass*, ul. Ĵdanova 5-55. – *E-Klubo Verda Kverko* proponas korespondi kun 50 diversaĝaj membroj, pĉt, ktm. *Kédainiai* A, d.50. Litovio SU-235.030. – *Taimla* Kersti (17) lernantino, pri aŭtoj kaj aŭtosporto. *Tallinn*, Ed: Vilde tee 91-30, Estonio, SU-200.029. – *Aruoja* Andres, inĝeniero, pri historio, interesaj eventoj. *Kehra*, Kingissepa 11-41, Estonio, SU-202.240. – *Ojamae* Kalle (17) lernanto, *Soometsa*, Parnu rajoon, Estonio, SU-203.650. – *Tedre* Kirsti (12) lernantino. *Tallinn*, Silikaadi 2 A-13, Estonio, SU-200.016. – *Part* Helve. instruistino. *Rapla*, Valtu kolhoos, Estonio, SU-203.500. – *Matsu* Pille (18) faklernantino. *Tallinn*, Pollu 106-3, SU-200.009. – *Stankov* Mitko (17) lernanto, pri dancoj, muziko. *Silistra*, Todor Bonev-13, BG-7500. – *Kostadinov* Plamen (17) lernanto, ktm. pĉt. *Silistra*, Bogdan Vojvoda, bl.EK-10B, ap-32, BG-7500. – *Kasimova* Tezgjul (17) lernantino, ktm, pĉt. *Silistra*, 7-Septemvri-35, BG-7500. – *Avramova* Nadka (50) agronomino, ktm, pri turismo. *Silistra*, Kapitan Mamarĉev-14, BG-7500. – *Kisimov* Kisim (37) instruisto, pri turismo. *Silistra*, SST-„Dobrudĵa", BG-7500. – *Minĉeva* Veselina (21) oficistino, ktm, pĉt. *Silistra*, G. Dimitrov-43, BG-7500. – *Šabanova* Nurten (20) ofocistino, pĉt, precipe turismo. *Silistrenski*, C. Boil-7683, BG.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: **Tibor Vaskó.** + **Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**

hearota 84-0009

La Konferenco-Servo de Entrepreno pri Aplikoj de Komputotehniko

proponas en sia entreprena rezidejo la kongressalonon János Neumann por ĉiaj konferencoj, aranĝoj en Budapeŝto.
La kapacito de la salono 225 personoj.
Ni disponigas:
Servojn de aŭdigtekniko
– aparataro por samtempa tradukado al 3 lingvoj samtempe
– laŭtparoliloj en la salono, kun ebleco ligi al gramafono kaj magnetofono
– kun ebleco registri al magnetofonbendoj kaj kasedbendoj
Servojn de videotekniko
– filmoprojekciado
– interna kablotelevido
– skriboprojekciiloj
Por komputteknikaj demonstroj:
– luo de komputivo
– luo de linioj por datumteletransigo
Estas mendeblaj ankaŭ ĉambroj por sekcikunsidoj (por 120, 30 kaj 15 personoj) kaj c. 200 m^2 da areo por ekspozicio.
La salonoj estas klimatizitaj, garderoboj je dispono. Parkumejo por aŭtomobiloj.
En la sama konstruajo HOTELO SZÁMOK zorgas pri gastigo, manĝigo.
Por anticipa mendo, aŭ demandoj kontaktu nian konferenco-servon.



SZÁMALK

SZÁMÍTÁSTECHNIKA-ALKALMAZÁSI VÁLLALAT

BUDAPEST XI., SZAKASITS ÁRPÁD ÚT 68. • LEVÉLCÍM: 1502 BUDAPEST 112. PF. 146.

TELEFON: 853-111 • TELEX: 22 44 98

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
V. Duna Intercontinentál